


peranto
IE IL P O P O I L A
C I N I O

中國報道

2 1988





Loĝantoj en stratetoj

Fotoj de Cai Haijeng

Estas nekalkuleblaj la stratetoj en Pekino, kiuj interkruciĝas en ĉiuj partoj de la urbo, etendiĝas inter domegoj kaj interligas placojn kaj stratojn. La loĝantoj en la stratetoj plejparte estas malnovaj kaj iuj familioj vivas tie jam de tre longe. Kun la disvolviĝo de la urba konstruado, nemalmultaj el la stratetoj pligrandiĝis kaj fariĝis stratoj aŭ servis kiel dom-bazoj, ke sennombraj familioj enloĝiĝis en novaj domoj.

En la urbo troviĝas longaj kaj mallongaj stratetoj. Ambaŭflanke de la longaj loĝas centoj da familioj kaj ambaŭflanke de la mallongaj—dekoj aŭ kelke da familioj. En iuj stratetoj ankoraŭ kuŝas kvadrataj kortoj ĉirkaŭitaj de loĝdomoj en tipa pekina arkitektura gusto. La stratetoj estas multe pli kvietaj ol la movoplenaj stratoj. En la stratetoj ne mankas infanĝardenoj, lernejoj, vendejoj kaj amuzejoj.

La najbaroj en la stratetoj bone konas unu alian kaj vivas kiel amikoj. Ne nur la infanoj ludas kune, sed eĉ la plenaĝuloj vizitas unu alian post laborado. Matene emeritoj faras korpajn ekzercojn aŭ babilas aŭ kantas por sin amuzi.


Larĝa kaj mallarĝa stratetoj





Ĝojo de emeritoj

Renkontiĝo de najbaroj en strateto



Ludo ĉe strateto



Vendejo en strateto



En kvadrata korto
ĉe strateto

ENHAVO

SUR LA KOVRILO:

la popola novjara bildo "Ĝinju"

luĝaj temoj de popolaj novjaraj bildoj de Ĉinio ofte homofonas kun nomoj de objektoj por simboli feliĉon kaj ĝojon en la vivo. Inter tiaj bildoj estas "Ĝinju" (oro kaj jado), kiu homofonas kun ora fiŝo en la ĉina lingvo kaj simbolas riĉecon kaj feliĉon.

VIVO DE ORDINARAJ ĈINOJ:

Loĝantoj en stratetoj

Fotoj de **CAJ HAJFENG**

ĈINAJ ARTOJ:

Popolaj novjaraj bildoj

Diablaj maskoj en Junnan

Fotoj de **CAJ MING**

SUR LA DORSKOVRILO:

[ĈINAJ POŝTMARKOJ]

Kaligrafiaĵoj kaj pentraĵoj de U Ĉangŝuo

- 2 Laŭkontrakta administrado — vitala forto de la ĉinaj entreprenoj
- 6 Vizito al la Okcidenta Koridoro de la Flava Rivero
- 54 VOJAĜO LAŬ JANGZI-RIVERO (14): Monturbo Ĉongĉing
- 15 Neforgesebla amikeco
- 18 Ĉinaj Esperanto-poŝtstampoj
- 19 ESP-NOVAĴOJ
- 61 POR KOMENCANTOJ: Homo kaj fajro
- 22 "Mirinfanoj" en universitato
- 66 Vizito al la hejmloko de ginsengo
- 64 POR VIA SANO: Masaĝo (IV)
- 26 Novelo: Fero dolĉa, fero fiodora
- 37 ĈINA LITERATURO:
 - Landlimaj poetoj en la prospera periodo de Tang-dinastio
- 38 Poemoj pri landlima militista vivo el la prospera periodo de Tang-dinastio
- 40 Esperantisto-miniaturisto
- 41 "Chinoiserie"
- 30 ĈINAJ ARTOJ: Popolaj novjaraj bildoj
- 44 Individuaj entreprenistoj en Pekino
- 63 ĈINAJ MOROJ: Legendo pri jaro
- 12 Horloĝoj en la Imperiestra Palaco en Pekino
- 47 ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO: Antikvaj turoj de Ĉinio
- 50 KURANTAJ AFEROJ
- 61 Konkurso de EPĈ-amikoj
 - 5 Vi havos ŝancon senpage vojaĝi en Ĉinio
- 17, 29, 43, KORESPONDI DEZIRAS
- 65 Lokoj menciitaj en ĉi tiu numero

JARABONTARIFO	Britio	£	8.00	Japanio	Yen	3000	Svisio	SF	25.00		
Aŭstralio	\$A	15.00	Finnlando	Fmk	64.00	Jugoslavio	Din.	1500	Usono	US\$	12.00
Aŭstrio	Sch	200	Francio	FF	90.00	Nederlando	Gld.	34.00	Kanado	Can\$	14.00
Belgio	BF	550	Hispanio	Ptas	1200	Nov-Zelando	NZ\$	20.00			
FR Germanio	DM	30.00	Italio	Lit	18000	Portugalio	Esc	1100			
Por aliaj landoj en Eŭropo: £ 8.00 US\$ 10.00 Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko: £ 5.00 US\$ 6.50											

Laŭkontrakta administrado — vitala forto de la ĉinaj entreprenoj

Malalta laborefiko, granda konsumado, malforta devokonscio kaj superflua personaro vidigas en multaj entreprenoj de publika posedsistemo de Ĉinio. Kiel stimuli produktan aktivecon de la oficistoj kaj laboristoj? Tio estas grava tasko alfrontata de la ĉina ekonomia reformo.

Post plurjara praktikado oni trovis, ke la praktikado de la respondeca sistemo de laŭkontrakta administrado en la entreprenoj estas efika rimedo por garantii al la ŝtato financan enspezon, pliigi al la entreprenoj kapitalan akumulon, apartigi la posedrajton kaj administradon de la entreprenoj kaj perfektigi ilian administran regularon.

Kio do estas la respondeca sistemo de laŭkontrakta administrado? Ĝia baza trajto estas "fiksi la bazan nombron, garantii la profitdonon al la ŝtato, rezervi pli da superplenumita profito kaj mem kovri la deficiton". Tio estas, ke laŭ sia produktadministra kapablo, la entreprenoj kontraktas kun la ŝtato ĉiujare pri certa profito, absoluta sumo aŭ progresiva proporcio. Se nur ĝi donas al la ŝtato la interkonsentitan profiton, do ĝi rajtas proprigi la restan profiton al si. Ju pli energie la entreprenoj ekspluatas sian latentan forton, des pli multe ĝi gajnas profiton. Ju pli multa estas la profito de la entreprenoj, des pli altaj estas la kromsalajroj por la oficistoj kaj laboristoj kaj monpremio por la bonstatiga afero. Kaj sekve, pli kaj pli altiĝas la vivnivelo de la oficistoj kaj laboristoj kaj tiel formiĝas cirkulado favore al la produktado.

Tre klara estas la efiko por la entreprenoj praktikantaj la sistemon en la lastaj jaroj. La respondeca sistemo de laŭkontrakta administrado ne nur vigligis la entreprenon mem, sed ankaŭ alportis al la ŝtato kaj socio grandan ekonomian efikon. Multaj entreprenoj ne praktikantaj tian sistemon unu post alia esprimis sian deziron praktiki la laŭkontraktan administradon. Laŭ

nekompleta statistiko, je la fino de oktobro 1987 60% de la entreprenoj grandaj kaj mezgrandaj en Ĉinio jam praktikis diversformajn respondecajn sistemojn. Ĉi-jare, ĉiuj grandaj kaj mezgrandaj entreprenoj de Ĉinio praktikos la kompletan respondecan sistemon de laŭkontrakta administrado por antaŭenpuŝi la ekonomian reformon.


En kiuj flankoj speguliĝas avantaĝoj de la sistemo?

VIGLIĜIS LA ENTREPRENOJ

Ĉar la baza nombro donita al la ŝtato estas fiksita, la entreprenoj povas rezervi al si pli da nove pliiginta profito, kio havigas al la entreprenoj pli grandan viglecon por akumuli kaj disvolvi per si mem. Kaj la ŝtato povas akiri krom la laŭkontrakte fiksita enspezo ankaŭ produktaĵan imposton, fonduson de energio, trafiko kaj konstruado de la entreprenoj. Tiel pliigiĝas kaj la profito kaj la kapitalo.

Ekzemple, la Ĉefurba Ferŝtala Kompanio de Pekino antaŭ la reformo estis postiginta pro malnovaj ekipaĵoj. Tie ankoraŭ funkciis la Ford-tipa kaldronego kaj vapora turbino faritaj en la fruaj jaroj de la 20-a jarcento kaj koaksigejo antaŭ longe neuzita eksterlande. Tial ĝi estis nomata "Metalurgia Historia Muzeo". Antaŭe la entreprenoj devis doni ĉiujn siajn profitojn al la ŝtato. Renovigo de la teknikaj ekipaĵoj dependis de la ŝtata investo, tial renovigo de la malnovaj ekipaĵoj estis prokrastita. Post la efektiviĝo de kontrakto pri progresiva profito, la kompanio faris teknikan renovigon al la plejparto de la ĉefaj ekipaĵoj per sia kapitalo, kiun ĝi akiris de sia plimulta profito. Ekzemple, la aglomerejo, kvankam kun malnova fizionomio, renovigis ĉiujn siajn internajn ekipaĵojn. La pli ol 800 ekipaĵoj de la tuta produkta proceso ĉiuj estas regataj de komputiloj kaj la sintezaj normoj jam atingis la internacie superan nivelon.

Post la efektiviĝo de laŭkontrakta administrado la vivnivelo de la laboristoj kaj oficistoj de la



En la Jūejang-a Farmacia Fabriko

kompanio altiĝi jaron post jaro. En 1978 la meznombra monata enspezo de la laborantoj de la kompanio estis 61.57 jūanoj, kaj nur tiuj, kiuj eklaboris en la kompanio antaŭ 1958, rajtis postuli loĝejon. Post la efektivigo de laŭkontrakta administrado la individua enspezo kaj kolektiva bonstato varias laŭ la ekonomia efiko de la entrepreno. En 1986 la meznombra monata enspezo de la laboristoj kaj oficistoj jam atingis 162 jūanojn. De 1978 ĝis 1986 estis konstruitaj loĝdomoj kun plankareo de 1 068 400 kvadrataj metroj, 2.2-oble kiom la totala plankareo de tiuj en la pasintaj 30 jaroj. Multaj laborantoj, kiuj eklaboris tie antaŭ nelonge, akiris loĝejon. Samtempe estis konstruitaj lernejoj, infanvartejoj, magazenoj kaj aliaj vivekipaĵoj sume kun plankareo de 130 000 kvadrataj metroj. La laŭkontrakta administrado donis pli grandan aŭtonomecon al la kompanio, kiu ricevis pli flekseblajn financajn rimedojn, kio multe mobilizis la aktivecon kaj kreivon de la oficistoj kaj laboristoj, kiuj kreis miraklojn en la ok sinsekvaj jaroj, ke la meznombra profito pligrandiĝis je 20% ĉiujare.

Kiamaniere la respondeca sistemo de laŭkontrakta administrado levis la aktivecon kaj kreivon de la oficistoj kaj laboristoj? La kialoj estas jenaj:


"EGALISMA DISTRIBUO" ROMPITA

Antaŭ la efektivigo de la respondeca sistemo de

laŭkontrakta administrado ĉiuj oficistoj kaj laboristoj povis ricevi ĉiam fiksitajn salajron, ĉu ili bone laboris ĉu ne. Salajro ne ludis sian rolon por premii la diligentulojn kaj puni la maldiligentulojn. La egalisma distribuo serioze malhelpis la disvolviĝon de produktado.

Post la efektivigo de la respondeca sistemo la administra celo de la entrepreno decidis, ke la entrepreno nepre devas efektivigi sciencan administradon por sin adapti al nova situacio. La entreprenoj praktikantaj laŭkontraktan administradon disdonas diversajn ekonomiajn normojn, tutan teknologian laboron kaj kunlaboran rilaton al ĉiuj laborejoj, sekcioj, grupoj kaj laborpostenoj, por ke la respondeca sistemo de laŭkontrakta administrado strikte ligiĝu kun la laborfrukto de ĉiu laboranto.

La Plata Fabriko de Siping, Ĝjilin-provinco, estas metalurgia entrepreno kun pli ol 2 200 oficistoj kaj laboristoj. Por ĝi estas tri specoj de salajro kaj monpremio laŭ la malsamaj trajtoj de la bazaj laborejoj, akcesoraj laborejoj kaj administraj oficejoj. Post kiam la fabriko difinis la monatan laŭkontraktan salajron kaj monpremion por ĉiuj laborejoj, ili distribuis la salajron kaj monpremion al individuoj laŭ malsamaj metodoj. Juĝate laŭ la kvalito kaj kvanto de produktaĵo, iuj laboristoj ricevis monpremion de 360 jūanoj monate, dum aliaj eĉ unu groŝon ne ricevis. Monpremio vere ludas la rolon por kuraĝigi la diligentulojn kaj puni



En laminato de la ĉefurba Ferŝtala Kompanio

la maldiligentulojn. Kun kresko de la enspezo altiĝis ankaŭ la kvalito de produktaĵo. La platoj produktitaj de la fabriko, kiuj estis malbonkvalitaj antaŭe, nun ricevis la titolon "altkvalita produktaĵo" donitan de supera departemento. En la duonjaro post la efektiviĝo de la respondeca sistemo ĝia produktovalorado kreskis je 14.1% kaj ĝia profito je 7.7%, kompare kun tiuj de la sama periodo en la pasinteco.

La respondeca sistemo estas ankaŭ bona rimedo kontraŭ malŝparo. Post la efektiviĝo de la respondeca sistemo de laŭkontrakta administrado la interesoj de la entreprenoj strikte interligiĝas kun tiuj de la individuoj, tial ĉiuj memkonscie zorgas pri ŝparado, kaj la antaŭa malŝparemo malaperis sen kuracado. Ekzemple, laboristoj de la Konstrumateriala Fabriko de Ljaŭjŭan forĵetis multe da ŝtalaĵaj restaĵoj dum farado de porkonstruaj pecoj. Oni faris fenestrajn kradojn el ili, infanoj kolektis kaj vendis ilin kiel eluzitajn. Post la efektiviĝo de la respondeca sistemo de laŭkontrakta administrado laboristoj kolektis ilin por denova uzo. En nur duonjaro ili ŝparis 23 tunojn da ŝtalaĵoj.

"KONSCIO PRI KVALITO PLIFORTIGITA"

Antaŭe Ĉinio praktikis produktajn ekonomion. La ŝtato aĉetis ĉiujn produktaĵojn de la entreprenoj, ĉu ili estis bonkvalitaj ĉu ne. Antaŭ la efektiviĝo de la laŭkontrakta sistemo multaj

entreprenoj preteratentis produktajn kvaliton. Ĉar post kiam la produktaja ekonomio turniĝis en la varan, oni ne aĉetas malbonkvalitajn produktaĵojn, kio rekte influas administradon de entreprenoj. Tial la entreprenoj praktikantaj la laŭkontraktan sistemon alte taksas la kvaliton de produktaĵo.

Jen la devizo "Bonan kvaliton por ekzisti, bonan kvaliton por gajni avantaĝon kaj bonan kvaliton por akceli disvolviĝon" prezentita de la Fer-aloja Fabriko de Ĝjilin, la plej granda feraloĵa fabriko en Ĉinio. En 1981 la kvanto de mendoj ankoraŭ ne atingis dudekonon de ĝia produkta povo. Post la efektiviĝo de laŭkontrakta sistemo en 1983 la fabriko difinis, ke la kvalita proporcio konsistigu 30-40% de la monpremio de la laboristoj kaj oficistoj. En 1987 ĝiaj 10 ĉefaj produktaĵoj fariĝis bonkvalitaj laŭ la normoj difinitaj de supera metalurgia departemento, 4 el ili gajnis arĝentan premion aljuĝitan de la ŝtato. La produktovalorado de la superaj produktaĵoj konsistigis 92.4% de la totala produktovalorado. La proporcio de du specoj da unuaklasaj produktaĵoj atingis 100%. Tial ĝiaj produktaĵoj ne nur rapide okupis la enlandan merkaton, sed ankaŭ eniris la internacian merkaton. En 1982-1986 la produktokvanto de la fabriko kreskis meznombro 23% ĉiujare, interezo kaj imposto meznombro 31%. "Kvalito estas vivo de fabriko" ne plu estas sola devizo sur muro, sed efektiva vivobazo por la entreprenoj.

LAŬKONTRAKTA SISTEMO PERFEKTIGATA PAŜOPOSTPAŜE

En la komenco post la efektiviĝo de laŭkontrakta sistemo por garantii finanĉan enspezon de la ŝtato, la supera respondeca departemento ĝenerale prezentis kompare altan kontraktan bazan nombron, dum la entreprenoj prezentis kompare malaltan nombron. Tiel inter la entreprenoj kaj la gvida departemento ofte okazis marĉando, kio facile kaŭzis mallongtempan agon, ke la entreprenoj kaŝis sian latentan forton, malaltigis la bazan nombron kaj penis por rapide ĉasi profitojn. Tial enkonduko de konkuro kaj efektiviĝo de laŭkontrakta adjudikado estas gravaj rimedoj fari novan administradon, kiu stimulas la entreprenon ekspluati sian latentan forton, perfektigi sin, pliigi sian reproduktion kaj senĉese levi sian administran nivelon kaj ekonomian efikon.

La efektiviĝo de laŭkontrakta adjudikado kaj enkonduko de konkuro ŝanĝis la marĉandon inter la entreprenoj kaj registaro. Ĝenerale dirite, ju pli multaj estas la konkurantoj, des pli granda fariĝas la baza nombro, kiu pliproksimiĝas al la realo de la entreprenoj. Tio, kiu malaltigas la bazan nombron, ne akceptu adjudikatojn. Tio helpas al la

VI HAVOS ŜANCON SENPAGE VOJAĜI EN ĈINIO

— Ni starigis metodojn por premii niajn legantojn kaj perantojn

Por disvastigi nian lingvon kaj por ke pli da alilandaj esperantistoj konu Ĉinion, ni kaj la Esperanta Sekcio de la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHUDIAN) decidis pligrandigi la distribuadon de la gazeto en ĉiuj partoj de la mondo. Tiucele ni premias la legantojn kaj perantojn, kiuj bone helpas nin distribui la gazeton:

1. Ni donacos EPĈ de unu ĝis kvar jaroj al tiuj, kiuj abonigos en 1988 10-40 novajn legantojn kaj sendos la abonkotizon.

2. Ni donacos EPĈ al tiuj, kiuj abonigos en unu jaro pli ol 50 novajn legantojn kaj sendos la abonkotizon, kaj ni aldonos ĉinajn Esperantajn librojn laŭ ilia kontribuo.

3. Tiuj, kiuj abonigos en unu jaro pli ol 100 novajn legantojn kaj sendos la abonkotizon, ricevos, krom EPĈ kaj ĉinajn Esperantajn librojn, ankaŭ belan metiartaĵon en ĉina stilo.

4. Al tiuj perantoj, kiuj en unu jaro abonigos pli ol 50 novajn legantojn kaj sendos la abonkotizon, ni donacos ĉinajn Esperantajn librojn aŭ aldonos metiartaĵojn laŭ ilia kontribuo.

5. Tiuj, kiuj abonigos en unu jaro pli ol 300 novajn legantojn (perantoj, kiuj abonigos kaj reabonigos tiom da legantoj) kaj sendos la abonkotizon, estos invititaj ekskursi en Ĉinio 7 tagojn. Tiuj, kiuj abonigos en unu jaro pli ol 500 novajn legantojn kaj sendos la abonkotizon, estos invititaj ekskursi en Ĉinio 14 tagojn. Ni kaj la libro-komerca

kompanio pagos por iliaj manĝo, loĝo kaj veturo en Ĉinio. La invititoj mem respondecu pri la pago por sia veturo ekster Ĉinio.

Tuj post la abonigo de 10 legantoj oni sendu iliajn adresojn al la Esperanta Sekcio de la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio, P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio, por ke ĝi povu fari aranĝon. Tuj post la abonigo de 50, 100 aŭ 300 legantoj oni informu nin pri iliaj adresoj, por ke ni povu sendi al ili Esperantajn librojn kaj metiartaĵojn aŭ invitolon por ekskursi al Ĉinio.

Ni kore esperas, ke niaj legantoj kaj perantoj bone kunlaboros kun ni kaj subtenos nin por sukcesigi tiun signifoplenan agadon.

La Red.

entreprenoj ekspluati sian latentan produkt-forton kaj science difini la kontraktan bazan nombron. Ni prenu la Trinkajan Fabrikon de Uhan kiel ekzemplon. Ĝi estis deficitata entrepreno. Komence la koncerna departemento taksis, ke ĝia kontrakta baza nombro devas esti 2 500 000 jŭanoj, tamen la konkurantoj prezentis la bazan nombron minimume de 3 000 000 jŭanoj. Fine la adjudikito donis la bazan nombron de 3 600 000 jŭanoj. El tio oni povas vidi, ke tia konkuro ebligas al la entrepreno disvolvi sian maksimuman latentan forton.

La konkuro ankaŭ alportis viklecon al la

entreprenoj, ĉu profitodonaj, ĉu deficitaj. Antaŭe tiuj entreprenoj ofte ŝanĝis siajn estrojn, eĉ neniu volis fariĝi estro de entrepreno. Sed nun estas multaj konkurantoj por akcepti laŭkontraktan adjudikon. La Fabriko de Fotelektraj Ekipaĵoj de Pekino havis deficiton de 1.318 000 jŭanoj antaŭ la efektiviĝo de laŭkontrakta adjudiko. Sed en 4 jaroj la kontrakta interezo estis sume 4 181 000 jŭanoj. Nova fabrikestro Liŭ Ŝjaŭfang malkaŝe diris, ke se ne efektiviĝus laŭkontrakta adjudiko, neniu akceptus la adjudikon. Sed kun respondeco sur la ŝultroj, rajto en la manoj, li nun povas nur antaŭenmarŝi kaj absolute ne retiriĝi. ■

VIZITO AL LA OKCIDENTA KORIDORO DE LA FLAVA RIVERO

Teksto de MEJ ĜI Fotoj de LIŬ SIGONG

La Okcidenta Koridoro, situanta en Gansu-provinco, nord-okcidenta Ĉinio, komenciĝis de Uŝaŭ-monto oriente, etendiĝas ĝis la bordo de Ŝule-rivero okcidente kaj najbaras al la senlima montaro Ĉjiljan sude. Ĝi kun totala longeco de ĉ. 1 000 kilometroj kaj larĝeco de kelkaj ĝis pli ol cent kilometroj, aspektas kiel longa koridoro, situas okcidente de la Flava Rivero kaj pro tio ĝi ricevis la nomon.

En la pasinteco, menciante tiun lokon, oni tuj asociis ĝin kun la tuta nordokcidento: dezerta Gobio, dezerto en arda suno, uragano, antikva batallejo, kie leviĝis batal-alarma fumo de lupaj fekaĵoj kaj galopis henantaj


batalĉevaloj, malgaja flutado de garnizonantoj... Antaŭ mia vojaĝo al la loko, ankaŭ mi asociis miajn pensojn kun tio. Tamen, ĝi impresis min malsame post kiam mi venis al ĝi.

Nia vizitgrupo el 17 membroj ekveturis de Langou, la ĉefurbo de Gansu-provinco. De la 2-a a.K. ĝis la 8-a aŭ 9-a jc. p.K. la Okcidenta Koridoro estis unu el la ĉefaj trairejoj de la antikva komerca vojo — Silka Vojo, kunliganta Ĉinion kun la Centra kaj Okcidenta Azio kaj la orienta bordo de Mediteraneo. En 121-111 a.K. la Okcidenta Han-dinastio starigis sinsekve la prefektujojn Uuej, Ĝangje, Ĝiŭĉjŭan kaj Dunhuang por regi la

regionon okcidente de la Flava Rivero. La sidejoj de tiuj prefektujoj senescepte estis prosperaj urboj siatempe. Poste la Silka Vojo malprosperiĝis kaj la koridora regiono iom post iom dekadenciĝis kaj fariĝis unu el la malriĉaj kaj postiĝintaj regionoj de Ĉinio. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, malgraŭ la 30-jara penado, tie kamparanoj ankoraŭ ne tute solvis la problemon de vestoj kaj manĝaĵoj. En la lastaj jaroj Ĉinio praktikas reforman kaj pordmalferman politikon, kio alportis ŝanĝiĝon al la regiono okcidente de la Flava Rivero kaj la nordokcidento. Nun Langou jam fariĝis grava industria urbo en nordokcidenta Ĉinio. La Okcidenta Koridoro estas unu el la ĉefaj regionoj subtenataj kaj konstruataj de la ŝtato. Tie ne nur troviĝas la plej elstaraj antikvaj kulturaj restaĵoj de Ĉinio, sed ankaŭ estas granda grenejo de Gansu-provinco.

Forlasinte Langou, ni veturis al Uuej, nia unua celloko, unu el la kvar antikvaj prefektujoj okcidente de la Flava Rivero. Uuej estas antikva kultura urbo kun historio de pli ol 2 000 jaroj. Nur la elterigita bronza galopanta ĉevalo de la Orienta Han-dinastio (25 - 220 p.K.) jam povas renomigi Uuej en- kaj eksterlande, por ne paroli pri aliaj. Antaŭ longe mi jam aŭdis pri la ĉevalo kaj ĉifoje mi deziris satigi miajn okulojn je la propra vidado. Oni diras, ke ĝi kun alte tenata kapo estas plastike eleganta. Ĝiaj tri hufoj estas saltantaj en la aero kaj la alia hufo subpremas birdeton. Ĝi forte

En la laborejo de elektroliza nikelo de la Ĝinĉŭan-a Nefermetala Kompanio



impresas la rigardantojn per sia braveco kaj rapideco. Ĝi estis eksponita kaj laŭdata en pluraj landoj. Bedaŭrinde, kiam ni vizitis la lokon, ĝi estis eksponata en Pekino. Tial ni rigardis nur la tombon de la Orienta Handinastio, el kiu oni elterigis la bronzan ĉevalon. Reveninte al Lanĝou, mi informiĝis, ke la ĉevalo estas eksponata en la Muzeo de Gansu-provinco, kaj mi havis la ŝancon rigardi ĝin.

Uŭej-regiono estas la ĉefa grena produkto en la regiono okcidente de la Flava Rivero. Sole Uŭej al la ŝtato cent milionojn da kilogramoj da greno ĉiujare. En historio estis dirmanieroj ora Ĝangje, arĝenta Uŭej kaj jada Ĝiŭĉjŭan. Mi supozis, ke la nomo Arĝenta Uŭej eble originis de tieaj riĉaj minajoj. Mia supozo estis pruvita en Ĝinĉŭan, la nikela urbo. Ĝinĉŭan estas sub la administrado de Uŭej-regiono. En 1958 geologoj trovis tie en la dezerto riĉan mineralon de kupra kaj nikela sulfidoj, kiujn oni ekspluatita poste. En la 60-aj jaroj estis fondita la Ĝinĉŭan-a Nefera Kompanio, kio finis la historion, ke al Ĉinio mankis nikelo. Pasis pli ol 20 jaroj. Nun la kompanio jam fariĝis granda kombinato de neferozaj metaloj de ekspluatado, selektado kaj fandado. La rezervokvanto de nikela mino en Ĝinĉŭan okupas la duan lokon en la mondo, nur post Montrealo de Kanado. Krom nikelo, tie estas riĉaj ankaŭ la rezervokvantoj de kupro, kobalto, plateno, paladio, arĝento, osmio, iridio, rutenio kaj rodio.

Ni vizitis ankaŭ Ŝŭangŭan-subdistrikton en tiu nikela industria bazo. La subdistrikta estro Pan Faĵong rakontis al ni, kiel riĉiĝis tieaj kamparanoj. Tiu loko estis tiel malriĉa antaŭe, ke la viroj ne havis monon por edziĝi. En 1974 la 23-jara Pan Faĵong estis elektita kiel vilaĝa estro. Sub lia gvido oni funkciigis brikejon, kaj poste transportan trupon kaj hortikulturejon. Ili pene laboris

dekelkajn jarojn kaj suriris riĉigan vojon de diversspecaj entreprenadoj. Kiam Pan kondukis nin al sia korto, mi preskaŭ ne bredis, ke estas tiel belaj domoj en vilaĝo okcidente de la Flava Rivero. En la pasinteco, la tieaj domoj plejparte estis el leŭsaj adoboj. Sed nun staras antaŭ niaj okuloj hela ruĝbrika domo en la vasta korto. Antaŭ la domo kreskas diversaj fruktarboj kaj floroj. Sub pirarbo oni pretervole ekkriis. Ho, ĝi portas kvar specojn da fruktoj. Pan klarigis, ke en la aĝo de 19 jaroj, li lernis grefton, ĝi ja estas lia eksperimenta arbo. Pan diris al ni, ke ĉiuj familioj de la vilaĝo havas tian korton, tian brikdomon kaj ankaŭ malgrandan ĝardenon en la posta korto. La fruktoj produktitaj en ilia ĝardeno estas pli ol sufiĉaj por plenumi ilian propran bezonon. Pan alportis al ni multajn fruktojn, kiaj akvomelonoj, lanĝou-aj melonoj, pomoj, piroj kaj vinberoj, dirante, ke ili estas produktitaj de lia familio kaj ni nepre ilin gustumu. Li tranĉis grandan akvomelonon, kies ruĝa karno aromis kaj allogis nin ĉiujn. Manĝante, ni sentis, kvazaŭ dolĉa fontakvo fluis en niar buŝon.

Ni daŭrigis nian vojaĝon okcidenten al Ĝiŭĉjŭan.

La brilantaj jadpokaloj produktitaj de Ĝiŭĉjŭan kun historio de pli ol 2 000 jaroj jam renomiĝis en la lando. Ĉar la pokalo estas farita el jado, tial ĝia produkto estas nomita "Jada Ĝiŭĉjŭan". En la sekva tago post nia alveno, ni vizitis fabrikon de brilantaj jadpokaloj. Enirinte la eksponejon de produktaĵoj de la fabriko, ni vidis jadan mondon: jadaj pokaloj, homfiguroj, bestoj kaj globetoj, kaj ankaŭ jadaj florumoj, braceletoj, penikuloj... Ĉio estas el jado. Kompreneble la plej okulfrapaj estas la brilantaj jadpokaloj. Tia pokalo estas tradicia artaĵo produktita de Ĝiŭĉjŭan kaj polure farita el jado de la monto Ĉjiljan kaj havas diversajn formojn, kiaj pokalo,



Moskeo en Uŭej

platkalo, antikvastila pokalo, kaj ankaŭ pokalo kun feniksa aŭ pava figuro, sume dekelkaj specoj grandaj kaj malgrandaj. Fakte, la pokalo ne vere eligas lumon, tamen ĝi estas travidebla. Sub lunlumo ĝi kun vino fariĝas pli kristala kaj brila. La diafana jada materialo por brilantaj jadpokalo, kun naturaj kaj simplaj vejnoj kaj la koloroj malhelverda, helflava, laktoblanka k.a., produktiĝas en la monto Ĉjiljan. Oni devas ekspluati ĝin sur neĝkovrita monto pli ol 4 000 metrojn alta super la marnivelo, pro tio la pokalo fariĝas valora artaĵo. En la vendejo de la fabriko ni vidis, ke laborantoj pakas brilantajn jadpokalojn por japana kliento, kaj sur la servotablo metiĝas skatoloj grandaj kaj malgrandaj. La japano sola aĉetis pli ol cent parojn da pokaloj.

Ni daŭrigis nian vojaĝon forlasinte la Okcidentan Koridoron kaj Ĝjajugŭan-pasejon.

okcidenten, kie vere estas dezerte. Ĝjajuguan estas la plej okcidenta pasejo de la Granda Muro. Ekster la pasejo etendiĝas antaŭ niaj okuloj senlima gobio ambaŭflanke de la ŝoseo. Se ne estus la telegrafaj stangoj dislokitaj ambaŭflanke de la ŝoseo, ni neniel povus imagi, ke vivas homoj en la profundo de tiu loko. Ĝuste tiuj stangoj gvidis nin al Dunhūang, oazo antikva kaj mistera.

Dunhūang estas la plej okcidenta urbo de la Okcidenta Koridoro. Sur la iam prospera antikva Silka Vojo ĝi havis sian brilan historion. Ĝis nun daŭre brilas la restaĵoj de la ĉina antikva civilizacio tie konservataj. Mogaŭ-ŝtonkavernaro en Dunhūang honorita kiel orienta arta trezorejo kaj aliaj historiaj restaĵoj altiris al si grandan nombron da turistoj en- kaj eksterlandaj. En 1978-1986 Dunhūang vizitis turistoj en- kaj eksterlandaj je pli ol 600 000 homfojoj. Ilia alveno multe akcelis la urban konstruadon de Dunhūang. Nun la antikva urbo havas 7 hotelojn kun kompare avangardaj ekipaĵoj kaj aliajn kompletajn servajn instal-

aĵojn, kiaj magazenoj, restoracioj k.a. En la strato-kruciĝa parko alte staras statuo de dancistino plukanta bivon post si kreita laŭ freskoj de Dunhūang. Multaj konstruaĵoj estas ornamitaj per figuroj de belulinoj ĉielen flugantaj, bivoplukantaj k.a. La tuta urbo spiras la odoron de Dunhūang-a arto. Vespere vendistoj de diversaj lokaj etmanĝaĵoj staras unu apud alia sur movoplena strato, kio vidigis novan turisman urbon.

Sude de la urbo Dunhūang staras Mingŝa-monto (ĉinlingve *ming* signifas bruon, kaj *ŝa* — sablon) formiĝinta el grajnosimilaj fluantaj sableroj. Ĝi longas pli ol 40 kilometrojn kaj altas ĉ. 1 700 metrojn. Ĝi kun ondiĝantaj apikaj pintoj, kvazaŭ tranĉitaj kaj hakitaj, estas grandioza, rigardate de malproksime. Oni diras, ke ĝi eligas bruon en ventado kaj pro tio ĝi ricevis sian nomon. Ĉu ĝi bruas aŭ ne, la vojaĝantoj venantaj al Dunhūang nepre venas tien por grimpi la monton. Kompreneble, ankaŭ mi ne estis escepto. Estis tute ekster mia atendo, ke grimpi la sablan monton estis tre

malfacile. Ofte okazis, ke mi grimpis unu paŝon antaŭen kaj retiriĝis duonpaŝon malantaŭen. Anhelante mi surgrimpis la monton kaj vidis la grandan subirantan sunon sinkanta okcidenten. La suno prilumis la dezerton, kiu reflektis ruĝan lumon.

Oni diras, ke neniam kune ekzistas dezerto kaj fonto, ĝuste same kiel neakordigeblaj fajro kaj akvo. Tamen ĉe la piedo de Mingŝa-monto mi vidis mirindaĵon, ke dezerto kaj fonto najbaras unu al la alia, tie estas Lun-arka Lageto. De mil jaroj la kristala fonto kiel novluno kuŝas ĉe la dezerto. Starante sur Mingŝa-monto, mi vidis grupon post grupo da kameloj ĉe la fonto. Mi informiĝis, ke ili estas pretigitaj aparte por turistoj. Mi pensas, ke la turistoj siatempe veturis sur la Silka Vojo per kameloj. Hodiaŭ oni, rajdante sur ili, certe pli bone ĝuas la lokan pejzaĝon.

La suno subiris. La turistoj disiĝis. Ĉirkaŭe regis kvieto, nur la ronda luno sur la ĉielo arĝente prilumis la teron... ■

Rikolto de vinberoj





Sur la antikva Silka Vojo



La loko fariĝis
gren-produkta
bazo

FOTO DE GAN HŪA




Ĉinaj kaj alilandaj
turistoj ĉe Mogaŭ-
ŝtonkavernaro

FOTO DE MA JUĈJAN



Brilantaj jadpokalaj



Mingša-monto en Dunhūang



En farado de brilanta jadpokalo



Kontraŭventa for-
sto en Gobio

Horloĝoj en la Imperiestra Palaco en Pekino

de FANG GŪOĜIN




Militveturila horloĝo farita en Britio

La horloĝo "Blankaj Simioj Prezentas
Persikojn" farita en Kantono



La horloĝo "Feoj Celebras Naskiĝtagon"




Horloĝo estas tempomezurilo. Antikvaj ĉinaj tempomezuriloj ĝenerale povas esti dividitaj en du specojn: unu estas gnomono kaj la alia klepsidro. Ili ambaŭ estas rudimentoj de horloĝoj. En Ĉing-dinastio (1644-1911) gnomono ĝenerale estis farita el rondforma ŝtona aŭ kupra plato kun 12 gradoj gravuritaj sur ĝia surfaco kaj kupra stangeto vertikale starigita en la centro de la plato. Oni metas la gnomonon sub la sunon tiel, ke ĝia meridiana linio estu paralela al longitudo, kaj la ombro de la kupra stangeto indikas la precizan tempon. La alia speco de antikva tempomezura metodo jam havas historion de 2 000 jaroj. En Ĉing-dinastio gnomono kaj klepsidro fariĝis ritaj ornamaĵoj en la palaco. Nun ili estas valoraj historiaj objektoj en la Muzeo de la Imperiestra Palaco.

En la dua duono de la 15-a jc. kaj la komenco de la 16-a jc. aperis mekanismaj horloĝoj en Eŭropo. En la 17-a kaj 18-a jc. oni jam povis fari precizajn horloĝojn, kiuj povis ne nur anonci aŭtomate ĝustan tempon, sed ankaŭ fari diversajn prezentadojn, aŭ ludi ĉarmajn melodiojn. La horloĝoj estas delikate kaj lukse faritaj. Ili aspektas diversforme kaj ĉarme, kun belaj inkrustaĵoj de diversaspecaj gemoj, kaj estas luksaj ornamaĵoj endomaj. Tiam por vigligi komercan kontakton Ĉing-registaro kelkfoje nuligis la marblokadon*, starigis doganojn kaj tiel akcelis la interŝanĝon de kulturoj kaj materialoj inter Ĉinio kaj aliaj landoj. Kaj tiel luksaj horloĝoj de la Okcidento eniris en Ĉinion tra diversaj kanaloj. La horloĝoj en la kortego de Ĉing-dinastio estis multe ŝatataj de la imperiestroj kaj nomiĝis memanoncaj horloĝoj. La malgranda kvanto da tributitaj horloĝoj ne povis kontentigi la bezonon de la kortego, kaj tial oni establis horloĝofarejon en la palaco kaj komencis fabriki horloĝojn en-

lande laŭ la imperiestra dekreto, aĉetante concernajn materialojn de eksterlande kontraŭ granda pago. Inter la horloĝoj faritaj por imperiestra familio estas granda horloĝo, kiu altas 5.85 metrojn kaj pezas 4 tunojn. De kiam surtroniĝis la imperiestro Daŭĝu-ang (1821-1850 sur trono), iuj eŭropaj horloĝaj kompanioj fondis en grandaj komercaj urboj de Ĉinio siajn filiojn kaj agentejojn, por munti kaj vendi diversajn horloĝojn en la ĉina merkato. Per tio ili akiris de Ĉinio grandan kvanton da oro kaj arĝento. La grandnombraj kuriozaj kaj luksaj horloĝoj konservataj en la Imperiestra Palaco de Ĉing-dinastio plejparte estis faritaj en Britio, kaj ankaŭ en Francio, Italio, Usono, Svislando, Germanio, Danlando kaj Japanio en la 18-a jarcento.

En la komenco de la 18-a jarcento Ĉinio komencis fabriki mekanisman horloĝon. La ĉefaj produktlokoj estis Kantono, Suĝoŭ kaj la Horloĝofarejo de la Kortego. Kantono estis siatempe la ĉefa komerca haveno malfermita al eksterlando. Ĝi havis vastan kontakton kun eksterlando kaj estis la plej grava kanalo, tra kiu importiĝis horloĝoj de la Okcidento. Tio estis favora faktoro, ke Kantono la unua fariĝis horloĝprodukta centro. Ĝiaj produktaĵoj estis multe influitaj de la okcidentaj en la formo kaj ornamado. La horloĝoj konservataj en la Muzeo de la Imperiestra Palaco faritaj de Kantono havas metalan framon kaj ĉin-stilan formon de pavilono, kiosko, pagodo kaj kalabaso. Estas movata de horloĝa mekanismo la prezentado de mekanikaj homfiguroj kaj aliaj objektoj, kiaj "Feoj Celebras Naskiĝtagon", "Blankaj Simioj Prezentas Persikojn", "Gruo kaj Cervo Ĝuas Printempon". La surfacoj de la horloĝoj estas orumitaj kaj inkrustitaj per emajlo, kolorigita eburajo, vitro kaj diversaj gemoj. Tia horloĝo, kiun oni kutime nomis "horloĝo de K.", havas




Gnomono

kompleksan mekanismon kaj luksan aspekton. Ili okupas gravan lokon en la horloĝa historio de Ĉinio.

En la komenco de la 18-a jarcento Suĝoŭ famiĝis pro sia prospera komerco, eminenta tekniko de farado de silkaĵoj, jadaĵoj, metalajoj kaj lakaĵoj. Ankaŭ ĝia horloĝa industrio estis multe disvolvita. La framo de horloĝoj de Suĝoŭ ĝenerale estis el rara ligno, kia pterokarpo, inkrustita per perlamoto, konkro, perlo, juvelo, metalajoj k.s. La horloĝoj fabrikataj en Suĝoŭ ne estis tiel variaj en la formo kiel horloĝoj de Kantono, tamen karakteriziĝis per la nacia stilo kaj originalaj ornamaĵoj, kiaj homaj figuroj, floroj, birdoj kaj diversaj bestoj, kun natura kaj homviva etoso. La horloĝoj de Suĝoŭ konservataj en la Imperiestra Palaco de Ĉing-dinastio estis elstaraj siatempe.

La Horloĝofarejo de la Kortego de Ĉing-dinastio havis severan regularon en la produktado. Antaŭ la produktado de ĉiu horloĝo oni devis unue prezenti ĝian skizon al imperiestro por lia sankcio. La horloĝoj faritaj sub la sankcio de imperiestro plejparte havis framon palisandran aŭ metalan, prenita formon de



Kupra klepsidro

palaco, turo, tamburo, florzavo, besto. La ornamaj desegnoj sur ili estis "Du Drakoj Ludas Perloglobon", "Avoj de Feliĉo, Altranĝeco kaj Longviveco", "Peonioj", "Astra Bildo" kaj raraj bestoj. Ĝiaj produktaĵoj karakteriziĝas per strikta strukturo, stilo de simpleco, antikveco kaj majesteco.

El la pli ol mil horloĝoj konservataj en la Imperiestra Palaco plejparto estis veninta de eksterlande, ĉefe de Britio. La horloĝoj de Britio kun framo el orumita kupra muldaĵo prenis formon de kastelo, preĝejo, pagodo kaj besto. La britaj horloĝoj racie projektitaj estas precizaj en irado kaj kompleksaj

en mekanismo. Ekz., pagodforma horloĝo havas multajn etaĝojn, kiuj povas aŭtomate sin levi kaj mallevi je difinita tempo. Vitraj floroj kaj kaskadetoj rotacias, movate de mekanismo. Floroj disvolviĝas kaj kuntiriĝas, akompanate de birda kanto, besta bleko aŭ muziko.

Horloĝoj fabrikitaj en Francio plejparte estas metalframaj, en formo de kastelo, preĝejo, ekrano, pokalo, pedalŝipo, lokomotivo kaj birdkaĝo. La produktaĵoj de Francio en la 19-a jc. aspektis pli modernaj, akceptinte formon de la tiamaj industriaj produktaĵoj. Tiaj formoj de horloĝoj estis malofte aplikitaj en aliaj landoj.

La kortego de Ĉing-registaro kolektis grandan nombron da diversaj horloĝoj. La nunaj 180 eksponataj estas elektitaj el la mil horloĝoj konservataj de la Muzeo de la Imperiestra Palaco. Multaj el la horloĝoj estas ne plu troveblaj en siaj produktolandoj. ■

** Tio aludas la politikon de Ĉing-registaro, ke la registaro malpermesis al neregistaraj komercaj ŝipoj negoci eksterlande kaj difinis kelkajn havenurbojn speciale por komerco de fremdlandaj komercaj ŝipoj.*



NEFORGESEBLA AMIKECO

— Pri vizito de ĉinaj esperantistoj al Japanio

Kiel reprezentantoj de la Ĉina Esperanto-Ligo, la redakcio de El Popola Ĉinio kaj la Esperanta Sekcio de la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio ni tri ĉinaj gesperantistoj faris viziton al Japanio. La tago de nia ekvojaĝo estis la 27-a de aŭgusto, 1987, kaj proksimiĝis jam la vesper-krepusko, kiam ni atingis Tokion.

Ĝuste kiam ni venis al la flughavena atendejo kaj rigardis ĉirkaŭen por trovi la eventuale altentitan verdan flageton aŭ alian E-signon, rekte al ni iris ridetante niaj malnovaj geamikoj ges-roj Kaneko kaj s-ro Ragnar Bal-dursson. Sekve, ni jam dronis en atmosfero de varmega amikeco tuj post kiam ni paŝis sur la teron de Japanio.

Neniu el ni antaŭe vizitis Japanion, kaj nun ni venis por ĉeesti, laŭ invito, la 74-an Kongreson de Japanaj Esperantistoj, kiu estis ankaŭ kongreso por la centjara jubileo de Esperanto. La kongreso, sub la aŭspicioj de la metropolo Tokio kaj la ambasadorejo de Pollando en Japanio, malfermiĝis en la posttagmezo de la 28-a de aŭgusto. La totala nombro de la partoprenantoj estis 718, inkluzive de 41 eksterlandaj ĉeestantoj el Aŭstralio, Britio, Ĉinio, FR Germanio, Italio, Islando, Nederlando, Brazilo kaj el Hongkong, Sud-Koreio kaj Israelo. Tiu ĉi kongreso estis ankaŭ la plej granda Esperanto-kongreso, kiu okazis en Azio dum la jaro 1987. Ĝin salutis la prezidanto de la kongreso kaj la vicprefekto de

Tokio. Kiel reprezentanto de partoprenantoj el eksterlando kaj en la nomo de la Ĉina Esperanto-Ligo, la redakcio de El Popola Ĉinio kaj la Esperanta Sekcio de la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio salutis unu el la ĉinaj ĉeestantoj. Li esprimis koran gratulon al la kongreso kaj deziris al la japanaj kolegoj grandajn sukcesojn en ilia klopodo por internacia amikeco kaj paco dum la dua jarcento de Esperanto.

Dum la kongresaj tagoj okazis diversaj labor- kaj fak-kunsidoj, inter kiuj estis la ĝenerala kunsido de JEI, kongresa universitato, lerno-kursoj de Esperanto kaj kunsidoj de sciencistoj, medicinistoj kaj komputistoj kaj de virinoj, veteranoj kaj studentoj.

Ankaŭ okazis du-foje kunvenoj

En la 74-a Kongreso de Japanaj Esperantistoj



de UEA sub la prezido de ĝia vicprezidanto s-ro Yosimi Umeda kaj ĝia ĝenerala direktoro s-ro Simo Milojević, kaj la ĉeestantoj interŝanĝis opiniojn pri la E-movado en Azio.

En la posttagmezo de la 29-a estis okazigita la kunveno de amikiĝo kun ĉinoj, kiun ĉeestis 70 partoprenantoj. Multaj iris al la podio kaj donis parolojn, kaj inter tiuj troviĝis s-ro Eizo Ito. Li parolis en profunde sincera tono kaj esprimis la deziron, ke la japanaj kaj ĉinaj esperantistoj plioftigu sian interfluon. S-ano Mori Singo, peranto de EPCĈ, esperis, ke la japanaj kaj ĉinaj samideanoj ne limigos sin nur al korespondado aŭ interŝanĝo de poŝtmarkoj, sed starigos pli fortan interligon. La aliaj parolintoj esprimis siajn kontentecon kaj admiron pri EPCĈ, kaj ankoraŭ aliaj donis kritikojn. Unu el la lastaj rimarkigis, ke mankas varieco en la tipografia formo de la titoloj de la artikoloj de EPCĈ kaj sekve ofte montriĝis monotoneco. Alia atentigis, ke estas preferinde ne ŝanĝi tro ofte la transskriban sistemon de ĉinaj propraj nomoj. Multaj sentis amikan prizorgemon pri la cirkul-kvanto de EPCĈ en Japanio kaj faris

proponojn pri la pligrandigo de la nombro de abonantoj.

En la antaŭtagmezo de la 30-a estis prezentita en la kongresejo la filmo "La Tero post Nuklea Milito" farita de NHK (Japana Brodkasta Asocio). Unue salutis ĉina esperantisto, kiu menciis interalie la kruelajn okazintaĵojn dum la Dua Mondmilito kaj emfazis la necescon kaj gravecon de la kunlaboro inter diverslandaj popoloj por sekurigi pacon kaj kontraŭstari nuklean militon.

Post la fermiĝo de la kongreso ni veturis al Sizuoka en la 1-a de septembro. Veninte al la loĝejo de s-ro Rokuro Tokuda, multjara amiko kaj peranto de EPCĈ, ni estis fotitaj kune kun niaj japanaj samideanoj antaŭ la pordo. S-ro Tokuda, kiu estis ripozanta post malsaniĝo, volis akcepti nin tuj post kiam li informiĝis pri nia alveno. Ĝoje ni venis sinsekve en la enirejon de lia domo, kaj ges-roj Tokuda atendis nin ĉe la pordo de sia ĉambro. S-ro Tokuda estis en bona humoro, kvankam li ŝajnis iom malforta. Sendube li trovis nian viziton agrabla, dum por ni mem ankoraŭ estis plezuro intervidiĝi kun la du gesinjoroj. Por ne ĝeni ilin tro multe ni restadis mallonge, deziris al s-ro Tokuda


perfektan resaniĝon kaj diris al ili ĝis-revidon.

Tagmeze la sizuokaj gesamideanoj regalis nin per japanstila tagmanĝo. Ĉiuj sidiĝis sur tatamo, prezentis sin mem unu post alia kaj interparolis en gaja atmosfero. Post la manĝo ni iris al kelkaj lokaj vidindaĵoj kondukate de niaj gastigantoj.

Proksimiĝis la vespero, kiam ni venis al Nagoja la saman tagon. Kelkaj japanaj geesperantistoj estis atendantaj nin, kaj inter ili troviĝis nia malnova amiko s-ro Takenaka Ĝisuke kaj ankaŭ s-ro Nagase Yosikatu, kiuj ambaŭ vizitis Ĉinion antaŭ du jaroj. Tuj poste, ni ĉeestis bankedon aranĝitan en nia honoro, kaj s-ro Nagase donis tre entuziasman paroladon. Tiu-vespere s-ro Takenaka estis en tre gaja humoro kaj montriĝis vere vigla malgraŭ sia granda aĝo. Unu el la ĉeestantaj japanaj gesamideanoj elprenis bambuan fluton konsistantan el du partoj kaj kunigante ilin li ludis per ĝi belan melodion en fervora aplaŭdado. Post la bankedo s-ro Nagase kondukis nin al kafejo, kaj tie ni longe interbabilis ĝis malfrua horo.

La sekvantan tagon s-ro Nagase kondukis nin al Chubu-

La kunveno de amikiĝo kun ĉinoj



universitato, kie sukcese funkcias komputersistemo de tradukado japan-anglen-esperanten. S-ro Hiroshi Katsumori, vicprezidanto de la universitato, estas ankaŭ esperantisto kaj li tre afable kaj fervore akceptis nin. La laborantoj en la komputersistemo klarigis al ni la funkcion de la tradukprocedo, kaj ni mem faris kelkajn provojn.

Ni veturis al Kioto la saman tagon kaj atingis tiun antikvan urbon antaŭ la vespero. S-ino Takeuti Tomiko, kiu longjare plenumas perant-laboron por EPC, atendis nin en la stacidomo en akompano de alia japana samideano. Tiu-tage s-ro Takeuti Yosikazu restadis en Tokio pro profesiaj aferoj kaj s-ino Takeuti sola akceptis nin, tamen ni estis kore dankaj pro ilia entuziasma gastigado. Post nia alveno al ilia domo s-ro Esaki Masayasu, nia alia peranto, ankaŭ venis kune kun sia amiko — alia esperantisto. Ni ĉirkaŭe sidigis kaj longe interparolis pri la demando de disvastigo de ĉinaj E-eldonaĵoj kaj la progreso de Esperanto inter japanaj gejunuloj. Matene de la 3-a, reportero el la Osaka-oficejo de Ĵurnalo Mainiti intervjuis nin, kaj en la 6-a aperis en tiu ĵurnalo mallonga informo kun foto pri nia vizito al Japanio kaj pri la nuna stato de E-movado en Ĉinio.

En la vespero de la 3-a ni iris al la oficejo de la Kansaja Ligo de



S-ro Mori Singo donas opinion pri distribuado de EPC.

Esperanto-Grupoj, kie ni intervidigis kun s-ro Mijamoto Masao, s-ro Sakamoto Syōzi kaj kelkaj aliaj japanaj gesamideanoj. Dum longaj jaroj niaj japanaj amikoj en tiu ligo faris elstaran laboron en la kampo de kompilado kaj eldonado de E-libroj.

En la 4-a s-ro Sakamoto Syōzi kondukis nin al kelkaj vizitindaj lokoj en Osaka, kaj posttagmeze ni reflugis hejmen al Ĉinio. Ĝis revido, karaj japanaj gesamideanoj. Dum tiu ĉi mallonga, naŭtaga vizito la afabla gastigado

fare de japanaj geesperantistoj kaj ilia komplezemo, la beleco kaj abundeco montriĝintaj ĉie en Japanio kaj la inteligenteco kaj sindediĉemo de la japana popolo — ĉio ĉi tio donis al ni ege profundan impreson. Por plue antaŭenigi nian amikecon kaj plifortigi nian komunan aferon de paco, estas sendube necese, ke la ĉinaj kaj japanaj esperantistoj starigu ankoraŭ pli intiman rilaton kaj daŭre marŝu mano en mano sur la vojo de kunlaboro. ■

KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: 1 internacia respondkupono por 5 vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: 1 intern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* 25-j. fraŭlo Yang Hongji dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj, kolektas pk, pm. kaj

Esp-ajojn, precipe kun tiuj, kiuj vizitas Ĉinion. Adr.: Anhui Shi Jie Yu Zhuan Ke Xue Xiao, Hefei, Anhui, Ĉinio.


* Entreprenisto de iu granda kompanio s-ro Su Baisen dez. kor. kun samaj fakuloj el la evoluantaj landoj en Esperanto pri administrado kaj entreprenado. Adr.: Su Baisen, Zong Xie Jie 31, Bengbu Shi, Anhui, Ĉinio.

* 31-j. instruisto dez. kor. tm. pri filozofio, antropologio, psikologio,

politiko, literaturo kaj interŝanĝas eldonaĵojn pri tiuj temoj. Ankaŭ miaj lernantinoj vol. amikiĝi kun la samaĝuloj (10-18-j.) tm. Esperante aŭ angle. Adr.: Xiao-chun Hu, Yijia-zhuang Lu 92-401, Wanxian, Sichuan, Ĉinio.

* 38-j. s-ino laboranta en fabriko de cemento dez. kor. kun esperantistoj el Eŭropo, precipe el Danlando kaj kolektas poŝtmarkojn kaj diversajn bildkartojn. Adr.: S-ino Yang Kailan, Bai Ma Shan Shui Ni Chang, Wuhu, Anhui, Ĉinio.

Ĉinaj Esperanto-poŝtstampoj



Esperanto-poŝtstampoj estas kolektindaj Esperanto-filatelajoj, same kiel Esperanto-poŝtmarkoj, memorigaj kovertoj kaj kovertoj kaj poŝtkarto kun surprisita poŝtmarko. Tial esperantistoj de diversaj landoj, precipe tiuj de la landoj, kie viglas la Esperantomovado, ofte klopodas fari Esperanto-stampilojn memore al gravaj festoj kaj eventoj. Ĝis la fino de 1985 jam aperis 125 Esperanto-poŝtstampiloj en Pollando, 98 en Hungario, po pli ol 30 en Brazilo, FR Germanio, Italio kaj Jugoslavio kaj po pli ol 20 en Belgio, GDR, Hispanio, Japanio kaj Svedio.

La plej frua Esperanto-poŝtstampilo aperis en 1912, okaze de la 8-a UK en Krakovo, Pollando. Tion sekvis la Esperanto-poŝtstampiloj de Svislando, Francio kaj Hungario respektive en 1913, 1914 kaj 1918.

Esperanto-poŝtstampiloj aperis en Belgio, Brazilo, Britio, Ĉeĥoslovakio, Danlando, Finnlando, Germanio, Italio, Japanio, Nederlando, Sovetunio kaj Svedio en la 20-aj aŭ 30-aj jaroj de la kuranta jarcento.

En Ĉinio la unua Esperanto-poŝtstampilo aperis en 1985, kiam okazis la Unua Ĉina Kongreso de Esperanto en la urbo Kunming. Sed la afero iris pli rapide en la lastaj du jaroj, precipe en 1987, la jubilea jaro de Esperanto. En la 26-a de julio 1986 Ĉinio faris 4 poŝtstampilojn por la 71-a UK en Pekino; en la 26-a de julio 1987, la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de Ĉinio emisiis memorigan Poŝtmarkon por omaĝi al la centjariĝo de Esperanto. Samtempe 22 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj faris 34 Esperanto-poŝtstampilojn. ■

KOREKTOJ

1. Aldonu "kolora" post la vorto "tiurilata" en la teksto sub la titolo "KATALOGO DE ESPERANTAJ POŝTMARKOJ", sur p. 20, en la oktobra numero, 1987.

2. En la malsupra foto sur p. 13 de la novembro numero, 1987, la 5-a kaj 6-a kovertoj en la unua vico kaj la 3-a en la dua vico de maldekstre, ne estas Esperantaj unuataĝaj kovertoj, sed neoficialaj Esperantaj poŝtkartoj kaj kovertoj.

3. Anstataŭ la unua frazo sub la titolo "Esperantaj Filatelajoj en Ĉinio" sur la sama paĝo legu "La Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de la Ĉina Popola Respubliko kaj ĝiaj subaj organizoj emisiis multajn filatelajojn okaze de la 100-jariĝo de Esperanto."

**SIMPOZIO PRI E-
INSTRUPROGRAMO**

Post kiam la "E-kurso" taŭga por ĉinaj altlernejoj estis aprobita de la eduka departemento de Ĉinio en novembro 1985, oni urĝe bezonis ellabori instruprogramon de la dua fremda lingvo Esperanto por altlernejoj kiel normon por instrui kaj ekzameni. Post pli-ol-du-jara preparado la nomita simpozio okazis, laŭ la direktivo de la Ŝtata Eduka Komisiono de Ĉinio, en la Ŝji'an-a Fremdlingva Instituto oktobre de 1987.

Ĝin ĉeestis respondeculoj de la Redakta Komisiono pri Fremdlingvaj Instruaĵoj por Altlernejoj,

Ĉina Esperanto-Ligo, Redakcio de "El Popola Ĉinio" kaj instrua kaj esplora Esperanto-sekcio de la Ŝanhaja Fremdlingva Instituto, kaj spertaj profesoroj kaj fakuloj el la Ŝji'an-a Fremdlingva Instituto, Pekina Lingva Instituto, Poŝt-Telekomunika Instituto de Ŝji'an, Nordokcidenta Normala Instituto de Langŝou, Centra-ĉinia Normala Universitato, Sud-ĉinia Normala Universitato, Gŭangŝji-a Nacimalplimulta Instituto, Nankina Universitato, Daljan-a Politekniko, Ĝjnan-universitato kaj Ŝji'an-universitato.

La ĉeestantoj, viglaj kaj aktivaj, donis nemalmultajn utilajn opiniojn. La simpozio pretigis

malnetan tekston de la instruprogramo post diskuto kaj elmetos ĝin al la eduka komisiono por peti la sankcion. La E-instruprogramo ludos gravan rolon en la E-instruado de altlernejoj de Ĉinio.

ESPERANTA STAMPILO

Por adaptigi al la emisio de la memoriga poŝtmarko dediĉe al la 13-a Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio, la poŝtofiĉejo de Ĉangŝu, Ĝjansuprovinco faris Esperantan memorigan stampilon. Ĝi estis uzata post la malfermo de la kongreso, kiu okazis en oktobro 1987. Estas la unua fojo por Ĉinio, ke oni uzis

En la simpozio pri E-instruprogramo





La fondkunveno de la Zaŭĝuang-a E-Asocio

Esperanton sur la stampilo en la grava evento neesperanta.

La projektinto de la stampilo estas esperantisto.

LA ZAŬĜUANG-A E-ASOCIO FONDITA

En aŭgusto 1987 la nomita E-asocio oficiale fondiĝis en la urbo Zaŭĝuang, Ŝandong-povinco. Respondecoj de la Propaganda Departemento, Soci-Scienca Federacio kaj Soci-Federacia Instituto ĉeestis la fondkunvenon kaj donis salutvortojn al ĝi.

La kunveno elektis Ĝu Sijing,

direktoron de la Zaŭĝuang-a Instruista Kolegio, kiel prezidanton de la asocio kaj starigis ĝian unuan konsilantaron. En septembro okazis la unua kunveno de la konsilantaro kaj ĉiuj ĝiaj membroj diskutis pri la tagordo kaj laboro de la E-Asocio.

KALIGRAFIO-INTERŜANĜO INTER ĈINAJ KAJ JAPANAJ ESPERANTISTOJ

Laŭ invito de la Ŝji'an-a E-Asocio, fama japana kaligrafo-esperantisto s-ro Masaaki Yoshioka kaj tri japanaj esperantistinoj interparolis kun laborantoj de la Ŝji'an-a E-Asocio kaj la Ŝji'an-a

Kaligrafia Asocio kaj faris interŝanĝon de kaligrafio.

S-ro Masaaki Yoshioka, kiel bona amiko de la Ŝji'an-a E-Asocio, improvizis post la interparolo dekelkajn verkojn kun la surskribo "Eterna Amikeco" kaj donacis ilin al la Ŝji'an-a E-Asocio kaj la Ŝji'an-a Kaligrafia Asocio.

LA 60-A SAT-KONGRESO

De la 22-a ĝis la 29-a de aŭgusto, 1987, 400 geesperantistoj el 20 landoj venis al la urbo Bulonjo ĉe Maro por partopreni la 60-an SAT-Kongreson okaze de la centjariĝo de Esperanto. La kongresurbo estas fame konata pro la unua Internacia Esperanto-Kongreso en la jaro 1905 kun la ĉeesto de Ludoviko Lazaro Zamenhof.

La inaŭguro okazis en la urba teatro, la sama salono, en kiu la kreinto de la Internacia Lingvo faris sian faman paroladon antaŭ 82 jaroj. Prof. Gaston Waringhien deklamis famajn eldirojn de Zamenhof.

Dum la kongreso okazis ankaŭ la inaŭguro de la monumento kun busto de L.L. Zamenhof starigita sur la placo "Zamenhof" en Bulonjo ĉe Maro, kaj la ampleksa libroservo estis bone organizita de kamarado Bernard Schneider.



La emblemo de la Dua Kultura Esperanto-Festivalo



Esperanta memoriga stampilo farita de la poŝtofiĉejo de Ĉangŝu okaze de la 13-a Tutlanda Kongreso de KPC

Radio, televido kaj gazetoj plurfoje raportis favore al la okaziĝo de la kongreso.

La 61-a SAT-Kongreso okazos de la 6-a ĝis la 13-a de aŭgusto 1988 en la urbo Campos do Jordao en Brazilo.

ALIĜU AL LA 44-A INTERNACIA JUNULARA KONGRESO

La 44-a Internacia kongreso de TEJO okazos de la 16-a ĝis la 23-a de aŭgusto 1988 en la Zagreba Mezlerna Centro por Konstruteknikistoj. Tiu centro havas 4 loĝdomojn kun 650 litoj, unu vastan teatran salonon, 2 domegojn por sporta aktivado kaj unu piedpilkan ludejon. Oni planas akcepti 600 ĝis 1 000 gejunulojn. La ĉeftemo de la kongreso estas "Komunikado en la 21-a Jarcento". Fruaj pagintoj de la kotizo ĝuos certan rabaton. Pagu al Banko Mess, Hope, Postbus 749, NL-3000 As Rotterdam, Konto n-ro 25, 52.89.804 krel-z. Poŝtĉekkonto (nederlanda): N-ro 62 73 37 krel-z.

LA DUA KULTURA ESPERANTO-FESTIVALO

Inter la 18-a kaj la 21-a de aŭgusto 1988 okazos la dua



La membroj de LKK de la 44-a Internacia Junulara Kongreso

Kultura Esperanto-Festivalo en Lund, Svedio. KEF strebas al prezentado de originale verkitaĵoj en Esperanto, kaj por tio bezonas muzikistojn, artistojn kaj verkistojn proponi sian kontribuon por realigi ĉi-jaran festivalon.

La unua Kultura Esperanto-Festivalo okazis pasintjare en la

malnova urbo Uppsala en Svedio. Oni opinias ĝin "mirinda programa amplekso kaj vario", kaj ke "vere temis pri la Esperanto-kulturo". Tio donis al la organizantoj forton por la preparaj laboroj de la dua festivalo.

Pliajn informojn petu ĉe KEF, Brunngatan 21, S-111 38 Stockholm, Svedio.

La foto montras geesperantistojn de Campina Grande, Brazilo, kiuj partoprenis en la parado de la sendependeco de Brazilo la 7-an de septembro 1987.



“MIRINFANOJ” EN UNIVERSITATO



Ĉefministro Gaŭ Zijang kaj geknaboj-studentoj

Estis ekzameno por esploristo-studentoj en Ĉinio antaŭ sep jaroj. La rezulto montris: 17-jara Ĉen Ĝongŝeng, triaklasa studento de la Ĉina Universitato de Scienco kaj Tekniko, gajnis la unuan lokon kaj estis akceptita kiel biologia pordoktoreca studento sendota de la universitato

por lerni alilande. Sed li ne ĝojis pri tio: Li opiniis, ke la lando, kie li lernos, estas la dua- aŭ triagrada biologio en la mondo. Li deziris lerni en lando kun la plej alta biologia nivelo en la mondo. Malgraŭ, ke oni opiniis lin iom “aroganta”, la universitato aprobis lian peton kaj prezentis al li rigoran

kondiĉon: Se li malsukcesos en la ekzameno tiurilate, lia esploristo-studenteco estos nuligita kaj li lernos en la 4-a klaso. Lia ĉefinstruisto maltrankviliĝis pri li, sed li konsentis la kondiĉon ĝoje. Fine li trapasis la du novajn ekzamenojn per 212 poentoj. Oni demandis, kial li tion riskis. Li diris: "Kial mi ne lernos biologion de la plej alta nivelo, sed anstataŭe tiun de la dua aŭ tria grado? Por atingi la unuan gradon, oni bezonas multan tempon, verŝajne oni ne povos efektiviĝi tion dum la tuta vivo. Se mi ĉi-foje malsukcesus, tio pruvus, ke mi estas ne kapabla kaj mi devas daŭrigi mian lernadon en la 4-a klaso." Jam en juna aĝo li faris tiom malproksim-vidan respondon. Tio ja estas admirinda.

Ĉen Ĝongŝeng estas nur ekzemplo. En la knaba klaso de la universitato multaj talentaj geknaboj ricevas edukon iom malsaman ol tiu farita por la ordinaraĵ studentoj. La knaba klaso, fondita en 1978, jam funkciigis 11 staĝojn. En la naŭ jaroj el ĝi diplomitiĝis 190 studentoj, el kiuj 143 studas en-kaj eksterlande por magistrecado aŭ doktoreco. La meznombra aĝo de ĝiaj 407 studentoj estis malpli-ol-15-jara ĉe ilia studentaĝo. El ili la plej juna nur 11-jara. Ili ĉiuj ne estis abiturientoj, tamen ilia nivelo estis egala al tiu de la eminentaj abiturientoj.

ESCEPTA AKCEPTO

La studentoj de la knaba klaso rigardataj kiel "mirinfanoj" venis de ĉiuj anguloj de la lando, el familioj de instruistoj, inĝenieroj, kuracistoj, laboristoj, kamparanoj kaj ŝtatoficistoj, kun malsamaj kondiĉoj en la vivo kaj lernado. En kiuj kampoj ilia inteligenteco superis tiun de la ordinaraĵ knaboj? Kiamaniere ili estis trovitaj kaj akceptitaj en la altan lernejon?

Ni komencu tion de iu letero: Oktobre de 1977 instruisto de la Ĝjangŝi-a Metalurgia Instituto skribis al ŝtata respondeculo pri edukado kaj rekomendis 13-jaran "mirinfanon" Ning Bo. En la letero li skribis, ke unujara Ning Bo povis rakonti historion, dujara parkere legi pli ol 30 poemojn kaj trijara kalkuli ĝis 100; kvarjara li ellernis pli ol 400 ideogramojn, kvinjara ekvizitis elementan lernejon kaj lernis bonege kaj sesjara povis legi ĉin-medicinajn, scienc-popularajn kaj historiajn librojn kaj ankaŭ antikvajn poemojn. Kiam li estis 13-jara, li povis verki poemojn kaj posedis kompare multajn sciojn pri matematiko, fiziko, medicino, literaturo kaj vejĉio. La rekomendanto sincere petis, ke la koncerna instanco faru al tiaj infanoj laŭeble fruan altan edukon.

Post la publikigo de la letero en ĵurnalo, multaj similaj leteroj estis senditaj de diversaj lokoj tra la lando al la eduka ministerio, la Ĉina Akademio de

Sciencoj kaj la Ĉina Universitato de Scienco kaj Tekniko.

Enketo montris, ke proksimume 100 000 geknaboj de la lando posedas inteligentajn trajtojn mankantajn al la ordinaraĵ geknaboj:

Unue, ili havas superan genion kaj inteligentecan. Ŝje Janbo, 11-jara kvinaklasa elementlerneĵano de Hunan-provinco, povas laŭ formulo elkalkuli la unuan kaj duan kosmajn rapidojn. 12-jara Ĝou Ŝudong de Ĝjangsu-provinco gajnis la unuan lokon en la provinca matematika konkurso. 15-jara Ŝja Ŝjaŭgŭang de Ŝanŝji-provinco akiris 100 poentojn en la tutlanda ekzameno pri matematiko por alta lernejo. Li skribis bonorde sur la papero kaj donis striktan logikon kaj rezonadon al la respondo. La kontrolanta instruisto diris: "Mi povis trovi nenian mankon en ĝi por dekalkuli eĉ unu poenton."

Due, ili estas diligentaj en laboro kaj spritaj en pensado. Feng Longlong de Nankino en la infanaĝo ŝatis demando pri naturaj fenomenoj kaj ĉirkaŭaj objektoj. Enirinte mezlernejon, li ne kontentis pri kompreno kaj parkerigo de teoremoj kaj formuloj, sed atente pensis por trovi la reciprokajn rilatojn inter scioj. Ekz., lernante sumo-diferencan formulon, kaj duobl-angulan formulon kaj aliajn de trigonometrio, li kaptis en sian memoron nur plej fundamentajn formulojn per pensado kaj indukto por solvi problemojn. Legante referencajn librojn, li ŝatas kompari problemojn kaj ofte pensas pri malfacilaj problemoj. Renkontante malfacilojn en lernado, li neniam senpripense sin turnas al instruisto por peti helpon, sed mem solvas ilin dank' al pensado kaj konsultado de referencaj libroj.

Trie, ili estas diligentaj en memlernado kaj

Junaj studentinoj



fortaj en sciakcepto, kompreno kaj memoro. Ĉen Lej de la urbo Ĝoukoŭ en sia 6-jaraĝo ellernis en tri monatoj 3 000 ideogramojn kaj povis legi "Fabeloj de Grimm" kaj "Fabloj de Ezopo". Li ellitiĝis je la 7-a matene, enlitiĝis je la 9-a vespere kaj tagmeze ne siestis. Li ludis nur unu horon posttagmeze kaj diligente memlernis en ĉiu alia tempo. Nur en unu jaro li finlernis ĉiujn objektojn de la elementa lernejo. Naŭjara li finlernis mem ĉiujn objektojn por malsupera mezlernejo helpate de siaj gepatroj kaj eniris kompare bonan superan mezlernejon en la hejmloko kune kun sia pliaĝa fratino, trapasinte la ekzamenon. Tio estis por li la unua fojo viziti lernejon. Kiam li lernis la lecionojn por la unua klaso en supera mezlernejo, li studis la lecionojn por la dua klaso post hejmenreveno. Post unujara lernado li jam komencis lerni en la 3-a klaso per elstaraj notoj. Li malofte ripetis sian demandon. Unufoja respondo jam sufiĉis por ke li komprenu, asimilu kaj kaptu la esencon.

La enketo montris ankaŭ, ke tiuj geknaboj efektive havas bonan naturdotitan kvaliton kaj samtempe la postnaskaj eduko kaj influo ludas gravan rolon. La ekzisto de granda nombro da geknaboj kun supernormala inteligenteco defiis la tradician edukan sistemon de Ĉinio. Se oni postulas, ke ili vizitu altan lernejon nur post 12-jara lernado en element- kaj mez-lernejoj, tio sendube estas tre granda perdo de tempo kaj kapabluloj kaj


ne konformas al la bezono de la ŝtato en la moderniga konstruado. Laŭ la principo "elkulturi kapablulojn pli frue, pli rapide kaj pli bone" kaj sankciite de la ŝtata eduka departemento, la Ĉina Universitato de Scienco kaj Tekniko fondis en marto 1978 la unuan knaban klason de Ĉinio. La "mirinfanoj" fine estis akceptitaj, trapasinte rigorajn ekzamenojn de la ŝtato kaj universitato.

LAŬTALENTA INSTRUADO

La knaba klaso estas fondita laŭ principo de oficiala fakultato de la Ĉina Universitato de Scienco kaj Tekniko kun 5-klasa sistemo. Post la 9-jara praktiko la knaba klaso iom post iom ellaboris serion da instruaj metodoj konformaj al la fiziologiaj, psikaj kaj inteligentaj karakteroj de knabo-studentoj.

En la unuaj tri jaroj ili lernas ĉefe fundamentajn lecionojn, poste ili libere elektas fakultaton kaj fakon laŭ siaj ŝato, volo kaj faka fortaĵo. La universitato kulturas en ili la kapablon memlerni kaj krei, permesas al ili studi en du fakultatoj aŭ lernejoj, transalti klason, antaŭdate sin anonci por fariĝi esploristo-studentoj post ekzameno kaj studi por du universitataj rangoj. La universitato ellaboras instruan planon aparte por

Ning Bo (maldekstre) en vejĉi-ludo kun ŝtata konsilanto Fang Ji



elstaraj studentoj.

En la pasintaj jaroj la klaso sukcese praktikis edukon kaj administran metodon al la lernado, sanprotektado kaj vivo de la geknaboj, inkluzive aldonon de lecionoj por larĝigi la vidkampon de la geknaboj kaj vigligi ilian penson. Ĉar iliaj sociaj spertoj estis nesufiĉaj, perceptaj scioj malmultaj kaj sciavideco forta, la klaso aldonis la lecionon pri la ĉina lingvo, faris prezentadon de diversaj fakoj, raportojn pri popularaj sciencoj, sciencaj informoj kaj starigis kursojn pri literaturo kaj verkado, arto kaj aprecado. Aŭskultinte la kurson pri la moderna biologio, tri studentoj de la unua staĝo de la knaba klaso pliŝatis biologion kaj elektis ĝin kiel sian fakan lecionon. Dank' al sia eminenta studado ili veturis al aliaj landoj kaj eklernis tie kiel biokemiaj esploristo-studentoj post ekzameno.

La knaba klaso alprenis ankaŭ jenajn rimedojn:


Koncerne la kulturon de kapablo memlerni. Surbaze de laŭpaŝa lernado la klaso kuraĝigas studentojn fari antaŭtempnan memlernadon kaj donas al ili direktadon kaj helpon. En la klaso oni organizas diversajn memstudajn grupojn pri fremda lingvo kaj matematiko, kiuj sub direktado de instruistoj aktive disvolvas antaŭtempnan lernadon, solvas malfacilajn problemojn, faras diskutadon kaj funkciigas nigra-tabulan gazeton, kio bonefike akcelas la memlernadon de la klaso.

Koncerne la instruon enhavon. Tiuj studentoj estas fortaj en scioasimilado kaj la instruistoj pliigas malfacilecon kaj kvanton de lecionoj praktike. Ekz., matematika instruisto ofte pliigas en la lecionohoro ion novan mankantan en la lernolibroj.

Koncerne la instruon administradon. Post unujara lernado la studentoj progresis malsamgrade, iuj multe superis aliajn en la lernado. Pro tio la klaso laŭeble faras etkursan lecionadon kaj aplikas apartan edukon planon por elstaraj studentoj.

Koncerne la kulturon de laborkapablo. Tiuj studentoj estas malfortaj en sendependa laborado. La klaso do aranĝas pli multajn lecionojn, por ke ili havu pli da ebleco mem fari ekzercojn. Inter la lecionoj estas komputila tekniko kaj softvara manipula tekniko, "Fundamenta mezurado pri tempa longeco", "Fotografia mezurado pri libere falanta korpo", "Holografio" kaj aliaj eksperimentaj lecionoj.


Koncerne la lernan konkuron. Por stimuli konkuron de la studentoj la universitato elektas elstarajn studentojn el la nove akceptitaj ordinara studentoj, organizas ilin en grupon sen fakultata nomo kaj lasas ilin lerni kaj vivi kune kun la novaj



Fratoj Ĉen Ŝjaŭjang (meze) kaj Ĉen Ganjang (dekstre) de knaba kurso kaj ilia ĉefinstruisto Ĝu Jŭan

geknabo-studentoj, por ke la lastaj ĉiam havu movforton kaj premforton en lernado.

Dank' al la praktiko de tiuj rimedoj, la klaso progresis okulfrape. Tion montras la jena diagramo:



La diagramo vidigas la meznombrian poentaron de lernado en kvin semestroj ekde 1979 por geknabo-studentoj kaj studentoj de la fizika fakultato, kiuj komencis lerni en la universitato samjare. La lecionoj lernitaj kaj la ekzamenaj demandoj de la klaso kaj la ordinara klaso de la fizika fakultato

(Daŭrigo sur p. 53)

Fero dolĉa, fero fiadora (Novelo)

En la okuloj de infanoj ŝi estis mistera virino, ĉar ŝi povis ŝanĝi ŝtalan fatrason en minĉarojn. Por infanoj, ŝtalo estas la plej malmola objekto en la mondo. Por fari fajlilon aŭ alian ŝtalpecon tranĉileto, ili forte frotis ĝin sur cementa planko ĝis fajreroj disĵetadis sin, sed ĝi neniom aliformiĝis. Por fari ŝtalan draton pikilo, ili devis froti duontagon.

Ŝi celis per nitmaŝino la ŝtalaĵon, sur kiu ŝi rajde staris. Tuj kiam granda arda nito falis apud ŝia piedo, leviĝis blanka fumo de sur la olea tero. Knabo apude staranta kaptis la niton per forĝtenaĵo, metis la niton en la pretigitan truon, kunpremante siajn dentojn kaj flanken turninte sian kapon. Ŝi forte premis la nitmaŝinon sur la niton, kaj ŝia korpo kribre tremis laŭ la takto de la maŝino. Ŝi klare sentis, ke la arda nito rapide mallongiĝis sub la martelado de la nitmaŝino, ĝia kapo rondiĝis kaj kunigis la grandan kaj malgrandan ŝtalpecojn.

Ŝtalo fariĝis pli dolĉa post ardiĝo. Kiam ŝia mano ektuŝis la pezan ŝtalon, ŝi tuj sentis ĝian dolĉecon. Diferencas la gustoj de frosta ŝtalo en vintro kaj varma ŝtalo en somero. La ŝtalaĵoj nun antaŭ ŝi estas senescepte bonkvalitaj, malgraŭ ke ili portis malsamajn kolorojn — bluan, okran kaj nigran, tamen ili ĉiuj arĝente brilas interne. La torento el blindige brilaj ŝtalaj grajnetoj galopas kun muĝo, dissendante aeroondojn kun dolĉaodoro.

Kiam ŝi fiksis la kvinan niton, ŝi levis la kapon kaj vidis, ke la edzo iris al ŝi kunportante tagmanĝon.

Rizo kaj porkripaĵoj. Ŝi metis pecon da porkaĵo en sian buŝon kaj fiksis la rigardon sur la edzo. La osto tro longe kuirita tute moliĝis kaj ŝi nenion malmolan mordis.

“Rizo acidetas.”

“Ĝi estas freŝe preparita,” la edzo sentis ofendiĝon de la miskulpigo, dum la knabinoj subridis.

“Iom acida.”

“Ne,” la edzo certigis post gustumo.

“Iom.”

“Tamen vi manĝas kun lupa apetito.”

Preskaŭ elĉerpiĝis la plena gamelo da rizo. Ŝi ankoraŭ sentis, ke la rizo estis iom acida.

Ŝia bona apetito gajigis la edzon ĝis plenbuŝa rido. La radaksoj, la kluĉiloj, la ĉasioj kaj la trogoj de minĉaroj, la ŝtalaj fatrasoj kaj la malaltaj fabrikdomoj ĉirkaŭ la korto ekridegis kaj saltadis sur la loko. Abrupte ŝanĝiĝis la koloro de la subiranta suno kliniĝanta al la tegmento de la domo.

Estis kviete en laborejo. Ĉe la muro staris kvar kolosaj plastaj kestoj plenaj de malhelverda likvaĵo. Se oni metus homon en la likvaĵon, la homo komplete solviĝus. La edzo silente restadis en la laborejo 24 tagojn. Li rigardis la likvaĵon en la kestoj, aŭskultante alies laŭdon al lia edzino, aŭ dormetis kun duonfermitaj okuloj. En la 25-a tago li ekhavis ion por fari. Li atente metis strang-forman ŝtalan pecon en la verdan likvaĵon. Post certa

tempo li translokis la ŝtalan pecon en galvanizan trogon.

Tion fininte, li iris hejmen prepari manĝaĵojn por la edzino.

En la galvaniza trogo arĝentkolora metalo rapide frapadis la ŝtalpecon kaj tegis ĝin. En la sekvanta tago, kiam la edzo elprenis la ŝtalpecon, ĝi blindige brilis per la firma tegajo protektanta ĝin kontraŭ rusto.

Elirante el la laborejo, la edzo ne rimarkis, ke post lia dorso, de la plastaj kestoj leviĝis gaso, kiu nerimarkite penetris en liajn vestojn. Fakte ĉiutage la gaso atakis lin, eĉ penetris en liajn porojn.

La korto de la fabriko estis prilumita kiel tage. La bruado de nitmaŝinoj levis ciklonon, rekte pafiĝis al la ĉielo kaj eksplodis kiel petardo. Ŝtalaĵoj, kiuj absorbis sufiĉan varmon en tago, radiadis la varmon en nokto kaj bakis eĉ la internaĵojn de la homoj. Polvo levita de dancado de ŝtalaĵoj sturmis ŝiajn naztruojn. Ĉasio apenaŭ elfarita ekmoviĝis el sub ŝiaj piedoj, furioze galopis kiel vekita hundo kaj sin envicigis en grupon de minĉaroj. Survoje la ĉasio puŝiĝis kun radoj, aksoj, trogoj de minĉaroj eligante grandan bruon, kvazaŭ la tuta korto estus okupita de sen-nombraj ĉevaloj terure bruantaj.

La fabriko en atmosfero nepriskribebla estis fabriko kun ministaj edzinoj kiel la ĉefa parto de la laboristoj. Ĉirkaŭe de ĝi estis la fabriko de karbominejaj maŝinoj, kaj pli ekstere ŝtata karbominejo. Tio estas, ke la ŝtata karbominejo ĉirkaŭis la maŝin-

fabrikon, dum la maŝinfabriko ĉirkaŭis la fabrikon de ministaj edzinoj. Ŝi estas edzino de laboristo de la maŝinfabriko. Ŝin forte interesis la maŝinfabriko, tie estas 6 domegoj plenaj de diversaj maŝinoj. Sed ĉiujfoje kiam ŝi estis instigita de la scivolemo por iri en la fabrikon, tuj levigis antaŭ ŝi travidebla muro, kiu baris al ŝi la vojon.

Ŝi petis la edzon: "Rakontu pri la fabriko!"

Kaj la edzo diris: "Tie estas tornomaŝinoj, alezmaŝinoj, frezmaŝinoj, ĝirbrakaj bormaŝinoj, pontaj rabotmaŝinoj, kaj ankaŭ gruoj, hidraŭlikaj premmaŝinoj..."

Ŝi refoje petis la edzon: "Rakontu al mi pri la fabriko!"

Ŝia edzo ripetis la samon.

"Rakontu pri la galvaniza laborejo."

Kaj la edzo rakontis al ŝi pri la galvaniza laborejo. Ju pli multe rakontis la edzo, des pli ŝi konfuziĝis, kaj des pli ardiĝis ŝia

deziro pririgardi lian fabrikon, la galvanizan laborejon.

"Ripetu," ŝi petis la edzon, kvankam li apenaŭ finis la klarigadon.

Atakate de dormemo, la edzo plendis: "Rakontu, rakontu, ĉiutage vi estas en la fabriko, tamen ĉiutage vi petas min rakonti pri fabriko!"

La edzo estis prava. La maŝinoj tage kaj nokte bruegis ĉirkaŭ ŝi, kaj ŝi sendube estis en la fabriko. Sed, oni ne scias, kial ŝi ĉiam volis rigardi la maŝinfabrikon, sed neniam rigardis.

Ŝi memoris, ke ŝi estis tre juna, kiam ŝi veturis de sia hejmloko al la fabriko. Survoje ŝi senpalpebrume rigardadis eksteren tra la fenestro kaj vidis nur kontinuan montĉenon sub la arda suno. En malfacile eltenebla varmo kaj malsato, kun la letero de la edzo en la mano, ŝi nur esperis kiel eble plej baldaŭ atingi la malvarmetan lokon. La trajno lante rampis, kaj ŝi de tempo al tempo vidis, ke kun peza spiro la

trajno preskaŭ preterfrotis la vertikalan rokmuron, kaj la radoj pene rotaciis. Ŝi falis jen en raviĝon jen en konsterniĝon. La konduktoro trovis, ke ŝi ne havis biletan, kaj elvagonigis ŝin ĉe malgranda stacio. Sed ŝi rapide enŝteliĝis en alian vagonon. Ŝi ne povis deteni sin de rigardado eksteren. Ŝi vidis, ke vilaĝoj, arbaroj kaj strandoj ekster la fenestro flugis malantaŭen. Kiam la trajno preterpasis la pasejon Ŝanhajgŭan, ŝi vidis aleron sur alta muro kaj misteran beston sur la tegmento similan nek al drako nek al tigo, kiu kvazaŭ tuj flugos supren al la ĉielo.

En la 24 jaroj post kiam ŝi eniris en la fabrikon, ŝi neniam forlasis ĝin.

Subite la nitmaŝino ekstretegis kaj faris agacan bruegon. Ŝi stuporiĝis. Ŝi vidis, ke la martelkapo de la nitmaŝino elflugis el la nitmaŝino kaj traboris ŝtalan platon 4 milimetrojn dikan. La knabino, kiu tenas niton per forĝtenajlo, kriegis terurite kaj poste ekploris. Traborinte la



ŝtalan platon, la martel-kapo traflugis el sub la akselo de la knabino kaj eniĝis en la teron post ŝi. Ŝi forĵetis la nitmaŝinon kaj sidigis teren. Se la martel-kapo pafiĝus iom oblikve, ĝi traborus la mamon de la knabino. La knabino rigardis al sia akselo, de kie leviĝis karbiĝaodoro. La naŭ portempaj dungitoj estis tre junaj, kaj ĉiu havis ludilon en sia poŝo. Ili ploris, ridis, ekscitiĝis kaj afliktiĝis pro tiuj tunoj kaj tunoj da ŝtalo, kio okazis ankaŭ al ŝi en ŝia juneco. Rigardante la nigrajn ŝtalaĵojn tie kaj ĉi tie kuŝantajn surtere, ŝi sentis dolĉecon kaj teruron en la koro.

Sub la lampo ŝi lante levis sian dekstran manon kaj detale pririgardis la montrofingron. Sigel-inko ankoraŭ ruĝis inter la haŭtlinioj sur la polma flanko de la montra fingro, kvankam ĉiutage, antaŭ ol iri al laborejo, ŝi lavis kaj brosis la fingron tri fojojn en sapaĵo. La dekstra mano rememorigis ŝin pri la subskribo de kontrakto far ŝi kaj la fabrikestro, kaj ankaŭ la portado de ŝraŭboj fare de la fabrikestro. La fabrikestro portis la keston kun 50 kg. da ŝraŭboj sur la ventro, ŝvito riveris sur liaj nigraj vangoj, kaj leviĝis el la kesto kolonoj da blanka fumo. Laŭ la kontrakto ili devis fabrikii 150 minĉarojn en 60 tagoj kontraŭ pago de 15 mil jŭanoj. Por unutaga prokrasto oni dekalkulos 150 jŭanojn, 300 jŭanojn por dutaga prokrasto kaj 600 jŭanojn por tritaga prokrasto... La fabriko respondecos pri la livero de materialo. Sur la akto de la kontrakto estis ŝia fingra prem-signo kaj la sigelo de la fabrikestro. La portempaj dungitoj mire rigardis post ŝia dorso ĉiun ŝian movon kaj ankaŭ la misteran paperon. Post 60 tagoj tiu ĉi papero fariĝos 150 minĉaroj kaj 15 mil jŭanoj. La magia papero pelis la fabrikestron ĉien por trovi ŝtalaĵojn, dum ŝi kaj la 9 portempaj dungitoj penadis super tiuj ŝtalaĵoj 14 horojn ĉiutage.



Tiu ĉi magia papero donis al ŝi ŝancon vidi tion, kion ŝi volis vidi dum la 20 jaroj, sed ne sukcesis.

Ŝi rememoris tiun tagon. Kiam la suno elsaltis el sub la horizonto, ŝin akompanante, la estro de la fabriko de la ministaj edzinoj kaj la estro de la maŝinfabriko venis al la ĉirkaŭmuro de la fabriko. Estro de la maŝinfabriko pioĉis la muron kaj de ĝi falis duonbriko. Post duonminuto oni breĉis la muron kiu obstaklis al ŝi 20 jarojn. Fingromontrante la breĉon, la estro de la maŝinfabriko diris: "Jen de tie enportu la ŝtalajn platojn." La du fabrikestroj interkonsentis, ke la malgranda fabriko de ministaj edzinoj uzu la premaŝinon de la granda fabriko por fari trogojn de minĉaroj.

Kiam la rompita brikoj de la muro disfalis sub la pioĉoj, ŝi kun miro rimarkis, ke la senporda ĉirkaŭmuro estis masonita de ŝi mem antaŭ multaj jaroj, ke en la tagoj, kiam ŝi ankoraŭ ne komencis fabrikii minĉarojn, ŝi fosis teron, masonis muron, konstruis domojn, hejtis kaldronojn kaj fermis sin mem dudek jarojn. La kvinmetra premaŝino laboris. Ŝi kaj la portempaj dungitoj, ĉiu duo kun unu ŝtala plato, rapide metis ŝtalajn platojn en la maŝinon, kaj de tie eltiris trogojn de minĉaro. Ili laboris rapide kaj bone, ŝi fiksas sian avidan rigardon sur la bona maŝino.

Ŝia rigardo traboris la oranĝan lamplumon kaj haltis en la alta

obskura ĉielo. La tuta ĉielo ekster la spaco prilumita de la lampo estis plena de pezaj ŝtalaĵoj. Ŝi memoris la scenon, kiam la unua ŝtala plato estis tondita de la tondmaŝino. Ŝi diris al la knabinoj montrante la arĝentan sekcon: "Vi leku, ĝi estas dolĉa." La ŝtalaj platoj faris iliajn vizaĝojn plorantaj. Kun amara rido ŝi diris al la plorantaj knabinoj: "Ne ploru, jen fino de nia laboro hodiaŭ."

Tiutage ŝi la lasta forlasis la konstruejon. Du-metra ŝtala plata liniilo kaŝiĝis sub la ŝtalaj platoj, kaj ŝi elprenis ĝin kontraŭ ŝvitigo. Per la liniilo ŝi multe fosadis ĝis vezikoj aperis sur la manoj, kaj fine retrovis la martel-kapon de nitmaŝino.

Revenante al la hejmo, ŝi denove aŭdis la bruadon el la maŝinfabrika. Ŝi ankoraŭ restis en la sieĝo de bruado.

Sia rememoro vagis al la edzo implikita de la magia papero. Mallerta kiel infano, la edzo tute malordigis la hejmon: Potoj, pelvoj kaj bovloj disjetiĝis jen sur la litoj jen sur la fenestrobretoj, kaj manĝbastonetoj disŝutiĝis sur la planko. Kiam ŝi revenis de laboro, la edzo jam pretiĝis la manĝon. La edzo navetis inter la hejmo kaj la fabriko por kapti tempon por fari dommastrumadon. En tagmezo li haste portis manĝon al ŝi. Ŝi ne ŝatis la manĝaĵojn preparitajn de la edzo, asertante ke la rizo acidas.

Fakte la acideton kaŭzis la gaso kiu penetris en liajn vestojn. Kiam la edzo estis preparanta manĝaĵojn, la gaso enŝteliĝis en la manĝaĵojn. Ŝi manĝis tiujn manĝaĵojn kun la gaso, kaj la gaso penetris en la malmolajn ŝtalaĵojn, kiam ŝi prilaboris ilin. Ŝi tuŝis ĉiujn ŝtalajn pecojn, kaj ĉiu peco de ili pli malpli odoris per tiu gaso.

Ŝi travivis en tiu ĉi loko jam 24 jarojn, kaj dum tiu tempo ŝi neniam iris al sia hejmloko.

En printempo ĉi-jare, ŝi mal-konstruis siajn kabanojn kaj konstruis brikan triĉambran domon kun ŝtala framo. Per sia forto ŝi pelis ŝtonojn de sur montodeklivo kaj pelis sablon el la rivero. Fosante bazon por la domo, ŝi trovis grandan rustan feran blokon, kaj tiu bloko faris ŝercon kun ŝi. Ŝi levis ĝin kaj ĵetis foren, sed ĝi ruliĝis returnen. Ĝi pasis tra inter ŝiaj femuroj kaj ne preterfrotis ŝin. En tiuj tagoj ŝi peladis ŝtonojn kaj sablon esti-gante grandan bruon, kiu disportiĝis tra la tuta korto de laboristaj loĝejoj. Oni asertis, ke ŝi frezeziĝis.

En la 60-a tago post la subskribo de la kontrakto, viciĝis en la korto de laboristaj loĝejoj 200 novaj minĉaroj, 50 ĉarojn pli multe. Ŝi kaj 9 junaj kolegoj, ĉiu kun sitelo da nigra lako en la mano, per broso lakis la

minĉarojn. Ŝi kaŭre laboradis. Subite ŝi sentis frapadon je la ŝultro. Ĵurnalistino venis intervui ŝin trapasinte du ĉirkaŭmurojn. La ĵurnalistino demandis ŝin pri ŝia antaŭa salajro, la nuna kaj tiu de la edzo. La ĵurnalistino diris, ke ŝi faros raporton sub la titolo "Ŝi eklipsis la edzon kaj estron de granda fabriko". Ŝi diris ankaŭ, ke ŝi verkos novelon kun ŝi kiel heroino. Ŝi frapis minĉaron per sia pugneto, kaj la ŝtalaĵoj odoris pli dolĉe kaj pli fie; ŝi turnis radon de la ĉaro, kaj la rado turniĝadis senhalte. Ŝi faris la lastan strekon per la broso, kaj la fabrikestro metis en ŝian manon la pagon de 15 mil jŭanoj, premion por la pliaj 50 ĉaroj kaj ankaŭ la ĵaluzan kaj envian rigardon.

La ĵurnalistino demandis ŝin, kiel ŝi uzos la monon.

Ŝi respondis: "Por vojaĝo al hejmloko."

Ŝi refoje vidis la blankajn ŝtonajn montojn, refoje vidis la fuorton, kaj refoje vidis la ekflugontan strangan beston sur la tegmento de la turo sur Ŝanhajgŭan-pasejo. Ŝi maldormis dum la tuta veturado kun kartona slipo en la humida mankavo. Ŝi esperis, ke la konduktoro venos ekzameni biletan. Antaŭ 24 jaroj ŝi veturis sen bileto, sed hodiaŭ ŝi havis biletan por litvagono. ■

Esperantigis ŬANG CAJĴONG

KORESPONDI DEZIRAS

* 51-j. tradukisto dez. kor. kun junuloj tm. precipe el Francio, Belgio, Pollando, pri pm., b.k., fotografio, literaturo. Adr.: Zhang Shoucai, Zunyi Dong Lu 27, Jihua Gong Si, Jiangbei, Jilin, Ĉinio.

* 24-j. instruisto Zhang Xinhua dez. kor. kun esperantistoj, kiuj povas doni helpon en lernado de germana kaj angla lingvoj, kaj interesiĝas pri poŝtkartoj. Adr.: Zhang Xinhua, Jiugang Sixiao, Jiayuguan, Gansu, Ĉinio.

* S-ro Helmut Eschen dez. kor. kun tm. pri ĉiuj temoj. Helsinkier Str. 831703 Roytock-22, DDR.

* 25-j. studento dez. kor. kun esperantistoj tm. pri Esperanto-agado Adr.: Mieczyslaw Szydowski, ul. Ogrodowa 5/4, PL-65-461 Zielona Góra, Pollando.

* Jan Ullik dez. kor. kaj interŝanĝi poŝtmarkojn, bankobiletajn kaj monerojn kun geamikoj tm. Adr.: Aleja Kwiatów 1/17, PL-42-606 Tarnowskie-Góry, Pollando.

* Esperiga eldonisto de Maskuto (Kebekujo) dez. kor. tm. pri organa

muziko, ĝia etoso kaj presado. Valoran respondon al ĉiuj preĝejmuzikistoj. Pli da informoj en la revueto "Verdinsuleto", n^o 11. Adr.: Eld. Jakvo Ostigi, p.a. Iberv. Esp.-Ligo, 585-4e rue, Iberville, Qc, Kanado, J2X 3M9.

* Okaze de venonta filatela ekspozicio, A.A.E. deziras interŝanĝi poŝtmarkojn el ĉiuj landoj. Alagoana Asocio de Esperanto, Av. Fernandes Lima, s/n, Farol, Ceagb, Instituto de Linguas, 57.055, Maceió, AL, Brazilo.

POPOLAJ NOVJARAJ BILDOJ

de ŬANG ĴUJLIN

La novjaraj bildoj sin prezentas kiel unu el la specoj de la ĉina pikturo. En Ĉinio, kiam venas la Printempa Festo, la komenco de nova jaro laŭ la ĉina luna kalendaro, oni kutime gluas bildojn sur muroj, pordoj aŭ fenestroj de sia domo kiel ornamojn. En iuj regionoj tiaj bildoj aperas eĉ ĉe okazo de nupto aŭ naskotago. La aŭtoroj de novjaraj bildoj plejparte vivas inter popolanoj kaj posedas pentrarton heredatan de generacio al generacio.

La historio de la ĉinaj novjaraj

bildoj estas spurebla ĝis Handinastio (206 a.K.-220 p.K.). Tiam oni desegnis sur pordoj kaj muroj diajn figurojn kiel talismanojn kontraŭ malfeliĉoj. En la 10-a jarcento, nome, ĉe la fino de Tang-dinastio (618-907 p.K.) kaj dum la Kvin Dinastioj (907-960 p.K.), oni komencis ksilografie reprodukti simplajn novjarajn bildojn pri pordo-dioj kaj aliaj. En la sekva Norda Song-dinastio (960-1127 p.K.) populariĝis novjaraj bildoj nomataj paperaj bildoj. Tiajn bildojn oni reproduktis paŭse (t.e. kovri pretigitan pentraĵon per


diafane maldika papero kaj desegni sur la papero ekzakte laŭ la originalo por fari centojn da kopioj) aŭ ksilografie (tio tamen povis doni nur malgrandan kvanton da kopioj siatempe). Post Ming-dinastio (1368-1644 p.K.) la disvolviĝo de ksilografio, precipe la apero de koloraj ksilografiaj tabuloj, kreis favoran kondiĉon por grandkvante presi novjarajn bildojn, kiuj formis sendependan belartan branĉon apartiĝintan de ksilografio. En la 17-a kaj 18-a jarcentoj la novjaraj bildoj senprecedence disvolviĝis rilate

“Ĝinju” farita en Jangliŭĉing, Tjanĝin, en Ĉing-dinastio



siajn temojn, kvaliton kaj kvanton. Produktejoj de novjaraj bildoj funkciis preskaŭ en ĉiuj anguloj de Ĉinio, ekz., Jangliŭĉing de Tjanĝin en norda Ĉinio kaj Taŭhŭau de Suĝoŭ en suda Ĉinio. Ili ambaŭ estis centroj de novjaraj bildoj siatempe. Ankaŭ Ŭejfang de Ŝandong-provinco, Ĝuŝjanĝen de Henan-provinco kaj Mjanĝu de Siĉŭan-provinco estis gravajproduktejoj de novjaraj bildoj. Post 1840, rezulte de la enkonduko de litografio, freŝkoloraj kaj malmultekostaj litografoj iom post iom anstataŭis ksilografajojn, kaj tiam komencis malkreski la popola arto de ksilografiaj novjaraj bildoj.

Kiel ornamo de la festo, la novjaraj bildoj prezentas ne nur figurojn de pordo-dioj gardantaj kontraŭ eventualaj malfeliĉoj, sed pli multe aspiron al feliĉa estonteco, bonaŭguron kaj humuron. La tradiciaj novjaraj bildoj plejofte prenas kiel siajn temojn historiajn rakontojn, mitojn, legendojn kaj popolan vivon, ekz., pri la gaja Lanterna Festo, flugigo de kajtoj, drakboata konkurso, fiŝhokado ĉe lotusa lageto, festado de riĉa aŭtuna rikolto, bruligo de fajraĵoj en la Printempa Festo ktp. Krome, ankaŭ montoj kaj riveroj, ĝardenoj kaj vilaĝoj kaj bonaŭguraj bestoj, floroj kaj birdoj estas ŝatataj temoj. Interalie, la novjaraj bildoj pri historiaj rakontoj, lokaj teatraĵoj, mitoj kaj legendoj konsistigas grandan parton. Tiuj bildoj estas vaste bonvenigataj de malalte kleraj kamparanoj kaj ludas gravan rolon en popularigo de literaturaj kaj historiaj scioj, riĉigo de ilia kultura vivo kaj reflektado de iliaj aspiroj kaj idealo pri feliĉa vivo. Ankaŭ belulinoj kaj beboj estas oftaj temoj de novjaraj bildoj en diversaj lokoj. Tio spegulas, ke oni esperas, ke iliaj gefiloj kreskos sane kaj estos saĝaj, kapablaj kaj feliĉaj en la estonteco. Objektoj, mitaj figuroj, bestoj aŭ plantoj, kies nomoj homofonas kun bonaŭguraj vortoj en la ĉina lingvo, estas ofte prezentitaj en novjaraj bildoj por




“En Plena Harmonio” farita en Jangĝoŭ, Ĝjangsu-provinco, en Ĉing-dinastio

simboli feliĉan vivon kaj prosperan estontecon. Ekz., la Longviva Dio, figuro el ĉina mito, simbolas longvivecon; la peonio riĉecon, la florvazo sendanĝerecon kaj la orfiŝo abundon da oro kaj jado. Krome, humuraj kaj satiraj temoj, kun profunda implico kaj trafa kritiko kontraŭ malbonaj fenomenoj en la reala vivo, estas ĝenerale ŝatataj de popolanoj.

La formoj kaj formatoj de novjaraj bildoj varias laŭ malsamaj bezonoj. Ekz., grandaj tutfoliaj bildoj taŭgas por esti gluitaj sur la intermuro de salono aŭ ĉefa ĉambro, kun kaligrafiaj

ambaŭflanke, dum trionfoliaj kaj kvaronfoliaj bildoj estas uzataj por salonoj, dormĉambroj, flankĉambroj k.a. Ambaŭflanke de fenestro aŭ pordo oni gluas paron da bildoj enhave respondaj unu al la alia. Kaj apud litoj, en staloj kaj sur lanternoj estas gluitaj novjaraj bildoj oblongaj, kvadrataj, rondaj kaj rombaj, sume, en pli ol 20 formoj.

La produktaj procedoj de ksilografiaj novjaraj bildoj diferencas inter si en diversaj lokoj de Ĉinio. Ĝenerale, oni povas dividi ilin en tri kategoriojn. La unua estas konata kiel “streka presado”, nome, oni gluas pentraĵon



“Trinku pro la riĉa rikolto” farita en nuntempo

sur ebena ligna tabulo, faras gravuradon laŭ ĝiaj strekoj kaj presas la strekojn sur papero, kiun oni gluas sur muro por laŭvice aldoni kolorojn. Aŭ oni presas la strekojn sur kolora papero, simile al la tradicia ksilografia procedo. Tia procedo estas kompare malnova. La dua estas konata kiel “kolora ksilografio”, nome, oni reproduktas novjarajn bildojn per kompleto da koloraj lignaj tabuloj. Por fari unu bildon oni bezonas 3-8 tiajn tabulojn. Ĉe la procedoj de la tria kategorio, kolora ksilografio kombiniĝas kun aldonita delikata pentrado, nome, post kiam oni presas per koloraj lignaj tabuloj, oni aldone

pentras la vizaĝon kaj manojn de homfiguroj kaj la striojn sur iliaj vestoj, tiel ke la koloroj de la bildo varias en denseco kaj la mieno de homfiguroj estas versimila. La frutempaj novjaraj bildoj de Taŭhŭau kaj la eminentaj produktaĵoj de Jangliŭĉing estis kreitaj ĝuste per tiu procedo.

La karaktero de la novjaraj bildoj, enhave sanaj, modestaj, simplaj kaj facile kompreneblaj, formiĝis laŭ la estetika sento de la vasta popolamaso. En iuj lokoj novjaraj bildoj odoras primitive, kun krude fortaj strekoj kaj naive simplaj figuroj, kaj estas tre ŝatataj de la honestaj kamparanoj en

norda Ĉinio. Aliaj novjaraj bildoj, aparte delikataj, kun versimilaj homfiguroj, estas bonvenaj al homoj el malsamaj socitavoloj. Iuj el ili vekis intereson eĉ de imperiestroj kaj iliaj edzinoj. Tial, oni diras, ke la arto de novjaraj bildoj karakteriziĝas per eleganteco kaj populareco. Ĉar la novjaraj bildoj estas ksilografie reproduktitaj, ili plejofte estas harmonie komponitaj kaj prezentas malmulte da malpleno. Kun ruĝo, verdo kaj flavo kiel siaj ĉefaj koloroj, ili ofte estas kolore freŝaj kaj okulfrapaj.

Hodiaŭ la novjaraj bildoj estas ankoraŭ vaste ŝatataj en Ĉinio. Antaŭ la Printempa Festo la vendokvanto de novjaraj bildoj estas aparte granda en la kamparo. Kun la altiĝo de la nivelo de kultura vivo, malnovaj produktaĵoj de novjaraj bildoj restariĝis unu post alia kaj pli-malpli disvolviĝas. La ĉinaj pentristoj pri novjaraj bildoj senĉese progresigas la arton sur la tradicia bazo. Ekz., la popularigo de sciencaj kaj kulturaj scioj kaj la rekomendo de nobla moralo kaj novaj moroj jam fariĝis temoj de modernaj novjaraj bildoj. Nun la novjaraj bildoj plejparte estas ofsete presitaj. Ili ne nur konservas la tradiciajn trajtojn rilate siajn formon, koloron kaj komponadon, sed ankaŭ multe aplikas esprim-manierojn de la tradiciaj delikataj kaj dense kolorigitaj pentraĵoj de Ĉinio kaj tiujn de la eŭropa pikturo, por doni al la homfiguroj pli da versimileco kaj relieffeco kaj fari la koloron pli freŝa. Iuj pentraĵoj provas asimili la esprim-manierojn de la modernaj belartaj skoloj de Eŭropo, farante efekton per kombino de koloraj pecoj kaj per lirikismo. Tial la modernaj novjaraj bildoj de Ĉinio havas freŝan guston de nia epoko. ■





“Pordodio” (parto) farita en Pekino en Ming-dinastio



“Celebre al Riĉa Rikolto”
farita en Jangliŭĉing,
Tjanĝin, en Ĉing-dinastio

“Renkontiĝo de la
Bovisto kaj Teksistino”
farita en
Kaifeng, Henan-
provinco en Ĉing-
dinastio



“Paco por Tuta
Jaro” farita en
Jangliŭĉing, Tjan-
ĝin, en Ĉing-
dinastio



“Familia Ĝojo” farita en Jangliŭĉing, Tjanĝin, en





"12 Surlanternej Bildoj el Teatraĵo" farita en Suĝou, Ĝjangsu-provinco, en Ĉing-dinastio

Ĉing-dinastio






“Riça Familio” farita en Suĝou, Ĝjangsu-provinco en Ĉing-dinastio



“Post Riça Rikolto” farita en nuntempo



“Pordodio” farita en Ŭejŝjan, Ŝandong-provinco, en Ĉing-dinastio

LANDLIMAJ POETOJ EN LA PROSPERA PERIODO DE TANG-DINASTIO

de MEJ ĜI

De la dinastioj Suj kaj Tang, la han-nacio senĉese ekspansiigis sian teritorion kaj ofte militis kontraŭ aliaj nacioj ĉe la landlimoj nordokcidenta, nordorienta kaj sudokcidenta, la ekstera milito fariĝis grava afero en la popola vivo. Parto de la intelektuloj, kiuj ne sukcesis en ŝtatoficistiĝo, rigardis meritofaron ĉe landlimo kiel sukcesigan vojon. Sekve, landlima vivo fariĝis temo por multaj poetoj en la verkado kaj formiĝis landlima poezia skolo.

El ili Gaŭ Ŝi kaj Cen Ŝen estis la plej eminentaj en arto.

Gaŭ Ŝi (702?-765) havis malglatan vivon antaŭ la aĝo de 50 jaroj kaj poste rekomendite ricevis ŝtatan oficon. Li dufoje iris al landlimo kaj havis kompare profundan konon pri la vivo de militistoj ĉe landlimo. Pro sia ambicio li ofte entuziasme priskribis en siaj poemoj la idealon kaj pasion al la meritofaro en defendo de la landlimoj. Tio faris liajn poemojn plenaj de entuziasmo kaj vicleco. Lia poemo "Landlima Fortreso" skizis la heroecon de la landlime garnizonantaj militistoj, kiuj pretis sin oferi al defendo de la patrolando. Ekz.:

*Ili ne bedaŭras, por venk-gajno,
sian morton en landlima loko.*

La versoj esprimas optimismon de militistoj. "Laŭ Melodio de Jan" estas reprezenta verko de liaj landlimaj poemoj. Ĝi lakone priskribas militistan vivon, kiel militiro, brava batalo, la peniga batalo de soldatoj kaj distriĝo de oficiroj—

*Duono de la batalantoj mortis sur la fronto,
Sed belulinoj kantis, dancis plu en tendosfero.*

—reciproka sopiro de militistoj kaj iliaj edzinoj, senhoma dezerto, arda milita atmosfero kaj komplika psiko:

*La edzoj ferkirasaj servis longe en malfacilo
Larmadis la edzinoj triste post ilia iro.
Junaj virinoj pro ĉagren' en sudo preskaŭ svenis,
La edzoj en Ĝjebej rigardi tien vane penis.*

Tiuj versoj en la poemo faras korŝiran, tristan kaj heroan efekton.

En la poemoj de Gaŭ Ŝi montriĝas ankaŭ senĝeneco kaj romantiko. Ni prenu lian poemon "Adiaŭo al Adjutanto Ŭej" kiel ekzemplan. La poemo priskribas malfacilan situacion de la poeto, sed sen ajna deprimado aŭ tristo, kaj prezentas lian fieron kaj memfidon. El la poemo "Adiaŭo al Dong Da" la versoj

*Ne tristu pro amikomanko en l'estonto,
Kiu ne konas vian nomon tra la lando?*

estas plenaj de heroeco kaj ŝatataj de samtempuloj kaj posteuloj.

Cen Ŝen (715-770) estis alia landlima poeto, fame konata kiel Gaŭ Ŝi. Liaj landlimaj poemoj tre similas al tiuj de Gaŭ Ŝi kaj estas saturitaj je heroa sinifero al la patrolando kaj optimisma sinteno al malfacilo. Cen Ŝen vivis en landlima regiono pli longe ol Gaŭ Ŝi kaj havis pli profundajn spertojn kaj konon pri la militista vivo kaj pejzaĝoj ĉe landlimo. En liaj landlimaj poemoj sin prezentas diversa landlima vivo, entuziasma kantado pri la batala spirito de landlimo-gardaj militistoj, pejzaĝoj ekster la Granda Muro, la tiea severa klimato, ekzotikaj moroj. Liaj poemoj estas pli romantikaj ol tiuj de Gaŭ Ŝi en grandiozeco, abundaj imagoj, pompaj koloroj kaj nesubigebla fervoro, kaj manifestas mirindan artan ĉarmon.

"Adiaŭo al la Okcidenten-ekspedicio ĉe Zoŭmaĉŭan-rivero" estas reprezenta verko de Cen Ŝen. Je la komenco li emfaze priskribas hurladon de norda vento kun leviĝantaj sableroj:

*Ĉu vi ne vidas longan Zoŭmaĉŭan
ĉe l'Neĝa Maro,
De vasta dezert' alĉiele levas sin sableroj.
En Luntaj blovas hurle, sible vento aŭtun-nokta,
La ŝtonoj en fluejo rulas sin sub vento forta.*

La skizo pri la tiel malbona medio reliefiĝas la potencon okcidenten-ekspedicion. Poste li priskribas urĝan kaj seriozan militan situacion kaj penon de la bravaj garnizonantoj:

*Tranoktas dorme generaloj en la ferkiraso,
En militiro nokta lancoj interfrape tintas.*

Je la fino li priskribas la optimismajn militistojn kun plena memfido al venko. La rapidaj ritmoj en la poemo resonis harmonie kun la rapide ŝanĝiganta milita situacio, kio estigas streĉitan senton.

Alia reprezenta verko de Cen Ŝen "Kanto pri Neĝo" estas poemo pri paca vivo en armeo. Je la komenco ĝi priskribas maloftan aŭtunmezan neĝadon ekster la Granda Muro, per viva analoga komparo de florantaj pirarboj kondukas legantojn al printempa medio kaj je la fino priskribas la amikon forirantan sur la neĝkovrita vojo de Tjanŝan-montaro. En la bedaŭra adiaŭo li bildigas brile ruĝan flagon, kio vigligas la tutan bildon kaj donas al la adiaŭa poemo mirindan, romantikan kaj optimisman koloron.

Ankaŭ Cen Ŝen verkis nostalgiajn poemojn. En la poemo "Renkonto de Sendito al la Ĉefurbo", li diras:

*Tro longas l' orienta vojo al la hejma loko,
Ĉesigi mi ne povas la larmadon emocian.
Je survoja renkonto mankas al mi skrib-peniko,
Bonvolu diri al l' edzino bonan farton mian.*

Ŭang Ĉangling (698-757) estas alia poeto menciinda el la landlimaj poetoj de tiu periodo. Li estis lerta bildigi en poemoj homan penson kaj malkovri homan internan mondon. Lia poemogrupo "Armeaniĝo" estas rigardata kiel fama verko el la landlimaj poemoj. De diversaj flankoj ĝi spegulas sentimentan ŝanĝiĝon de militistoj. El ĝi la poemo montras ilian bravan spiriton al batalo:

*La nuboj Ĉinghaj-lagaj ombras jen la
Neĝmontaron.
Soleca urbo alrigardas for al urb' Jumen.*

Poemoj pri landlima militista vivo el la prospera periodo de Tang-dinastio

Laŭ melodio de Jan

de GAŬ ŜI (702-756 p.K.)

*Ĉe l' lim' nordorienta de Han¹ militfumo soris,
Por bati l' restajn malamikojn generaloj foris
De l' hejmo. Propre l' viroj emis per bravec' sin
glori;*

*Difektis la kirasajn vestojn cento da bataloj,
Sen venko super Loulan mi ne pensos pri reven'.*

Lia alia poemo "Ekster la Granda Muro" estas rigardata kiel la plej eminenta verko el la tiutempaj kvarversaj poemoj:

*Pasejo, l' luno restas samaj kiel en Ĉin
kaj Han,*
Revenas de la longa marŝo militistoj ja neniam.
Se vivus la generalo Li de Han-dinastio,
Ne lasus oni malamikojn pasi l' monton Jinŝan.*

Kvankam la poetoj de tiu periodo lasis al ni tre malmultajn verkojn, tamen iliaj nomoj estas ĉiam en la memoro de la posteuloj pro la de ili lasitaj unu aŭ du poemoj. Tion ekzemplis Ŭang Han kaj lia poemo "Kanto de Soldato". Ĝi famas pro viveca priskribo pri militista vivo.

*Malĝojon per la vino en brilanta jadvokalo
Esperas mi dronigi, sed ekvokas bivo sur ĉevalo.
Ne ridu, se mi dormus mortebria sur la kampo.
Kiom da homoj hejmevenis iam de batalo!*

Ŭang Ĝihuan estis alia poeto de tiu periodo. Li verkis poemon "Ljangĝou" ŝatatan de la posteuloj:
*La Flava Rivero pendigas sur fono de nuboj,
Solece situas ĉe montoj gigantaj la urbo.
Ĉjang-fluto ne ludu la tristan 'Saliko-melodio'
Al Jumen-pasejo ne venas printempa zefiro.*

Lia alia poemo "Ascendo al la Cikonia Turo"
*La suno glitas posten al montaro,
Flava Rivero fluas al la maro.
Se volus ĝui bildon vi pli foran,
Ascendu supren laŭ la ŝtuparo.*

estas vaste cirkulanta. Nur kvar versoj jam harmonie teksas la sentimenton kaj pejzaĝon en unu bildon kun profunda signifo, ripete maĉinda. ■

* Tio aludas la dinastiojn Ĉin kaj Han.

*L' imperiestr' aparte ilin per akcept' favoris,
Kaj tamburante kaj gongante l' trupoj jen atingis
Juguan², jen ĉe Ĝjeŝi³ serpentis kaj standardojn
svingis.*

*La oficiroj plumleteris⁴ tra la Gobi-mondo.
Ĉasfajroj de Ĉanĵu-o⁵ brilis antaŭ l' Lupo-monto⁶.
Dezertan la limregionon regis malprospero,
Husaroj de l' Hu-ras⁷ atakis ŝtorme en kolero.
Duono de la batalantoj mortis sur la fronto,*



《西遊記》 孫悟空 40.7

*Sed belulinoj kantis, dancis plu en tendosfero.
La herboj velkis sur la stepo vasta en aŭtuno,
Soldatoj pokas⁸ solec-urbe sub la vespersuno!
La favoratoj de l' regnestr' subtaksis malamikon,
Penadis sed fiaskis rompi l' pasej-ĉirkaŭigon.*

*La edzoj ferkirasaj servis longe en malfacilo,
Larmadis la edzinoj triste post ilia iro.
Junaj virinoj pro ĉagren' en sudo preskaŭ svenis,
La edzoj en Ĝjibej⁹ rigardi tien vane penis.
Ja lingardantojn bezonegis kriz-situacio,
En la vastaj¹⁰ Gobi-dezerta estis ja nenio.
Milito furiozis dum la tri kultiv-sezonoj,
Tra tutaj frostaj noktoj bruais tintaj djaŭdoŭ-
sonoj¹⁰.*

*Glimbrilis blankaj glavoj kaj sangmarĉoj en furoro.
Kiu martiro iam zorgis pri merit' de gloro?
Ja sciu kiel batalvivo fronta malfacilas,
Pri Generalo Li¹¹ ankoraŭ oni plu sopiras!*

Kanto pri neĝo

Okaze de adiaŭo al Asistanto U al la ĉefurbo

de CEN ŜEN (716-770 p.K.)

*La blankajn herbojn¹² rompis frostvent'
de l' norda tero,
L' okan monaton neĝon jam ŝutas Hu-vetero¹³.
Mil arboj ornamitas per blankaj pirarbfloroj.
Kvazaŭ printempa vento ĵus blovus dum nokthoroj.
Neĝeroj enpenetras — malsekas silkkurteno,
Eĉ pelt' kaj vatkovrilo mizeras por varmiteno.*


*Ne povas generalo per arko sagon pafi,
Kaj l' ferkiras' tro fridas por Duhu¹⁴ ĝin surhavi.
Mil futoj da glaci' tra l' dezerto sin etendas,
Nubaro de malĝojo senlima supre pendas.
Ni drinkis en la tend' pro hejmiro de l' amiko;
Ludiĝis biv', huĉino¹⁵ kaj fluto por muziko.
Sur barakpordon falas neĝflokaj el arĝento,
La ruĝa flag' frostita ne flirtas en la vento.
Mi adiaŭis vin ĉe la pordo orienta
De Luntaj¹⁶ — Tjanŝan-vojoj fariĝis neĝoplenaj.
Irinte laŭ montvojo zigzaga vi forestas,
Ĉevalaj piedsignoj sur neĝo vane restas.*



Elĉinigis LAŬLUM

1. Han — Han-dinastio. Per ĝi la poeto aludas Tang-dinastion.
2. Jugŭan — la nuna pasejo Ŝanhajgŭan.
3. Ĝjeŝi — monto en Hebej-provinco.
4. plumletero — komuniki per plumleteroj, kiuj surhavas plumon por indiki urĝecon.
5. Ĉanĵu — suvereno de hunoj. Per ĝi la poeto nomas estron de la invadantaj malamikoj.
6. Lupo-monto troviĝas en nuna norda Ĉinio.
7. Hu-raso — per Hu oni nomis nordan popolon en Tang-dinastio.
8. pokas — malmultas.
9. Ĝjibej — regiono norde de Ĝjiŝjan-gubernio.
10. djaŭdoŭ-o — kupra kaldrono uzata en antikva ĉina armeo kiel tintilo dum noktogardado.
11. Generalo Li — Generalo Li Gŭang de Han-dinastio, kiu tre amis siajn armeanojn kaj batalis bravege.
12. blanka herbo — speco de herbo, kies blanka tigo estas tre fortika.
13. Hu-vetero — vetero de la regiono loĝata de la norda Hu-popolo.
14. Duhu — generalo de garnizono en limregiono en Han- kaj Tang-dinastioj.
15. huĉino — dukorda arĉinstrumento de Ĉinio.
16. Luntaj — urbo en la regiono Ŝiĝjang.

Esperantisto-miniaturisto



Daj Ĝigŭo, esperantisto de Anhuĵ-provinco, Ĉinio, vizitis la redakcion de *El Popola Ĉinio* majo de 1987, kun kelkaj juvelujoj. Kiam li malfermis iun el ili, la apudstarantoj senescepte montris sian admiron.

En la juvelujo kun grandeco de 4 kvadrataj centimetroj estas la universo! Sub lupeo vidiĝas 8 pejzaĝoj kun grandeco de fabo aŭ rizo: Sur la pentraĵoj staras montoj vualitaj de nebulo, brilas akvo, majestas montpintoj, tondras akvofaloj, foren flosas leĝeraj boatoj kvazaŭ en la fea mondo...

Daj Ĝigŭo estas 39-jara. Jam de sia infanaĝo li amas belarton. Li lernis olepentration kaj la ĉinstilan pikturon. Poste dum longa tempo li sin okupis pri projektado de montra fenestro kaj farado de

ĝardena skulptaĵo. Liaj pejzaĝoj estis plurfoje eksponitaj kaj premiitaj en Ĉinio. Estas multe admirataj la de li skulptitaj "Karmo Transsaltas Drakpordegon", "Grupo inter Kokoĵ" kaj 32 metrojn longa "Du Drakoj Ludantaj Globon".

En 1979 li estis edifita de alies miniaturaj skulptaĵoj kaj ekhavis la ideon lerni miniaturon.

Daj Ĝigŭo forlasis sian lertan tuĉpenikon kaj ekprenis delikatan peniketon 8-oble pli maldikan ol homa haro por lerni la miniaturan arton. Estis ja imageblaj la malfaciloj. Tamen li ne hezitis antaŭ la malfaciloj. Li atente cerbumadis pri verkoj de famaj miniaturistoj, kolektis kaligrafiaĵojn, pentraĵojn kaj sigelojn de famaj ĉinoj antikvaj kaj nun-

tempaj, daŭre studis la penikan manipuladojn, aranĝon de la tradiciaj ĉinstilaj pentraĵoj kaj lernis en la Koresponda Instituto de Ĉinstilaj Kaligrafio kaj Pentrarto por sisteme posedi la teorion pri pentrarto. Li dediĉis sian tutan postlaboran tempon al la esploro de la arto kaj lerte posedis kaligrafion kaj pikturon, tiel ke li metis solidan fundamenton por sia miniatura kreado.

Krei miniaturon estas peniga laboro, kiu postulas striktan kunlaboron de la menso, manoj kaj spirito. Komence la peniko en lia mano tremis sub la altapova lupeo kaj li ne povis lerte uzi la penikajn pinton kaj flankon. Li plenumis unu verkon en kelkaj tagoj kaj ofte malsukcesis pro malatento.

Pro tio li ofte maldormis tutan nokton. Li sidis silente antaŭ la tablo kaj koncentris sian atenton: Kien direktas lia menso, tien atingos lia peniko. Kion ajn li pentris, li ĉiam plenumis ĝin senhalte. Se la pentraĵo estis fuŝita, li do komencis denove la pentradon kaj daŭrigis tion ĝis la fino.

Eĉ nun ofte okazas, ke li ne povas fini unu pentraĵon en daŭro de dekelkaj tagoj, sed iaforte li povas fini ĝin en kelkaj horoj. Foje li laboris de la 8-a vespere ĝis duono post la 7-a de la sekva mateno. Kiam li estis tuj plenumonta la pentraĵon multe plaĉan al li, li preteratente fuŝis ĝin en la surskribo, tial li devis forĵeti ĝin, por kiu li laboregis tutan nokton. En la sekva semajno li ne



Ĉina porcelanaĵo eksponata en Oranienburg-palaco de Berlino

“CHINOISERIE”

tiam estiĝantaj novaj orientaziaj komere-kompanioj (post eltrovo de la marvojo al Hindio) ebligis importi amase ĉinajn objektojn. Ĉefe ĉina porcelano trovis vastan distribuadon per la internacia mar-komercio. Dum nur unu jaro atingis al havenon de Amsterdam (Nederlando) ekzemple 50 000 pecoj da ĉina porcelano.

La entuziasmo pri ĉina kulturo estis nutrita per vojaĝraportoj de jezuitoj kaj komercistoj. La germana sciencisto Gottfried Wilhelm Leibniz tiam proponis akcepti la ĉinajn ideogramojn kiel mondan alfabeton. Laŭ ofte suprajaj informoj la princaj korteganoj imagis Ĉinion kiel lando de serena vivoĝuo, de surtera feliĉo. Ili konsideris ĉinan kortegan kulturon ĉarma kaj parena al sia propra vivostilo diboĉa.

“Chinoiserie” manifestiĝis en

Dum la dua duono de la 17-a jarcento kaj dum la 18-a ĝis la komenco de la 19-a jarcento estiĝis en Eŭropo prefero pri ĉinaj objektoj kaj kulturo. La interesiĝo pri Ĉinio montriĝis unue per kolektado de ĉinaj objektoj kaj poste per imitado de ornamaĵoj kaj formoj.

Tiu ĉi ĉina modo venis tra Francio, Nederlando kaj Anglio al la ceteraj eŭropaj landoj. Ĝi speciale floris en Francio (1720-1760) kaj en Germanio (1765-1795). Ĉar ĝi unue evoluigis en Francio, oni de tie ankaŭ transprenis la nomon “Chinoiserie” (ĉinizemo) por tiu ĉi modo. La

interesiĝis pri pentrado.

Dank’ al sia diligenta laboro, li sukcese faris dekojn da subtilaj verkoj, kiuj estis eksponataj kaj vendataj en la Kantona Foiro de Ĉinaj Eksportadoj kaj Japanio kaj eksponataj en la foiro “Azio Hodiaŭ” de San-Francisko, Usono.


La verkoj de Daj Ĝigŭo estis admirataj de en- kaj eksterlandaj personoj, kiuj opinias ilin eminentaj kreaĵoj. Fakuloj montris, ke liaj verkoj estas delikataj, sed sen febleco: diskrete faritaj, sed ne mankas al ili lerteco. En la subtilaj strekoj vidiĝas grandiozaj pejzaĝoj, ĉarmaj montoj kaj riveroj sur peco kun grandeco de riz-

graĵno, kio montras la grandan lertecon de la aŭtoro.

Ĉi-foje s-ano Daj Ĝigŭo venis al nia redakcio kun siaj miniaturoj kaj esprimis sian volon krei miniaturan portreton de Zamenhof, la kreinto de Esperanto, kaj ĝin dediĉi al nia vasta esperantistaro. ■



Pleto kaj taso kun ĉinaj homfiguroj bakitaj en la Reĝa Porcelana Manufakturo de Berlino en 1769



Bovlo kaj pleto kun biuaj desegnoj bakitaj laŭ ĉina maniero en la Reĝa Porcelana Manufakturo de Berlino en 1770-1780

Eŭropo per arkitekturo, arto kaj armetio. Scenoj el la vivo de ĉinoj ornamis artobjektojn, meblojn, tapetojn, tapiŝojn kaj murojn. Kolektado de ĉinaj objektoj fariĝis pasio de eŭropaj princoj. Princaj palacoj en la tuta Eŭropo ricevis siajn ĉinajn ĉambrojn aŭ porcelan-kabinetojn.

La ĉina imperiestro donacis

volumon da ĉinaj desegnaĵoj al la franca reĝo Ludoviko la XIV-a. Ĝi fariĝis riĉa fonto de instigoj por la dekoraciistoj.

Caro Petro la Granda klopodis stabiligi la kontaktojn inter Rusio kaj Ĉinio. Li mendis multajn tablo-servicojn en Ĉinio, dekoritajn per sia emblemo.

Unua ekzemplo kaj rezulto de la

ĉina modo en Germanio estis la ĉina teo-kabineto de princo Frederiko la III-a de Brandenburg en sia palaco en Berlin (detruita dum la Dua Mondmilito).

Aŭgusto la Potenca, princo de Saksio kaj reĝo de Pollando, tre ŝatis la ĉinaĵojn. Laŭ lia ordono estis konstruita la Palaco Pillnitz (1720-1732) en Dresden (Germanio). Kvankam barok-stila konstruaĵo, ĉe ĝi tamen klare evidentiĝas la influo de la ĉina modo, per kurbaj tegmentoj, bizaraj kamentuboj, per ĝia ekzotike ludema silueto kaj pentraĵoj en la interno. Ĉina ĉambro troviĝas en la orienta parto de la palaco. En la porcelan-kolektaĵo en Dresden estas altaj ĉinaj kovril-vazoj, kiuj nomiĝas "dragonaj vazoj". La saksa princo akiris ilin kaj aliajn porcelanajn objektojn en 1717 por sia kolektaĵo, la prezo estis 600 saksaj dragonoj. Ankaŭ aliaj germanaj princoj tiam komercis per viva milit-materialo, vendis siajn regatojn al fremdaj potencoj. Ili ankaŭ uzis soldatojn kiel ŝanĝobjektojn por akiri ĉinan porcelanon. Kelkfoje oni ŝanĝis ĉinajn vazojn por fari ilin taŭgaj por diversaj celoj, ekzemple per aldono de bronza piedoj kaj kasko kun kandelingoj, tiamaniere formi reprezentan kandelabron. Aŭ oni kompletigis vazojn per bronza beko, kovrilo kaj anso por fari kafo-kruĉon.

Plia ekzemplo de la ĉina modo estas la teo-pavilono en la parko de Sanssouci en Potsdam (Germanio), rezidejo de la prusa reĝo Frederiko la Granda. La rondforma pavilono konstruita en 1754-1757 posedas tend-similan tegmenton kaj kupolon, sur kiu sidas mandarino kun ombrelo. En la interno estas orumitaj statuoj de te-trinkantaj ĉinoj en naturaj proporcioj. Plia ĉina pavilono en la sama parko estas la drakodometo konstruita en 1770 en formo de trietaĝa ĉina pagodo sur okangula fundamento. Tiaj ĉinaj

pavilonoj troviĝas multloke, kaj tegmentoj, frisoj, stukaĵo kaj kolektaĵoj en muzeoj kaj palacoj dokumentas ĉinan kaj orientazian influon.

Post la (dua) eltrovo de porcelan-produktado per la alkemiisto Johann Friedrich Böttger en la jaro 1709 kaj establo de la porcelan-manufakturo en 1710 en Meissen (Germanio), la unua en Eŭropo, malfermiĝis vasta tereno por ĉin-imitado. Unue oni akurate kopiis ĉinan porcelanon laŭ formo kaj ornamo. Ĉinaj figuroj kaj scenoj el la ĉina vivo estis modelitaj aŭ kovris la porcelanajn objektojn. Modelo ankaŭ estis la ĉina blu-blanka pentrado. Kunfandiĝis fine rokoko-formoj kun ĉinaj motivoj kaj form-elementoj. La porcelan-produktejo de Meissen estis gvida ĝis la jaro 1770, aliaj manu-

fakturoj kopiis aŭ la modelojn de Meissen aŭ rekte laŭ ĉinaj sugestoj. Porcelan-fabrika, kiu establiĝis en la jaro 1751 en Anglio, ne nur produktis laŭ ĉinaj modeloj, eĉ la produktejo estis konstruita laŭ "kantona stilo". La mono de la manufakturo estis "New Canton" (Nova Kantono).

Oni povas dividi la tiaman periodon de porcelan(kaj fajenc)-produktado en Eŭropo en jenajn etapojn: imita (1670-1730), fantazia (1720-1760) kaj romantika (1760-1820). Ĉina influo je porcelano speciale evidentiĝis per drakaj, arkitekturaj, floraj kaj birdaj motivoj. Iom post iom reliefiĝis propra eŭropa porcelan-stilo. Sed drakmotiv-seriojn oni ankoraŭ nuntempe produktas en Meissen.

Relikvoj de "Chinoiserie"

restas ĝis nuntempe ĉe ni. Ekzemple la nun tre ŝatata, tiel nomata "cepokekoro" per blua subglazura pentrado sur fajenco kaj porcelano estas produkto de la tiam ĉina modo (unue produktita en Meissen en 1739 laŭ ĉina modelo kaj poste transprenita de aliaj manufakturoj). Ĝia ornamo estas ekzotikaj plantoj kaj fruktoj, la granato estis miskomprenita kiel cepo. Ankaŭ nia te-kruĉo tiam ricevis sian formon, dikventra kun gracie kurba beko, kontraste al la kafo-kruĉo. Same konstruo kaj formo de nia pluvombrelo originis en la tiam ĉina modo.

Do "Chinoiserie" signifas multflankan artan riĉigon speciale de la rokoko-etapo en Eŭropo, per enhavoj kaj formoj, sed ĝiaj relikvoj ankaŭ postefikis. ■

KORESPONDI DEZIRAS

* 29-j. Instruistino dez. kor. tm. pri vegetaranismo, teatro, filozofio kaj kulturo de malproksima oriento Esperante kaj angle. Malgorzata Gabryelska, ul. Chelmiryska 22F/6 78-400 Szczecinek, Pollando.

* 25-jara inĝeniero-agregaciulo dez. kor. Esperante, angle kaj ruse kun gejunularo kaj esperantistoj pri ekonomiko, politiko, kulturo, foto, vojaĝo kaj gastigado. Adr.: Zsolt Demecs, Budapest XVI, Katóka u. 50, 1163, Hungario.



* 22-jara sveda knabo volas korespondi. Janne Johansson, Nitvägen 25, 126 38 Hägersten, Svedio.

* 12-jara knabino deziras korespondi tutmonde kun samaĝaj infanoj. Izine Botraki, 19 Athido, 176.71 Kalithea, Ateno, Grekio.

* 23-j. fremdulgvidantino dez. kor. kun gejunuloj kaj esperantistoj pri ekonomiko, Ĉinio, politiko, historio, arto, vojaĝo kaj gastigado. Adr.: Monika Baki, Budapest v., Mérleg u. 12, 11/5, 1051, Hungario.



* 17-jara ŝakisto dez. kor. kun ŝakistoj pri ludado de ŝako. Adr.: Lanin Roman A., ul. Aga-Nejmatulla 23-63, 370145, Baku, USSR.

* Andrzej Grabski kaj Darivsz Olewinski dez. kor. kun ĉinaj esp-istoj, precipe kun junaj samideanoj. Adr.: Skr. Pocz. 26, PL-48-300 NYSA, Pollando.

* Nova kanada E-Klubo "AMI-KE" serĉas gekorespondantojn tutmonde. Skribu al: Amika Mez-Insula Klubo de Esperanto, Site 66, C9, R.R.2, Lantzville, B.C. Vor 2110 Kanado.

* Mi planas studvojaĝon (fine de 1988) tra Turkio, Libano, Israelo, Irano, Pakistano, Hindujo, Nepalo, Srilanko, Tajlando, Vjetnamio, Honkongo, Ĉinujo, Koreujo, Japanio, Mongolio kaj Sovetunio. Mi intencas fari filmon pri la Esperanto-movado en ĉi tiuj landoj, gvidi E-kursojn kaj prelegi. Mi tre bezonas helpon de tieaj esperantistoj, E-asocioj kaj grupoj. Skribu al Joachim Werdin, Pionierów 6 A 9, PL-47-220 Kedzierzyn-Kozle, Pollando.

* 26-j. fraŭlo, kuracisto dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj. Adreso: Chirita Caius, Calea Aradului Vest, bl. 1AB, sc. B, ap. 5, Timisoara, Rumanio.

* Esperanto-grupo dez. kor. kun ĉinaj E-grupoj de infanoj en aĝo de 12-14 jaroj aŭ tiu de plenkreskuloj en aĝo de 30-45 jaroj pri diversaj temoj kaj interŝ. bk. Skribu al: Kulturbund der GDR, Esperanto-grupo, Fährstr. 23, Stralsund 2300, GDR.

* Malsamaĝaj gelernantoj de la kursoj de Pernambuka Esperanto-Asocio (Caixa Postal 1139, 50001 Recife -PE, Brazilo) deziras interŝanĝi bildkartojn, pm., bankbiletojn, E-librojn ktp kun ĉiuj landoj.

* Dez. kor. kun tm esp-istoj: C. de Groot, Postbus 14, 9649 ZG Muntendam, Nederland.

INDIVIDUAJ ENTREPRENISTOJ EN PEKINO



En foiro de Pekino

Buntkoloraj bazaroj viglaj sur stratoj de Pekino estas unu el la plej okulfrapaj fenomenoj de post la jarfino de 1978, kiam Ĉinio komencis reformi sian ekonomian strukturon.

En tiaj bazaroj oni povas aĉeti necesajojn, kiaj mode fasonitaj vestoj, ĉapoj, ŝuoj, kuiriloj, legomoj, fruktoj kaj almanĝaĵoj. Krome, oni devas ellerni marĉandon por aĉeti je minimuma prezo.

Ĝaŭ Julin, 35-jara, havas sian standon en la bazaro antaŭ la ŝtata magazeno ĉe Ganĝjakoŭ-kvartalo

en la okcidenta parto de Pekino. Antaŭ dekkelkaj jaroj li laboris en kamparo de nordorienta Ĉinio. Reveninte de tie li entreprenis individuan komercon. Sur lia stando vendiĝas litaĵoj kaj vestoj. "Mi neniam laboris en ŝtata entrepreno," li diris, "Mi okupiĝas pri individua entrepreno jam plurajn jarojn, kaj la afero iras glate."

Individuaj entreprenistoj ĝenerale ne volas malsekretigi sian efektivan profiton. Laŭ statistiko de pekina industria kaj komerca

administracio, neta profito de individua entreprenisto ĝenerale estas du- aŭ tri-oble kiom tiu de laboristo aŭ oficisto de ŝtata entrepreno aŭ vendejo. Sed multaj rigardas tian takson konservativa. La efektiva enspezo povas esti multe pli alta ol la taksita. Ĉar, la nunaj administraj kaj super-rigardaj reguloj de la ŝtato por la individuaj entreprenistoj estas neperfektaj. Por imposteviti kaj malmulte pagi administran kotizon, pluraj entreprenistoj faras trompon kaj falson en siaj raportoj pri la komerca sumo kaj

profito. Krome, pluraj individuaj entreprenistoj kondutas nehoneste. Ili ofte artifikas por pli profiti.

Malgraŭ ĉio ĉi, la evoluo de individuaj entreprenistoj ludas gravan rolon en akcelo de produkto, vigligo de merkato, oportunigo de la loĝantara vivo ktp.

Nun en la urbo Pekino estas ĉ. 29 000 individuaj entreprenistoj sin okupantaj pri komerco, manĝado, servoj, riparo kaj vestofarado, intime rilatantaj al la popola vivo. Interalie la nombro de la individuaj manĝejoj, servaj kaj vestofaraj punktoj multe superas tiun de la ŝtataj kaj kolektivaj. Tio vidigas la rolon de individuaj entreprenistoj en la ĉiutaga vivo de pekinanoj. Pekinanoj ĝenerale opinias, ke la individuaj entreprenistoj vendas je prezo pli alta ol tiu en la ŝtataj vendejoj, kaj kelkiam oni eĉ estas trompita, sed la varoj venditaj de ili estas plimult-specaj kaj laŭplaĉe elekteblaj; cetere, ĉe ili oni povas tuj aĉeti sen longa atendo, okazanta en ŝtataj vendejoj.

En 1949, kiam fondiĝis la Ĉina Popola Respubliko, en Pekino troviĝis pli ol 50 000 individuaj laborantoj. Sed en la posta socialisma transformado de posedanteco de la produktaj rimedoj en la 50-aj jaroj, plejparto de ili aliĝis al ŝtataj kaj kolektivaj entreprenoj. Je la fino de 1978, la pekinaj administracioj pri industrio kaj komerco registris nur 259 individuajn laborantojn.

En la fino de la 70-aj jaroj, pro pliigo de la loĝantaro kaj vojaĝantoj al Pekino, kaj la ĉiam plialtiĝantaj postuloj de popolanoj pri la vivkondiĉoj, fariĝis pli kaj pli malfacilaj vestofarado kaj restoracio-vizito.

Komenciĝis la reformo de ekonomia sistemo je la fino de 1978. Por solvi la supre menciitajn problemojn kaj enpostenigi pli multajn gejunulojn, individua

ekonomio en Pekino rapide disvolviĝis sub gvido de la registaro.

En la lastaj 9 jaroj, la nombro de individuaj entreprenistoj jam kreskis ĝis 35 000. Ili sin okupas pri podetala vendado, servoj, vestofarado, laboras en restoracioj. Tiuj en la strataj bazaroj estas nur parto de la individuaj laborantoj de Pekino. Ankoraŭ pli granda parto de ili viglas sur stratoj, okupiĝante pri vestofarado, manĝaj-vendo kaj metioj.

La Tajlorejo "Huj Lej" situas ĉe strateto de la orienta distrikto. Ĝia mastrino nomiĝas Ŝi Huj, 22-jara. Ŝia tajlorejo funkcias jam 4 jarojn. Julie de 1983, post kiam ŝi diplomitiĝis el tajlora kurso de profesia mezlernejo, ŝi eklaboris en ŝtata vesto-fara fabriko. Post unu monato ŝi jam certiĝis, ke la ĉenlaboro en la fabriko ne povas lertigi ŝian arton, kiun ŝi lernis en la lernejo. Ŝi do forlasis la fabrikon aprobite de sia patrino. Je la jarfino ŝi oficiale ekfunkciigis sian entreprenon.

La tajlorejo de Ŝi Huj troviĝas en unu ĉambro de ŝia hejmo. Ĝi estis simple meblita: du kudromaŝinoj, unu ĉensteba maŝino, du tajloraj tabloj kaj unu malnova vesto-ŝranko kun spegulo servanta al la klientoj en prova vestado.

Malgraŭ tio la vestoj faritaj de ŝi jam ĝuas renomon en ŝia najbaraĵo. Ĉiam ŝia tajlorejo estas plena de klientoj. La komenca stato de ŝia tajlorejo estis embarasa. Neniu venis, tial ŝia patrino devis iri antaŭ ŝtatajn vestofarejojn por ofertado. Ŝi Huj jam faris vestojn por centoj da homoj ekde la ekfunkcio de ŝia tajlorejo. Multaj homoj fariĝis ŝiaj konstantaj klientoj.

Pasintjare ŝia juna frato Ŝi Lej diplomitiĝis el mezlernejo. Li ofte helpas sian fratinton aĉeti ŝtofon. La patrino estas sagaca kaj kapabla mezaĝulino. Ŝi diris, ke

estus bone, se ankaŭ ŝia filo interesiĝus pri vestofarado. Ŝi jam havis la ideon, kiam ŝi nomis la tajlorejon per "Huj Lej". Sed la patrino, kiu firme subtenas siajn gefilojn, okupiĝi pri individua entrepreno, diris: "Tamen mi altrudos nenion al li. Mi nur pensas, ke individua entrepreno povas pli rapide kreskiĝi lian kapablon."

Individuaj entreprenistoj ĝenerale ne posedas altan kleritecon. Ilia plejparto estas klerigita nur en meza aŭ elementa lernejo. En la lastaj tri jaroj, malmultaj gejunuloj kun alta klereco komencis sin okupi en tiu kampo.

Tu Ŝenghŭa, 37-jara, akiris magistrecon pri novajverkado en 1982. Je la fino de 1984 li rezignis sian laboron en luokompanio kune administrata de Ĉinio kaj alia lando, kaj mem establis konsultejon pri aktualaj informoj.

La konsultejo troviĝas en lia hejmo, en ĉambro tuj apud lia dormoĉambro. Ĝiaj ĉefaj aparatoj estas malnova teletajpilo, elektronika komputilo kun presinstalaĵo de la ĉina kaj angla lingvoj. Nun li sin preparas por instali telefotografian maŝinon, ĉar nun li devas ofte peti de aliaj helpon, kiam sendi aŭ ricevi fotojn estas necese.

En la lastaj tri jaroj lia konsultejo jam faris servon pli ol 300 fojojn por ĉinaj kaj alilandaj klientoj. Dank' al lia servo belga ŝtala kompanio jam subskribis ekonomiajn kontraktojn kun koncernaj departementoj de Ĉinio.

Tu Ŝenghŭa opinias, ke la individua entreprenado ne devas sin limigi en podetala vendado, manĝo-servo k.s., kaj multaj laboroj en la socia vivo estas fareblaj por individuaj entreprenistoj. Ĉiu individua entreprenisto povas fari elekton laŭ sia intereso, talento kaj kapablo. Li diris, ke lia konsultejo estas komplemento por ŝtataj informo-kompanioj. Li kredas, ke individua infor-



Ĝaŭ Deli (la dua de dekstre) en sia vestofarejo

mokonsulto havas perspektivon en la nuna Ĉinio.

La individuaj entreprenoj disvolviĝas ne nur en la nombro, sed ankaŭ en la vasteco. Iuj individuaj entreprenoj jam atingis tian skalon, ke ilia aktivado superis la antaŭan difinon en ilia fondiĝo.

Laŭ enketo de koncerna departemento, en Pekino estas proksimume mil individuaj entreprenoj, la nombro de iliaj dungitoj superas la limon difinitan de la ŝtato. Ĝenerale tiuj individuaj entreprenoj posedas kapitalon de dekmiloj kaj eĉ centmiloj da jŭanoj, kun jara profito de pli ol dekmil jŭanoj.

Ĝaŭ Deli, 35-jara, administras sian malgrandan vestofarejon en korto de Bingmasi-strateto de la Okcidenta Distrikto. Li mem funkcias kiel la direktoro kaj dungis 20 laboristojn. Antaŭe lia vestofarejo okupiĝis pri presado de modaj desegnaĵoj sur aĉetitaj veŝtoj, subvestoj kaj aliaj trikotajoj, kaj vendis ilin. Nun ĝi produktas vestojn por malpli-olunu-jaraj beboj.

Ĝaŭ Deli nun posedas kapitalon de pli ol 200 mil jŭanoj. Lia entrepreno fondiĝis en 1983, kun kapitalo de 2 000 jŭanoj. En kelkaj jaroj centobliĝis lia kapitalo. La monata salajro de liaj dungitoj estas ĉ. 100 jŭanoj.

Multaj opinias, ke tiaj individuaj entreprenoj, kia tiu de Ĝaŭ Deli, jam posedas naturon de

privata entrepreno, kaj ne devas esti rigardataj kiel individuaj. Laŭ ĉina ekonomia politiko, kaj privata ekonomio kaj individua ekonomio, kiel komplementoj de ŝtata ekonomio, estas egale kuraĝigataj. Baldaŭ publikiĝos leĝo pri privataj entreprenoj. Tiam la sociaj pozicio kaj devo de tiuj individuaj entreprenoj estos klare determinitaj. ■

Horaro de la Ĉiutaga Esperanta Disaŭdigo de Radio Pekino

GMT	Al Regionoj	Ondoj (m)	kHz
20:00-20:30	Eŭropo	40.1	7470
		32	9365
		30.1	9965
22:30-23:00	Latin-Ameriko	30.4	9860
		26	11515
11:00-11:30	Japanio, Koreio	31.6	9480
		43.1	6955
13:00-13:30	Sudorienta Azio	25.7	11650
		19.4	15385

ANTIĴVAJ TUROJ DE ĈINIO

de LAN ŜAN kaj ĜI JONG

Arkitektoj kaj ĉarpentistoj en la antikva Ĉinio konstruis multajn ĉarmajn turojn. La transversaj sekcoj de tiuj pluretaĝaj turoj el brikoj kaj ligno estas triangulaj, kvadrataj, oblongaj, pentagonaj, heksagonaj, rondaj, sektoraj kaj aliformaj. Pro malsamaj situoj kaj uzoj, la nombroj de la etaĝoj kaj la formoj estas diferencaj. Iuj havas larĝan pordon kaj fenestrojn en ĉiuj flankoj, aliaj havas dikajn murojn por varmoteno, triaj estas septitaj en multajn ĉambrojn per kruditaj klapoj aŭ lignaj vandoj kaj kvaraj estas ĉirkaŭigitaj per koridoro por belvidado. Krom la ordinaraj, oni konstruis ankaŭ multajn altajn turojn sur urbopordegoj kaj tamburajn, sonorilajn kaj maŭzoleajn turojn en la tradicia brika kaj ligna strukturo.


En la konstruado de la antikvaj turoj de Ĉinio oni tre atentis la variecon kaj ornamon de la tegmento kaj tegmentanguloj. Belaj tegmentrandoj kaj suprenlevitaj tegmentanguloj dotis la grandan tegmenton per malpezeco kaj vigleco. Tio estas unu el la karakterizaĵoj de la ĉina antikva arkitekturo. Koloraj bildoj kaj skulptaĵoj faris la lignajn ĉarpentaĵojn artaĵoj; kaj glazuritaj tegoloj kaj ornamaĵoj aŭ metalaj ornamaj akcesoraĵoj pliĉarmigis la turojn. Sendube, la ĉarpentistoj en la antikva Ĉinio alte taksis la harmonian belecon de la tuta konstruaĵaro. La dispozicio de altaj konstruaĵoj ofte estis kompletigita per arkado, ekranmuro, kiosko, pagodo, ŝtona leono, rokaĵo, lageto, bosko k.a. Ĉi-sube

ni prezentu kelkajn famajn ĉinajn turojn, kiuj reprezentas la antikvan arkitekturon de Ĉinio.

Jŭejang-turo situas ĉe la bordo de Dongting-lago en norda Hunan-provinco. Ĝi estas konstruo sur la okcidenta pordego de la

urbo Jŭejang. Inter la multaj antikvaj turoj nur ĝi konservas la originan aspekton. En la periodo de la Tri Regno (220-280) oni konstruis tie revuan turon por la surakva armeo. En la jaro 716 la turo estis pligrandigita en trietaĝan kaj ekhavis la nomon Jŭejang.

La turo Flava Gruo



En la postaj jarcentoj la turo estis rekonstruita 32 fojojn pro detruo de inundo, milito, fulmofrapo kaj incendio. La nuna turo estis rekonstruita en 1867. Ĝi altas 19.72 metrojn, kun oblonga bazamento 17.24 metrojn longa kaj 14.54 metrojn larĝa. Ĝi estas el ligna ĉarpentaĵo. La tegmenton kronas trimetra kupolo de glazuritaj tegoloj dekorita per du drakoj konkurantaj por globo. Ĝi estas tre rara inter la ekzistantaj antikvaj konstruaĵoj de Ĉinio. La unua etaĝo estas ĉirkaŭita de pordoj kaj fenestroj delikate gravuritaj kaj la dua etaĝo garnita per portikoj, kaj de tie oni povas vidi la lagon Dongting. Interne de la turo pendas kaligrafie skribitaj vortoj de literaturistoj de pluraj dinastioj, i.a. la senmorta eseo "Noto pri Juejang-turo" de Fan Ĝongjan (989-1052) de Song-dinastio (960-1279). La vortoj el ĝi "zorgi antaŭ ĉiuj kaj ĝui post ĉiuj" vaste cirkulas kaj multe edifas la homojn. Ĉirkaŭe de la turo estas Triebria Kiosko, Feo-umea Kiosko, Hŭajfu-kiosko, stelea galerio, arkado k.a., kiuj formis jam novan turisman lokon.

La turo Flava Gruo sidas sur la monto Serpento sude de Jangzi-rivero en Uhan de Hubej-provinco. La monto estas nomata ankaŭ Flava Gruo, tial la turo ricevis la nomon. Ĝi konstruita laŭdire en la jaro 223 estis plurfoje detruita kaj rekonstruita, tial la formo kaj la arkitektura stilo ŝanĝiĝis laŭ la anstataŭigo de la dinastioj. Tamen malgraŭ multfoja rekonstruado la turo Flava Gruo ĉiam restis pompa kaj impona, alte starante sur la monto apud Jangzi-rivero. Ĝi impresis kiel fea palaco, kaj multaj literaturistoj kaj eruditoj frekventis ĝin por verki poemojn kaj artikolojn kaj postlasis multajn eminentajn verkojn. Sed en 1884 la turo estis forbruligita pro najbara incendio. En oktobro 1981, je unu kilometro for de ĝia ruino, oni konstruis novan turon laŭ la formo de tiu de Ĉing-dinastio. La nova kvinetaĝa turo en formo de kvadrato altas 49 metrojn. Sur la alta turo oni povas ĉirkaŭpreni per rigardo la fluon de Jangzi-rivero, la imponan pontegon, la nubolekantan televizian turon kaj arbare starantajn domojn, ĝui la belan

vidajon kaj havi vervon por verkado. Ĉirkaŭe de ĝi oni konstruis blankajn pagodojn, stelean galerion kaj portalon, kiuj altiras al si turistojn en- kaj eksterlandajn.

La Turo de Princo Teng situas ĉe Ganĝiang-rivero en Nanĉang, la ĉefurbo de Ĝjangŝji-provinco. Ĝi estis konstruita, en la jaro 653, de princo Teng, filo de Li Jŭan, la unua imperiestro de Tang-dinastio (618-907). Dorse al la urbo, la turo rigardas malsupren al Ganĝiang-rivero. Sur la turo oni havas panoraman vidon. Multaj poetoj kaj pentristoj de la antaŭaj dinastioj plezuriĝis per vizito al la turo kaj ofte improvizis kaligrafiaĵojn kaj pentraĵojn. Historiaj libroj registris, ke en Tang-dinastio turistoj kaj senditoj el la Sudorienta Azio venis rigardi la turon informiĝinte pri ĝia imponeco. En la milo da jaroj la turo estis plurfoje detruita kaj rekonstruita. La lasta detruo okazis en oktobro 1926. Militaristo en Nanĉang forbruligis la turon, kaj restis nur steleo kun skribaĵo "Turo de Princo Teng". Post sufiĉa preparado la magistrato de Nanĉang denove konstruis ĝin sur malgranda monto proksima al ĝia ruino. La nove konstruita turo havas la imponan grandecon kiel tiu de Song-dinastio kaj kolosan tegmenton de komplika ĉarpentaĵo kiel tiu de Tang-dinastio. Ĝi altas 54.4 metrojn, havas 6 etaĝojn interne, sed aspektas trietaĝa ekstere. Apud ĝi estas parko kun rokaĵo, bosko k.a. Sur ĝi oni povas vidi la horizonton, kie kuniĝas la ĉielo kaj la rivero. Okcidente de ĝi estas mont-kontinuo kovrita de verdaj arboj. Vere rava pejzaĝo!


Penglaj-turo sidas sur Danjamonto norde de Penglaj-gubernio de Ŝandong-provinco. Ĝi estis konstruita inter 1056 kaj 1063 en la Norda Song-dinastio, plivastigita en Ming-dinastio (1368-1644) kaj riparita en Ĉing-dinastio (1644-1911). Ĝi estas duetaĝa ligna konstruaĵo rigardanta suden, kun alteco de 15 metroj.

Penglaj-turo





La Tambura Turo de Pingjang



Jüejang-turo

Ĝia teretaĝo estas ĉirkaŭita de 16 ruĝaj kolonoj, kaj la supra etaĝo garnita per portikoj. Norde de ĝi etendiĝas la vasta Bohaj-mar-o. Kiam malsupre de la turo estiĝas nebulo, la turo kvazaŭ flosas en nuboj, kaj la vizitantoj sentas sin kvazaŭ en fea mondo. Pro tio ĝi portis mitan koloron kaj iuj imperiestroj en la antikveco venis tien por serĉi feojn kaj universalajn drogherbojn. "Transiro de Maro far Ok Feoj", mito vaste konata en Ĉinio, naskiĝis ĝuste en tiu loko. Nun sur la traboj kaj kolonoj de la turo estas bildoj pri la ok feoj transirantaj Bohajmaron. Antaŭ la turo staras en malsamaj niveloj 5 grupoj da antikvaj konstruaĵoj. Inter la kioskoj, haloj, koridoroj kaj muroj kontinue eksponiĝas versparoj, gravuritaj steleoj kaj kaligrafiaĵoj kaj pentraĵoj de famuloj. Se turistoj venas al la turo

kaj hazarde vidas miraĝon, ili sentas grandan plezuron.

La Tambura Turo de Pingjang troviĝas en la urbo Linfen de Ŝanŝji-provinco. Ĝi ricevis la nomon pro tio, ke antikve la urbo Linfen nomiĝis Pingjang. Antaŭe la turo enhavis sonorilon. Laŭ notoj de historia libro kaj steleo, la loko estis trafita de eksterordinare forta tertremo en 1303 kaj preskaŭ la tuta urbo niveliĝis al la tero, disfalis la urbomuroj kaj la temploj, la oficejoj kaj la popolaj loĝdomoj. Ankaŭ la turo Pingjang estis plagita. Tamen en la sekvanta jaro ĝi estis riparita. Ĝi estis riparita ankaŭ en la postaj dinastioj, sed ĉiam konservis la originan stilon. En la ĉina liberiga milito, printempe de 1948, la garnizonanta trupo malkonstruis ĝin, kaj restis al ĝi nur brikaj bazamento kaj portalo. En 1983 la

popolo de Linfen kolektis monon kaj rekonstruis ĝin laŭ la aspekto de tiu de Ming-dinastio. La dek metrojn alta brika bazamento de la nuna kvadrata turo kun lateroj, ĉiu de 40 metroj, havas en la kvar flankoj po unu arkan pordon je 5 metroj altan kaj je 5 metroj larĝan. La pasejoj en la pordoj estas pavimitaj per ŝtonaj pecoj. Sur la bazamento staras duetaĝa turo kun kruca Ŝjeŝan*-stila tegmento. Ĝi altas 43,72 metrojn.

En Ĉinio estas ankaŭ multaj aliaj famaj turoj kun originala stilo. En oktobro 1987 la Ĉina Popola Poŝto emisiis serion da poŝtmarkoj pri famaj antikvaj turoj de Ĉinio, nome la turoj Flava Gruo, Jüejang kaj Penglaj kaj tiu de Princeo Teng. ■

* Ŝjeŝan estas originala formo de tegmento de ĉina arkitekturo. Tia tegmento duklina havas gablojn vertikalaĵn ambaŭflanke kaj ankaŭ deklivojn mallongajn sub tiuj gabloj.

LA ELEKTRA INDUSTRIO DE ĈINIO OKUPIS LA KVINAN LOKON EN LA MONDO

En la fino de 1987 la totala kapacito de la generatoroj de la elektra industrio de Ĉinio superis 100 milionojn da KW kaj la produktokvanto de elektro en 1987 superis 480 miliardojn da kWh, ke la ĉina elektra industrio okupis la kvinan lokon en la mondo, nur post Usono, Sovetunio, Japanio kaj Kanado.

PLIA RIĈRIKOLTA JARO EN ĈINIO

En 1987 la totala produktokvanto de greno de Ĉinio atingis 397 milionojn da tunoj kaj 1987 estis la dua jaro de alta produktado de greno en la ĉina historio.

De aprilo ĝis septembro pasintjare la ŝtato aĉetis sume 44 647 000 tunojn da greno, 1 800 000 tunojn da manĝebla vegetala oleo, respektive je

12.9% kaj 8.9% pli multe ol en la sama periodo de 1986. De la komenco ĝis la fino de la lasta septembro la ŝtato aĉetis sume 677 000 tunojn da kotono, je 36.8% pli multe ol en la sama periodo de 1986.

ĈINIO HAVAS 975 000 KM. DA ŜOSEOJ

En la lastaj naŭ jaroj Ĉinio akiris rimarkindan sukceson en ŝosea konstruado. Escepte de Medogubernio de Tibeto, ĉiuj ĉinaj gubernioj interkomunikiĝas per ŝoseoj kaj 93% de la ĉinaj subdistriktoj interligiĝas per ŝoseoj. Je la fino de la lasta oktobro la totala longo de la ĉinaj ŝoseoj atingis 975 000 km., je 100 000 km. pli multe ol tiu de 1978. Nun la modernaj aŭtovojoj de Pekino al Tjanĝin kaj Tangu kaj de Kantono al Ŝenĝen estas en streĉa konstruado. La unua-kaj duaperiode konstruita pekina parto de la plentrefokruĉiĝa kaj plenferma moderna aŭtovojo de Pekino al Ŝiĝjaĝuang

por veturado kun rapideco de 80-100 km. en horo estis malfermita al trafiko en la lasta novembro.


ĈINIO SUKCESE APARTIGIS AIDS-VIRUSOJN

Ĉinaj medicinaj esplorantoj unuafoje sukcesis apartigi AIDS-virusojn disde la sango de iu fremdlanda suferanto de AIDS-malsano, kiu estis en Ĉinio.

GRANDA PRODUKTOKVANTO KAJ GRANDA DEBITO DE ĈINAJ ELEKTRONIKAJ PRODUKTOJ

Pasintjare la elektronikaj produktoj de Ĉinio kreskis en produktokvanto kaj havis grandan debiton. Tiujare Ĉinio produktis 16 800 000 televidilojn, 32.5-oble kiom en 1978, inter kiuj estis 4 976 000 koloraj televidiloj; kaj 15 000 000 magnetofonojn, 319-oble kiom en 1978. La produktokvanto de elektronikaj orgenoj, lavmaŝinoj kaj elektraj ventumiloj

Ekspozicio de porfamiliaj elektraj aparatoj



rimarkinde pliĝis kompare kun tiu de 1986.

Koloraj kaj nigra-blankaj televidiloj, magnetofonoj kaj iliaj pecoj komencis eniri en la merkaton de Usono, Japanio kaj Britio.

ĈINIO HAVAS 1.07 MILIARDOJN DA LOĜANTOJ

La 11-an de novembro pasintjare la Ŝtata Statistika Buroo de Ĉinio publikigis la ĉefajn ciferojn pri esplorado de 1% de la loĝantaro de Ĉinio en 1987. Laŭ la rezulto de la esplorado, la nombro de la totala loĝantaro de la 29 provincoj, aŭtonomaj regionoj kaj municipoj de la ĉina ĉeftero estis 1 072.33 milionoj je nul horo de la 1-a de julio 1987. Kompare kun la 1 008.18 milionoj da loĝantoj triafoje censitaj je nul horo de la 1-a de julio 1982, la totala ĉina loĝantaro kreskis je 64.15 milionoj, t.e. je 6.36%, meze je 12.83 milionoj ĉiujare, t.e. je 1.24%.

LA PLEJ ALTAJ ELEKTRO-TRANSENDAJ TUROJ EN LA MONDO

Antaŭ nelonge finkonstruiĝis, ĉe la Perlo-rivera Delto de Gŭangdong-provinco en suda Ĉinio, du elektro-transsendaj feraj turoj de ultraalta tensio, la plej altaj en la mondo. La turoj altaj je 235.75 metroj kune pezas 900 tunojn. Ili staras ambaŭborde de Perlo-rivero kaj distancas inter si je 1 550 metroj. Ili servas por transsendi alttensian elektron de Ŝaĝĵaŭ-termoelektrajo al Ĝĵangmen de la provinco.

JŬAN LONGPING HONORITA PER SCIENCA PREMIO DE UN

Post ricevo de la inventa premio donita de la Monda Intelekta Proprieta Organizo de UN en 1985, ĉina rizo-hibridiga fakulo Jŭan Longping estis honorita lastatempe de Unesko per scienca premio por 1986 kaj 1987.

Li delonge esploras hibridigon de rizo. Li elkulturis tre superajn hibridigitajn riz-speciojn, kiuj estis sinsekve kaj grandaree aplikitaj en agrikultura produktado kaj donis tre bonan ekonomian efikon. Nun pli ol 20 landoj kaj regionoj faras rizo-



Jŭan Longping (meze)

hibridigan esploron kaj disvastigas hibridigitan rizon.

ĈINAJ ASTRONAŬTIKAJ FAKULOJ MEMBRIĜIS AL MONDAJ ASTRO-NAŬTIKAJ ORGANIZOJ

En la 38-a konferenco de la Internacia Astronaŭtika Federacio (IAF) okazigita en Britio la lastan oktobron, ĉefinĝeniero Lu Jŭanĝiŭ de la Ministerio de Spaconaviga Industrio de Ĉinio estis elektita kiel vicprezidanto de la federacio. En la jarkunveno de la Scienca Akademio de IAF ĉina astronaŭtika fakulo Jen Ŝinmin estis elektita kiel membro de la konsilantaro de la akademio. Nun troviĝas 28 ĉinaj membroj kaj korespondaj membroj en la akademio.

ĈINIO KVALIFIKIĜIS UNUAFOJE POR LA OLIMPIAJ PIEDPILKAJ FINALOJ

La 26-an de oktobro pasintjare la Ĉina Piedpilka Teamo venkis en Tokio la japanan per 2:0 en la lasta prepara matĉo de la orient-azia zono por la olimpiaj piedpilkaĵ finaloj kaj gajnis la ĉampionecon de la zono per

10 poentoj (kvin venkoj kaj unu perdo). Estis la unua fojo por Ĉinio eniri en la olimpiajn piedpilkaĵ finalojn.

ĈINAJ HALTERLEVISTINOJ ELSTARAJ EN LA MONDA HALTERLEVA KONKURSO

Ĉinaj halterlevistinoj gajnis 22 orajn, 4 arĝentajn kaj 1 kupran medalojn en la Unua Monda Virina Halterleva Ĉampioneca Konkursito okazinta antaŭ nelonge en Usono kaj gajnis la unuan lokon per totala teama poentaro.

PLI OL 10 000 ALILANDAJ STUDENTOJ EN ĈINIO

Laŭ statistiko de koncerna departemento, en la naŭ jaroj de 1979 ĝis 1987 Ĉinio kulturis pli ol 10 000 studentojn por 114 landoj kaj regionoj. Nun ĉ. 7 000 alilandaj studentoj lernas en Ĉinio. En la pasintaj jaroj Ĉinio akceptis pli ol 60 alilandajn studentojn, kiuj studis en Ĉinio por magistrecio kaj doktoreco.



Ĉinaj kaj japanaj piedpilkistoj en matĉo



Ĉina halterlevistino Li Hongling gajnis oran medalon de brustolevo kaj tiun de totala pezo en kategorio de 75 kg. en la ĉampioneca konkurso.

LA ĈINA INTERNACIA TURISMA AKTIVADO POR LA DRAKA JARO

1988 estas la draka jaro laŭ la ĉina kalendaro. Pro tio oni aranĝos la

internacian turisman aktivadon kun drako tiel temo en Pekino, Kantono, Ŝenŝji-provinco k. a.

La grandioza turisma aktivado en Pekino estos: Lanterna festivalo en la

15-a de la unua monato laŭ la ĉina luna kalendaro; drakkajta turniro en la unua tagdeko de aprilo; drakboata konkurso en la Drakboata Festo (la 18-a de la junio) kaj drakluda konkurso en la Festo de Duobla Naŭa (la 9-a de la naŭa monato laŭ la ĉina luna kalendaro).

KRESKAS ĈIUJARE LA LANDLIMA KOMERCO INTER ĈINIO KAJ SOVETUNIO

De januaro ĝis la unua tagdeko de oktobro 1987 la totala valoro de importaĵoj kaj eksportaĵoj ĉe la landlimo inter Hejlongĝjang-provinco de nordorienta Ĉinio kaj la malproksim-orienta regiono de Sovetunio atingis 58 milionojn da svisaj frankoj, je 94.3% pli multe ol tiu de 1986, kaj tio estis kulmina en la historio.

Kun la komerca kresko, krom la malnovaj komercuroj Suĵfenhe kaj Mangŝoŭli, oficiale malfermiĝis al la landlima komerco en 1987 ankaŭ la havenoj Hejhe de Ĉinio kaj Blagoveŝĉensko (Hajlanpaŭ) de Sovetunio kaj la havenoj Tongĝjang de Ĉinio kaj Niĵnoja Leninskojo de Sovetunio. Lastatempe la reprezentantoj de la provinco kaj Sovetunio intertraktis kaj esprimis deziron pligrandigi la landliman komercon, kio montras brilan perspektivon de la komerco.

ĈINIO ATENTAS KONSTRUADON DE KULTUR-DOMOJ

La diversnivelaj kultur-domoj de Ĉinio estas organizantoj kaj gvidantoj de kulturaj aktivadoj en diversaj lokoj. En la pasintaj jaroj la ĉina registaro donis ĉiam pli grandan atenton al la konstruado de kultur-domoj. En 1987 koncernaj departementoj de Ĉinio kune organizis konkurson pri arkitekturaj projektoj de kultur-domoj. En malpli ol unu jaro ili ricevis ĉ. 1 100 tiajn projektojn kaj 3 400 desegnojn el diversaj partoj de la lando. La projektoj karakteriziĝas per novaj formoj kaj variaj stiloj. Iuj el ili estas faritaj surbaze de serioza esplorado kaj certagrade efektiveblaj.

Post juĝado de ekspertoj 105 projektoj estis premiitaj. La konkurso ebligis krei konstruadon de kultur-domoj en ĉina nacia stilo.

TERSURFACAJ FAŬLTOJ EN ŜJI'AN

De post 1976 aperis 11 tersurfacaj faŭltoj kun malsamaj longecoj kaj larĝecoj en areo de 150 kvadrataj kilometroj en Ŝji'an, la ĉefurbo de Ŝenŝji-provinco, en la okcidenta parto de Ĉinio. La faŭltoj iras de nordoriento al sudokcidento. Ilia totala longo estas pli ol 40 km., el kiuj 35 km. troviĝas en dense loĝata regiono. Kun pligrandiĝo de la faŭltoj, la monsumo por kovri la perdon kaŭzitan de la faŭltoj kreskas je pli ol miliono da jŭanoj ĉiujare, kio grave influas la protektadon kaj konstruadon de la urbo.

Post 7-jara esplorado ĉinaj geologoj konkludis, ke la faŭltoj estis kaŭzigitaj de moviĝo de stratuma faŭlto k.a.



Alilandaj studentoj lernas la ĉinan gastronomion.

(Daŭrigo de p. 25)

estis fundamente samaj, kaj ili kune aŭskultis multajn lecionojn. La diagramo montras, ke en la komenco la meznombra poentaro de la ordinara klaso estis iom pli alta ol tiu de la knaba klaso, sed post la 2.5-jara lernado de fundamentaj teoriaj lecionoj la meznombra poentaro de la knaba klaso estis pli alta ol tiu de la ordinara klaso. Krome, en la 4-a semestro la studentoj de la knaba klaso 108-homfoje studis lecionojn de alta klaso kiel nedevigajn, dum tiuj de la ordinara klaso 92-homfoje. Tial la meznombra poentaro de la antaŭaj en la semestro estis pli alta ol tiu de la lastaj.

Sufiĉe granda nombro da geknabo-studentoj estis akceptita antaŭtempe je unu aŭ du jaroj post ekzameno kiel esploristo-studentoj. La 28 geknabo-studentoj de la kvara staĝo diplomitaj en 1985 estis akceptitaj kiel esploristo-studentoj. En la 1986-a ekzameno kune farita de Ĉinio kaj Usono por varbi studentojn por fizika doktoreco, 73 homoj estis akceptitaj, inter kiuj 33 estis studentoj de la universitato. 8 geknabo-studentoj sin anoncis al la ekzameno kaj ili ĉiuj estis akceptitaj. Iuj el ili gajnis la duan, kvaran, kvinan kaj okan lokojn en la ekzameno. Krome, 13 studentoj de la knaba klaso gajnis la plej altan premion de la universitato "Premio de Ĝuo Moĵuo" kaj "Premio Hŭaŝing".

SANA KRESKADO

Multaj iam maltrankvilis, ke tro frue ŝarĝi la

geknabo-studentojn per peza lerno-tasko malhelpos ilian normalan kreskadon. Kiam oni venis al la knaba klaso kaj vidis la streĉan lernadon kaj viglan vivon de la studentoj kaj iliajn rozajn vizaĝojn kaj sanajn korpojn, malaperis ilia maltrankvilo.

Por garantii la sanon de la geknabo-studentoj, la Ĉina Universitato de Scienco kaj Tekniko alprenis serion da bonefikaj rimedoj. Ĉiutage ili faras unuhoran sporton: Ili kuretas, ludas pilkon en la vasta korto kaj naĝas. Ĉiusemajne ili havas du sportajn lecionojn kaj tri sportajn aktivadojn post lecionoj. Ili organizis teamojn de flugpilko, piedpilko, vejcio kaj aliaj kaj ofte faras konkurson. Gepatroj de multaj geknabo-studentoj diris, ke vizitante la klason iliaj geknaboj ŝanĝis sian kvietemon, plialtiĝis kaj fortikiĝis. La antaŭtempa vizitado de universitato ne malhelpis iliajn sanon kaj kreskon.

* * *

La knaba klaso funkciis ne tre longe. Ĝiaj instruado kaj administrado estas ankoraŭ senĉese plibonigataj. Sed la akiritaj sukcesoj montris, ke ĝi estas unu el la bonefikaj vojoj por rapide elkulturi kompetentulojn. 12 ĉinaj universitatoj, inkluzive la Pekinan Universitaton kaj Ĉinghŭa-universitaton, funkciigas knaban klason. La Ĉina Universitato de Scienco kaj Tekniko funkciigas preparan kurson de la knaba klaso en la mezlernejo Ĝingŝan de Pekino kaj en la Supera Mezlernejo de Suĝou. ■

Monturbo Ĉongĉing

Teksto de **ĜENG ĜENĜJE**

Fotoj de **ŜEN ĈEN**

De Luĝou ŝipinte laŭ Jangzi-rivero, mi atingis la urbon Ĉongĉing, ĉe la kunfluejo de la rivero Jangzi kaj Ĝjaling.

MONTA, NEBULA KAJ VARMA URBO

La urbo Ĉongĉing ampleksas 9 distriktojn kaj 12 antaŭurbajn guberniojn, kun areo de 22 300 kvadrataj kilometroj kaj 14.27 milionoj da loĝantoj. Ĝi estas la centro de ekonomio, komerco, akva kaj tera trafiko en la supra baseno de Jangzi-rivero, la plej granda urbo kaj industria bazo en sudokcidenta Ĉinio.

La urba centro profunde impresis min, ke ĝi multe diferencas de aliaj urboj de Ĉinio:

tie malmulte videblas biciklantoj, la stratoj estas kompare mallarĝaj, la domoj kaj stratoj konstruis laŭ montodeklivoj. Sur montsupro kaj ĉe monttalo bonaranĝe sidas domoj. En la urbaj kvartaloj, la plej alta loko estas 280 metrojn super la marnivelo, dum la plej malalta nur 160 metrojn, kio estas malofte videbla en Ĉinio. Tial, en Ĉongĉing tre multaj estas la ŝtuparoj, sur kiuj klopodas ĉiuj, ĉu junuloj ĉu maljunuloj, ĉu viroj ĉu virinoj, iam eĉ kun pezaj ŝarĝoj, tiel ke nature ne povas ludi sian rolon bicikloj. Oni diris al mi, ke en la 50-aj jaroj tie ofte vidiĝis portseĝoj portataj de du homoj kaj servantaj al vojaĝantoj. Renkontante homojn, la antaŭa seĝ-

portanto do laŭkutime kriis: "Nubo ŝvebas sur la ĉielo!", dum la malantaŭa respondis: "Iras homo sur la tero!" Renkontante kotan kavon, la antaŭa kriis: "Brilas la ĉielo!", la malantaŭa respondis: "Surtere estas akvovokavo!" Nun la portseĝojn jam anstataŭis la kablotramoj, supren kaj malsupren veturantaj sur relojo laŭ montodeklivoj. Krome, kiel trafikilon, oni konstruis ankaŭ transriveran telferon super Ĝjaling-rivero.

Ĉongĉing kuŝas ĉe la kunfluejo de la riveroj Jangzi kaj ĝia branĉo Ĝjaling, kiuj dividis la urbon en la nordbordan, sudbordan kaj mezan partojn, dum la urba centro aspektas kiel duoninsulo. Pro ĝia speciala geografia pozicio, tie la vento estas malpli forta. Ĉirkaŭ la urbo kuŝas multaj rizkampoj, el kiuj vaporiĝas akvo grandkvante, tiel ke Ĉongĉing estas nomata ankaŭ nebula urbo, krom la nomo monturbo. Kiam la nebulo estas tre densa en vintro, oni eĉ ne povas klare vidi la vid-al-vide renkontatajn pasantojn. Same kiel la urboj Uhan kaj Nankino ĉe Jangzi-rivero, Ĉongĉing estas tre varma en somero kaj unu el la tri grandaj "fornoj" en Ĉinio.

En Ĉongĉing ekzistas multaj antikvaj vidindejoj kaj turismaj pitoreskejoj, kiaj Pibaŝan-, Nanĉjŭan-, Ĝinjunŝan- kaj Bejĉjŭan-ĝardenoj ĉe Ĝjaling-rivero k.a. Tre ĉarma estas la nokta



pejzaĝo de Ĉongĉing, rare videbla en aliaj urboj de Ĉinio. Iun vesperon, mi suriris Pibaŝanmonton en la urbocentro kaj havis iluzion esti en tre luksa palaco: Ĉie brilas lampoj en la urbo.


MARŜI LAŬ LA PORDMALFERMA VOJO

Antaŭ 3 000 jaroj Ĉongĉing estis ĉefurbo de Ba-regno kaj havis certan disvolviĝon en la postaj dinastioj. Antaŭ 100 jaroj, alilandaj ekspediciistoj unu post alia entrudiĝis tien por serĉi oron kaj aliajn valoraĵojn, unue venis britoj kaj sekve usonanoj, japanoj kaj francoj. En 1901 Ĉongĉing devigite fariĝis komerca haveno, de tiam grandaj kvantoj da lokaj produktaĵoj torentis eksterlanden laŭ Jangzi-rivero, dum fremdlandaj varoj sekve svarmis en Siĉuan. En la periodo de la

Kontraŭjapana Rezistmilito, post kiam Nankino estis okupita de japanaj agresantoj, Ĉongĉing fariĝis provizora ĉefurbo de la registaro de Kuomintango, rapide kreskis la loĝantaro, plivastiĝis la urbaj kvartaloj, kaj sinsekve fondiĝis tie la alilandaj ambasadorejoj. Post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, komenciĝis la nova periodo de Ĉongĉing en kontakto kun aliaj landoj.

Precipe de post 1978, kiam Ĉinio komencis pordmalferman politikon, Ĉongĉing rapidigis siajn paŝojn en praktiko de pordmalferma politiko. En 1980 Ĉongĉing fariĝis komerca haveno malferma al aliaj landoj. En 1983, la ŝtato decidis provi la sintezan reformadon de la ekonomia sistemo en Ĉongĉing, kaj donis al la urbo la ekonomian rajton egalan al tiu de la ĉinaj provincoj same kiel tion al Pekino, Ŝanhajo kaj Tjanĝin.

La kuŝanta budhostatuo en Dafoŭan



Urbestro Ŝjaŭ Jang

La reformado reunigis tiun maljunan industrian bazlokon. En la lastaj jaroj, la urbo enkondukis pli ol 200 kompletojn da avangardaj teknikoj kaj instalaĵoj, kiuj reformis la fundamentajn instalaĵojn kaj ŝlosilajn produktajn procedojn de maljunaj entreprenoj de elektroniko, maŝinfarado, metalurgio, kemiindustrio, ŝpinteksado kaj manĝaĵprilaborado k.a., kaj iliaj teknikoj atingis la nivelon de la fino de la 70-aj jaroj kaj la komenco de la 80-aj jaroj.

La ekonomia disvolviĝo ne nur faris la grandan urbon kun pli ol 7 000 fabrikoj ekonomia centro ĉe la supra baseno de Jangzi-rivero, sed ankaŭ rimarkinde levis la vivnivelon de la urbanoj. En la jaroj post la reformado la urbo jam donis al la ŝtato profiton kaj imposton de 5.3 miliardoj da jŭanoj. En la urbo, la meznombra salajro de la oficistoj kaj laboristoj en la ŝtataj entreprenoj leviĝis de 772 jŭanoj en 1982 al 1 246 en 1987, dume la meznombra neta enspezo de la ĉirkaŭurbaj kamparanoj leviĝis de 226 jŭanoj al 438.

En Ĉongĉing, mi intervjuis la urbestron Ŝjaŭ Jang. Li diris al mi, ke en Ĉongĉing estas modera la klimato, abundaj produktaĵoj, sufiĉaj energio kaj akvofonto kaj



La turisma loko Ĝinjunšan

granda industria bazo, tial ĝi estas la starpunkto por ekspluati sudokcidentan Ĉinion. En la 7-a Kvinjara Plano de Ĉinio (1986-1990), Ĉongĉing finkonstruos novan flughavenon por aviadiloj Boeing-747, faros plurajn gigantajn konstruojn por elektrizi la Ĉongĉing-Ĉengdu-an kaj Ĉongĉing-Gujjang-an Fervojojn k. a. En la venontaj 5 jaroj, la jara meznombra kresko de ĝia ekonomio superos 8% kaj la import-eksporta negoco duobliĝos. Kun rapida praktiko de la pordmalferma politiko Ĉongĉing fariĝos internacia urbo en la venontaj jaroj.

ŜTONSKULPTAĴOJ DE DAZU

Dum mia vojaĝo mi vizitis ankaŭ la antikvajn ŝtonskulptaĵojn de Dazu.

La tieaj ŝtonskulptaĵoj aperis en 895 p.K. Ilia skulptado daŭris ĉ. 400 jarojn kaj ĉesis en 1279 p.K. kiam pereis la Suda Song-dinastio. Nun tie vidiĝas 50 000 skulptaĵoj de budhaj statuoj kaj pri budhismaj rakontoj, kiuj dislokiĝas en pli ol 40 lokoj en Dazu-

gubernio. Plejparto de ili estas en Baŭding-monto. Akompanate de 56-jara s-ro Deng, estro de la antikvaj-protektejo de tiu gubernio, mi venis al Dafouan de Baŭding-monto.


Ĝi estas U-forma ravino, la skulptitaj budhoj troviĝas sur la orienta, suda kaj norda montaj purpuraj rokmuroj kun alteco de 4 ĝis 14 metroj. De la maldekstra flanko de la antikva templo Ŝenŝou, laŭ zigzaga ŝtona ŝtuparo mi iris malsupren ĝis la ĉarma ravino, kie kreskas bambuoj, arboj, floroj kaj flustras rivereto.

En la ŝtonkavernoj de norda Ĉinio, la budhaj statuoj konsistigas la ĉefan parton. Al la kavernoj en la sama loko mankas kompleta projektado, tial estas similaj ŝtonkavernoj. Tamen la ŝtonkavernoj en Dazu estis aranĝitaj laŭ kompleta projekto. Tie ĉiu grupo da skulptaĵoj esprimas kompletan rakonton. Tio estas la unika en Ĉinio. Estas admirinde, ke plenas forta vivetoso de ŝtonskulptaĵoj pri mitoj kaj filozofiado, kiaj bovopaŝtado, kokobredado, fiŝado, porkonutrado, kantado,

dancado, drinkado, admono pri bonkonduito, geedziĝo, hejmo-forlaso, nutrado de gefiloj, geedza vivo k.a. Estas serio da ŝtonskulptaĵoj "Malordo post Ebriiĝo", farita laŭ prediko de Ŝakjamunio, en kiu la fondinto de budhismo parolis al siaj disĉiploj pri malutilo de drinkado, sen troa religia koloro. Tie vidiĝas kvar bildoj: Post ebriiĝo la patro ne konas sian filon, nek pliaĝa frato sian fraton, nek la edzo sian edzinon nek la pliaĝa fratino sian fratino. La skulptaĵoj montras iliajn malsamajn mienojn post la ebriiĝo kaj aludas iliajn interrilatojn post sobriĝo. En la ŝtonskulptaĵaro "Fiŝisto", la fiŝisto estas 155 centimetrojn alta, portas bambuan ĉapelon sur la kapo kaj ĉemizon, staras en fiŝboato ĉetalie portante korbeton, movas la julon laŭ la fluo, por albordegi sian boaton, kio bone montras liajn ĝojon post abunda rikolto. Malantaŭ la fiŝisto petolema simio, sin pendigante kun la kapo malsupren sur arbobranĉo, etendas siajn fingrojn en la korbon por ŝteli liajn fiŝojn.

Inter la skulptaĵoj sur Baŭding-monto estas multaj statuoj de Avalokitesvaro afabla kaj serioza. Tie plej alloga estas la mil-braka Avalokitesvaro 3 metrojn alta. Malantaŭ ŝi pave disetendiĝas mil brakoj, ĉiu kun okulo sur la mankavo, iuj kun ilo kaj aliaj kun muzikilo. La pozoj estas malsamaj.

S-ro Deng diris al mi, ke multaj vizitintoj volis kalkuli la nombron de la brakoj de Avalokitesvaro, tamen ili ĉiuj malsukcesis, kaj plie la kalkulado kapturnis ilin. Poste, por la kalkulado oni preparis paperslipojn por alglui ilin al la manoj de la statuo, tamen ili ne povis klare kaj ĝuste alglui la slipojn pro la kompleksa situo de la brakoj. Fine, la metiistoj, distinginte la orumitajn de la neorumitajn manoj de Avalokitesvaro, kaj sukcese solvis la malfacilon. La statuo havas sume 1 007 brakojn. ■



Parto de la urbo



Ĉongĉing en nokto



Mangô kun loka gusto



Kajo de Ĉongĉing-haveno



En strato de la urbo



Mikroaŭtoj faritaj de la Ĉang'an-a Maŝin-fabriko



Statuo de la Mil-
braka Avalokites-
varo en Baŭding-
monto



Kablotramoj ĉe
bordo de Jangzi

Homo kaj fajro

Antaŭ tre tre longe homoj ne konis fajron, des pli ne sciis uzi ĝin. Kiam ili estis malsataj, ili povis nur manĝi krudan viandon kaj sovaĝajn fruktojn.

Foje pluvegis. Subite aŭdiĝis tondrego. Arboj estis fulmofrapitaj, arbaro ekbrulegis kaj la fajro disvastiĝis.

La granda fajro en ventego ruliĝis al homoj, kun densa fumo. Ili rigardis ĝin monstro pli terura ol ia ajn rabobesto. Ili kriante kuris al sekura loko.

La fajro iom post iom estingiĝis. Iuj scivolemaj kuraĝuloj singarde iris al bruligita loko por esplori.

Grandegaj arboj karbiĝis kaj sovaĝaj bestoj mortis de la fajro.

Pro malsato la homoj deŝiris iom da besta karno rostita de la fajro por gustumi. Ili ne atendis, ke la rostita karno estas pli bongusta ol la kruda.

Ili ekkomprenis, ke la fajro estas utila, kaj portis brulantajn branĉojn al sia loĝkaverno.


Sed ilia loĝejo estis okupita de rabobestoj. Ili estis pretaj batali kontraŭ la bestoj, sed ekster ilia atendo, la bestoj forkuris, ekvidinte la fajron.

Ho, kia bona fajro! Ĝi ankaŭ povas fortimigi rabobestojn. Ili do bruligis branĉojn nokte kaj re plu timis atakon de bestoj.

Ekde tiam ili konservis fajron por rosti kaptitajn bestojn kaj

lumigi la kavernon nokte. Kaj en vintro fajro donis al ili varmon. En ĉiu kolektivo estis deĵoranto, kiu konservis fajron speciale. Se li senatente estingis fajron, li estis severe punata.

Poste oni elpensis metodon fari fajron. Eĉ nun la fajro estas alte estimata de homoj. Ĉu vi ne vidas ruĝan torĉon sur flagoj? Ĝi signifas lumon kaj montras vojon al homoj. ■



KONKURSO DE EPĈ-AMIKOJ

Por akceli amikecon kaj interkomprenon kaj por ke ĉiuj zorgu pri la disvolviĝo de nia movado, ni decidis okazigi decembre de 1988 konkurson de EPĈ-amikoj. Ni invitas niajn legantojn al tiu konkurso.


Tiuj, kiuj bone legos EPĈ de 1988, sukcesos en la konkurso. Ni aperigos la

konkursajn temojn kaj regulojn en la lasta numero de EPĈ 1988, kiun ni petas vin atente legi.

Ni premios la unuajn kvar elstarajn per ĉin-stila murtapiŝo, la duajn ok per ĉina silka brokato kaj la triajn 30 per Esperanta libro kaj donacos memoraĵon al ĉiuj aliaj partoprenantoj.

La Red.

ĈINA ESPERANTO-ELDONEJO:



ALBUMO PRI ĈINIO

Kompil. la redakcio de "ĈINIO". 96p. 25cm. 85-Es-175P
Prezo: £1,90 US\$3,90

Kun pli ol cent koloraj bildoj konigantaj Ĉinion pri ĝiaj geografio, historio, popolo kaj registaro, ekonomio, literaturo kaj arto, sciencoj, edukado, higieno kaj sporto, vidindaj lokoj kaj socia vivo.

VOJAĜO TRA ĈINIO

Kompil. la redakcio de EPĈ. 136p. 26cm. 85-Es-284P
Prezo: £8,80 US\$12,50

La albumo konigas 23 turismajn urbojn de Ĉinio kaj la Tri Gorĝojn de Jangzi-rivero. Ĝi helpas vin koni ĝenrojn, pladojn kun loka gusto, modernajn hotelojn kaj ĉefajn vidindajn lokojn. Kun 166 koloraj bildoj kaj 25 klaraj turismaj mapoj.

40 VIDINDAJ LOKOJ EN ĈINIO

Trad. Censinio. 252p. 18.5cm. 12-Es-1825P
Prezo: £1,90 US\$3,90

Gvidlibro pri 40 plej famaj pitoreskejoj en Ĉinio. Krom la priskriboj pri la pejzaĝoj vi legos en ĝi ankaŭ interesajn legendojn kaj popolrakontojn pri tiuj lokoj. Kun koloraj bildoj kaj ilustraĵoj.

PITORESKA PEKINO

Trad. Zoŭ Guohiang k.a. 74p. 18.5cm. 17-Es-1827P
Prezo: £0.95 US\$2,00

La libreto kun mapo, pentraĵo kaj koloraj bildoj, konigas 19 vidindejojn en Pekino. En la enkonduka artikolo "Pekino hieraŭ kaj hodiaŭ" oni skizas la historion kaj evoluon de la urbo.

DEK SES URBOJ DE ĈINIO

176p. 18.5cm. 17-Es-1885P. Prezo: £1,90 US\$3,90

La ĝenerala skizo pri la historio, ekonomia konstruado, kulturo kaj eduko k.a. de 16 ĉinaj grandaj urboj. Kun koloraj kaj nigrablankaj bildoj.

GVIDLIBRO PRI PEKINO

Kompil. Laj Hajlong. 150p. 18.5cm. 12-Es-2067P.
Prezo: £1,55 US\$2,85

Ĝi servas kiel helpanto al vizitantoj al Pekino, konigante vidindajn lokojn, hotelojn, restoraciojn, trafikajn liniojn, gravajn telefonnumerojn ktp. Kun mapo kaj koloraj bildoj.

Mendu ĉe: Libroservo de UEA
Peranto de EPĈ

aŭ Internacia Libro-Komerca Kompanio
de Ĉinio, Esperanta Sekcio, P.O.
Kesto 313, Beijing, Ĉinio

LEGENDO PRI JARO

de ŜJAŬ NAN

La antikvaj ĉinoj nomis la lastan tagon de la lunjaro la "jarlimo". En la unua tago de la nova jaro ĉiu familio eksplodigis krakfajraĵojn kaj ĉe la renkontiĝo oni salutis unu alian per "gratulon, gratulon". La moro devenis de antikva legendo.

La legendo diras, ke en la pratempo, ĉie sur la tero vivis boaoj kaj rabobestoj. Vivis ankaŭ giganta monstro nomata Jaro, ĝi eliris kaj buŝe entiris homojn nokte de la lasta tago de la lunjaro. Je unu entiro ĝi povis mortigi sennombrajn homojn.

La homoj minacataj de la danĝero neniel povis vivi. Kelkaj sagacaj kuraĝuloj interkonsiliĝis: "Ni ne devas atendi la morton, sed ĉiamaniere subigi la gigantan monstron." Hong Ĝjun el ili diris: "Mi subigu ĝin!" Li estis maljunulo kun blankaj hararo, barbo kaj brovoj.

Li trovis Jaron kaj diris: "Jaro, vi mortigas homojn. Tio ne konvenas."

Vidante, ke la maljunulo aspektas tro malforta, Jaro malice ekridis: "Kio vi estas? Ne ŝovu la nazon en fremdan vazon!"

Hong Ĝjun diris: "Vi estas granda kapablulo. Vi povas entiri en la buŝon ĉion en la mando. Ĉu vi kuraĝas enbuŝigi per entiro boaojn sur la monto?"

Jaro tabuis, ke oni rigardas ĝin kiel timemulon. Ĝi flame res-

pondis: "Tio estas nenio." Ĝi foriris kaj buŝe entiris la boaojn. Hong Ĝjun admiris: "Vi, bravulo! Ĉu vi kuraĝas buŝe entiri leonon sur la najbara monto?" Jaro diris: "Tio estas facila!" Ĝi do enbuŝigis la leonon per entiro. La maljunulo demandis plu: "Jaro, sur la Tigrokapa Krutaĵo tiranas tigro. Ĉu vi kuraĝas ŝoki ĝin?" Jaro mortigis ankaŭ la tigron.

Sekve de tio, ĉiuj boaoj, leonoj kaj tigroj forfuĝis en montajn arbarojn.

Per la potenco Jaro, Hong Ĝjun forpelis la boaojn, leonojn kaj tigrojn kaj rajdis sur ĝi al la ĉielo.

Li ja estis feo.

Ĉe la adiaŭo, li diris al la homoj, ke je la jarlimo ĉiu familio algluu ruĝan paperon al la pordo, por ke Jaro ne ŝteliru al la homa mondo kaj faru malbonaĵojn. Ĉar ĝi plej timis ruĝan koloron.

Ekde tiam ĉiu familio algluis ruĝan paperon al la pordo je la jarfino, kaj pli poste, oni skribis bonaŭgurajn vortojn sur la ruĝa papero kaj tiel aperis versparoj. Ĉe la renkontiĝo en la unua tago de la nova jaro oni salutis unu alian per "gratulon", ke ili ne estis manĝitaj de Jaro. Tiamaniere la moro daŭras jaro post jaro. ■



MASAĜO (IV)



16

FRAPADO DE LA KOLAJ MUSKOLOJ SUB LA OKCIPITALO

Movoj: Premu la orelojn antaŭen per la polmoj, kun fingroj etenditaj malantaŭen ĝis sub la okcipitalo. Tenu la fingrojn iom for de la haŭto, metu la montrajn fingrojn sur la longajn, levu supren la longajn kaj frapu per la montraj la kolajn muskolojn sub la okcipitalo, kiel en la bildo 16. Tenu vin kviete kun ermitaj okuloj, liberigu vin de ĉiaj pensoj kaj kalkulu silente la fojojn de la frapado. Spiru nature.

Fojoj: 40, 60 aŭ 100.

Efiko: Preventi surdiĝon, fortigi la memor-kapablon kaj plibonigi la funkcion de cerbeto.

MASAĜO DE LA SUBVENTRO

Teniĝo: Kun la supra parto de korpo duonkuŝanta kaj kun la malsupra etendita.

Movoj: Kuŝigu la supran parton de korpo nature sur dika kotona litkovrilo en lito, por ke la supra parto estu iom pli alta ol la malsupra. Tenu vin kviete,

liberigu vin de ĉiaj pensoj kaj kalkulu silente la fojojn de la ekzercado. Ne ŝveligu nek malŝveligu la ventron. Metu la dekstran manon sur la subventron kaj la maldekstran sur la dorson de la dekstra mano kaj masaĝu la subventron de maldekstre dekstren, kun la umbiliko kiel la centro. Faru la ekzercadon kiel en la bildo 17. Unu cirkla masaĝo estas kalkulita kiel unu fojo. Poste reciproku la manojn kaj masaĝu inverse. Spiru nature.

Fojoj: Po 20-30.

Efiko: Stimuli peristaltan moviĝon de la dika kaj maldika intestoj, fortigi la elastecon de la intestoj kaj stomako, akceli digeston kaj plibonigi la sekrecian funkcion de la intestoj kaj stomako.


MASAĜO DE LA DUFLANKA SUBBRUSTO

Teniĝo: Kiel supre.


Movoj: Metu la manojn ĉe la ripo-finojn kiel en la bildo 18. Forte masaĝu per la polmoj oblikve malsupren ĝis la subven-



17



18




19



20



21



22

tro. Nur malsupren! Spiru nature.

Fojoj: 20-30

Efiko: Kiel supre.

MALSUPREN-MASAĜO DE LA VENTRO

Teniĝo: Kiel supre.

Movoj: Metu la maldekstran manon sur la supran parton de la ventro kaj la dekstran sur la dorson de la maldekstra, kiel en la bildo 19. Masaĝu malsupren de la maldekstra ripo-fino al la dekstra. Nur malsupren! Poste reciproku la manojn kaj masaĝu de la dekstra al la maldekstra. Spiru nature.

Fojoj: Po 20-30.

Efiko: Kiel supre.

MASAĜO DE LA VENTRO

Teniĝo: Kiel supre.

Movoj: Metu sur la ventron la kunmetitajn manojn kun la dekstra sur la maldekstra. Cirkle masaĝu la ventron en la dekstruma direkto. Cirkla masaĝo estas unu fojo. Faru la ekzercadon kiel en la bildo 20. Poste reciproku la manojn kaj masaĝu inverse. Tenu vin kviete, liberigu vin de ĉiaj pensoj kaj spiru nature.

Fojoj: Po. 20-30.

Efiko: Kiel supre.

MASAĜO DE LA TIBIOJ

Teniĝo: En sida aŭ stara pozo (sida pozo preferinda).

Movoj: Iom fleksu la dekstran


gambon post sidiĝo, firme premu la polmojn al la genua artikolo kiel en la bildo 21 kaj masaĝu forte malsupren ĝis la maleoloj. Ĉirkaŭprenu la maleolojn per la manoj kun la dikfingroj antaŭe kiel en la bildo 22 kaj masaĝu supren ĝis la genukavo. Unu fojo konsistas el frotado supren kaj malsupren. Poste faru la masaĝon al la maldekstra gambo. Tenu sin kviete kaj liberigu vin de ĉiaj pensoj. Spiru nature.

Fojoj: Po 20-30.

Efiko: Dilati la angiojn, grandigi la flukvanton de sango kaj mildigi la edemon kaj doloron ĉe la artikoloj kaj suroj. ■

(Daŭrigota)

LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO



1. Langōu

2. Uŝej

3. Ĝangje-gubernio

4. Ĝiŭĉjŭan

5. Dunhŭang-gubernio

6. Ĝji'an-gubernio

7. Ĉongĉing

8. Dazu-gubernio

9. Anhuj-provinĝo

Vizito al la hejmloko de ginsengo

Laŭ legendo, la tonika ginsengo jam estis konita en la epoko de Hŭangdi, la prapatro de la ĉina nacio. La plej frua noto pri apliko de ginsengo en Ĉinio aperis en la

periodo de Printempo kaj Aŭtuno (770-476 a.K.). Ankaŭ la modernaj sciencoj kaj teknikoj ripetade pruvis, ke ginsengo havas rimarkindan efikon en sanigo, longigo

de vivo ktp. Kiu el ĝiaj specoj estas la plej bona en Ĉinio? En la pasinta jaro la Ŝtata Komisiono de Sciencoj kaj Teknikoj de Ĉinio kaj la Komisiono de Sciencoj kaj Teknikoj de Ĝjilin-provinco publikigis jenan novaĵon:


“Ŝinkajhe-ginsengo produktita en la Ĉangbaj-montara regiono havas originalan naturon. Ĝia kvalito superis tiun de la japana ruĝa ginsengo kaj korea ginsengo. Tio estas sciencsplora frukto kun internacie avangarda nivelo.”

La novaĵo tre interesis min. Mi decidis iri al Ĝji'an-gubernio de Ĝjilin-provinco, produktejo de Ŝinkajhe-ginsengo kaj la “hejmloko de ginsengo”.

Ĝji'an-gubernio situas en la suda Ĝjilin-provinco en la Nord-oriento de Ĉinio. La landlima Jalu-rivero inter Ĉinio kaj Koreio preterfluas la sudorienton de la guberniurbo. Ĝi troviĝas en la Ĉangbaj-montara regiono. La trajno veturas tra montoj kaj atingas malgrandan ebenaĵon ĉirkaŭitan de montoj. La urbeto Ĝji'an sidas en la mezo de la ebenaĵo. Ĝji'an-stacio estas la lasta stacio de la fervoja linio en la ĉina teritorio.

Mi venis al la Ginsenga kaj Cervokorna Kompanio de Ĝji'an, la ĝenerala direktoro Tang Anĵang elprenis skatolon da ruĝaj ginsengoj kaj diris al mi: “Jen Ŝinkajhe-ginsengo produktita en nia loko.” Tia ginsengo havas altan produktokvanton. Post prilaboro ĝi fariĝas brunruĝa,

Lavo de ginsengoj



kutikle diafana kaj solida, ĝiaj sulkoj malgrandiĝas kaj ĝia flava ŝelo estas malmulta, sen kreviĝo kaj malpleno ene. Tia bonkvalita produktaĵo estas rigardata de fakuloj kiel "unuaklasa ginsengo".

La sukceso estas malfacile atingita. La baseno de Ŝinkajhe-rivero havas bonegajn naturajn kondiĉojn por kreskado de ginsengo. En la regiono estas vasta primitiva arbaro, la grundo entenas multan organikajon kaj estas ne poluciita. La duonmara klimato kaj sufiĉa sunlumo utilas al kreskado de ginsengo. Legendo cirkulanta en la loko diras, ke antaŭ tre tre longe, bela kaj bonkora ginsengo-knabino venis tien por kuraci malsanon de homoj kaj trovis, ke tri demonoj faras malbonaĵojn al la popolanoj. Ŝi brave luktis kontraŭ la tri demonoj kaj venkis ilin. Kaj oni restigis ŝin sincere. De tiam ginsengo kreskas en la loko. Frue antaŭ 300 jaroj oni komencis kultivi ginsengon en la baseno de Ŝinkajhe-rivero. Ĝji'an longtempe eksportas "Güandong-ginsengojn" al aliaj landoj. Ili ricevis admiron de fakuloj pro siaj bela formo kaj bona kvalito: longaj korpo kaj radikoj, maturiĝa ŝelo kaj profunda sulko.

Sed longtempe oni aplikis antikvajn kaj postiĝintajn kultivajn metodojn kaj prilaboran teknikon, tial la produktokvanto de ginsengoj haltis ĉe malalta nivelo. En la internacia merkato la vendokvanto de koreaj ginsengoj estis granda. En vendo de koreaj ginsengoj, iuj ginsengaj komercistoj prenis ruĝajn ginsengojn de Ĉinio kiel aldonan vendaĵon, tio damaĝis reputacion de la ĉina ginsengo.

Por ŝanĝi la staton kaj restarigi la honoron de la ĉina ginsengo, ĉinaj sciencistoj kaj teknikistoj faris multjaran esploradon kaj reformadon al kultivaj metodoj kaj prilabora tekniko de Ŝinkajhe ginsengo kaj kreis serion da




En la ginsengo-kultivejo Ŝinkajhe

apartaj produktaj metodoj de ginsengo oportunaj al Ĝji'an-regiono. Nun la kultivado, flegado kaj prilaborado de ginsengoj estas faritaj science kaj norme, tial rimarkinde altiĝis ĝiaj produktokvanto kaj kvalito. Post rigoraj scienca kontrolo kaj kompara eksperimento oni plene pruvis, ke ĝiaj efikaj elementoj, ginsengaj saponino, polisakarido, volatila oleo, aminoacido kaj la bioaktiveco kontraŭlaca, kontraŭanoksia, kontraŭinflama kaj kontraŭdiureza superis tiujn de la japana ruĝa ginsengo kaj korea ginsengo. En la lastaj jaroj pliiĝis rapide en la internacia merkato la vendokvanto de Ŝinkajhe-ginsengo. Ĝi povas rivali kun la korea ginsengo kaj rompigi ĝian monopolon en la monda ginsenga merkato.

Kiel la popolo de Ĝji'an faras sintezan utiligon kaj rafinan prilaboradon de ginsengo? Pri tio mi vizitis la Ĝji'an-an Farmacian Fabrikon kaj ĝian estron Song Anĉjūan. Li diris, ke la fabriko fondiĝis en 1970. En la komenco ĝi produktis nur insekticidon kaj

poste teramicinon. La fabriko estis turmentita de deficiĉo en sinsekvaj jaroj pro malsufiĉo de krudmaterialo kaj pro depresio en vendado. En 1980 la fabriko preskaŭ bankrotis. Fronte al tiu serioza krizo ili decidis ŝanĝi la strukturon de produktaĵoj kaj utiligi la ginsengon abunde produktitan en sia loko por fari rafinan prilaboradon kaj produkti ĉin-medicinajn medikamentojn kun ginsengo kiel la ĉefa elemento. En tiu jaro ili produktis "ginsengan ekstrakton" kaj aliajn ĉin-medicinajn medikamentojn, en kvar monatoj ili gajnis 68 000 jūanojn da profito.

La fabriko starigis farmacian esploran sektion. Laŭ la tradicia farmacia teorio de ĉina medicino kaj surbaze de la moderna scienco kaj tekniko ĝi faris diversajn eksperimentojn al la radiko, trunketo, folio, floro kaj frukto de ginsengo por maksimume utiligi ginsengon. Post plurjara klopodo ili produktis 26 specojn de ginsengo-medikamentoj. Dank' al tio ĝiaj produktovaloro kaj profito leviĝas jaro post jaro. Ĝiaj



Ekstraktado de ginsengo-saponino en la Ĝji'an-a Farmacia Fabriko

multaj produktaĵoj estas vendataj al Usono, FR Germanio, Britio, Japanio, sudorienta Azio, Hongkongo kaj Aŭmen.

En merkata enketo la fabriko trovis, ke kreskas la socia bezono de tonikaj medikamentoj. Oni preferas naturajn tonikojn ol kemiaj medikamentoj. Pro tio, ili prov-produktis saponinajn tablojdojn de ginseng-frukto kaj ginseng-saponinajn tablojdojn. Klinika praktiko pruvis, ke la antaŭa estas benefika por preventi kaj kuraci senilecon. Preninte la tonikon pli ol unu monatojn, 300 pli-ol-60-jaraj maljunuloj plifortigis senescepte, ilia memorkapablo pliboniĝis, iliaj simptomoj, kiaj kapturigo, sufokiteco, sendormeco kaj laco, mildiĝis evidente aŭ malaperis. La du tonikoj trovas debiton en merkato.

La ĉefa ingredienco de la saponinaj tablojdoj de ginseng-frukto estas saponino de ginsenga frukto. La ginsenga frukto estis nomata en imperiestra palaco kiel "palaca te-frukto". Ĝia enteno de ginsenga saponino estas 4-oblo de

tiu de ginsenga radiko. Tial la tablojdoj povas altigi la testosteronan plasmon de maljunulo kaj reguligi la rilatumon de lia testosterona dihidrotelino, tial ĝi havas aktivan efikon por preventi kaj kuraci diabeton, koronarian kormalsanon, hipertension kaj oftajn malsanojn de maljunuloj. Ĉar tiuspeca tablojdo estas nova sekuriga kaj benefika medikamento, tial la Ĝji'an-a Farmacia Fabriko gajnis "Premion de Aklasa Scienca kaj Teknika Atingo" donitan de la Ĉina Higiena Ministerio.

La ĉefa ingredienco de ginseng-saponinaj tablojdoj estas ginsenga saponino. Ĝi evidente efikas por kuraci koronarian kormalsanon, brust-angoron, korbatan aloritmion, sangpreman perturbiĝon, neŭrastenion kaj klimakteran komplikojn. La medikamento gajnis "Or-drakan Premion de Bonkvalita Produktaĵo" aljuĝitan de la Ŝtata Ekonomia Komisiono de Ĉinio.

Tiuj bonkvalitaj produktaĵoj de la Ĝji'an-a Farmacia Fabriko debitiĝas en la tuta Ĉinio kaj eniris en la internacian merkaton. Ili

famigas la landliman malgrandan fabrikon.

Fabrikestro Song diris al mi: "Havante bonkvalitajn produktaĵojn, ni devas ankoraŭ pli progresi kaj senĉese ekspluati novajn produktaĵojn." Je tio li elprenis el produktaĵ-ŝranko botelon da "Ĉjangli Ŝengfaling" (harar-elkreskiga medikamento) kaj ĝin montris al mi. Ĝi estas unu el la tonikoj de beligo, akcelo de vitala energio kaj kontraŭ senileco.

Fabrikestro Song diris, ke la hararo estas simbolo de juneco kaj beleco, multaj faktoroj malhelpas ĝian kreskon. Alopecio estas ofte videbla, tio afflitis multajn personojn. Unuafoje per ginsengo, la Ĝji'an-a Farmacia Fabriko provproduktis "Ĉjangli Ŝengfaling" por kreskigi harojn. Iuj hospitaloj de Ŝanhajo kaj Ĉangĉun aplikis la medikamenton al pli ol 200 malsanuloj, la klinika observado konstatis, ke la kuraca efiko atingis pli ol 85%. Laŭ klinika praktiko, "Ĉjangli Ŝengfaling" povas kuraci peladon, adipozan alopecion, tro fruan alopecion, postmalsaniĝan kaj postakuŝan alopecion k.a. Ĝi havas aktivan rolon por malmultigi sebuman sekrecion kaj haŭterojn, senigi jukon, mortigi bakteriojn, protekti hararon, preventi alopecion kaj longigi la junecon kaj belecon.

La saponina tablojdo de ginseng-frukto kaj "Ĉjangli Ŝengfaling" produktitaj de la Ĝji'an-a Farmacia Fabriko estis admirataj de rigardantoj el diversaj lokoj de la mondo kaj gajnis arĝentan medalon en la "36-a Eureka-Foiro de Mondaj Inventoj" de 1987 okazigita en Bruselo. En la foiro ankaŭ ĝiaj tonikaj medikamentoj "Ĝenŝjongŭej" kaj "Luŭejbaĝing" (ekstrakto el cervovosto) gajnis arĝentan medalon. Song Anĉjŭan gajnis "Kavaliran Ordenon de Monda Inventisto" de la foiro pro lia sukceso en la laboro. ■



Jen "Ŭansōuling" (saponinaj tablojdoj de ginseng-frukto), "Ĝensĵongŭej", "Luŭejbaĝing" kaj "Ĉjangli Ŝengfaling" produktitaj de la Ĝji'an-a Farmacia Fabriko. Ili estis premiitaj per argenta medalo en la 36-a Eureka-Foiro de Mondaj Inventoj de 1987 en Bruselo.

ĈINAJ POŝTMARKOJ

Kaligrafajoj kaj pentraĵoj de U Ĉangŝuo

de Lu Dong



U Ĉangŝuo (1842-1927 p.K.) estis elstara ĉina kaligrafo kaj pentristo. Li estis lerta en pentrado de floroj, kaligrafado kaj sigelila gravurado kaj atingis novan nivelon tiurilate. Liaj verkoj karakteriziĝas per fortaj strekoj, harmoniaj koloroj kaj freŝa stilo. Ankaŭ la temoj impresas originale.

La poŝtmarko-serio prezentas kaligrafajojn, pentraĵojn kaj sigelilajn gravuraĵojn el "Verkoj de

U Ĉangŝuo" por ĝuigi filatelo-amatorojn. De maldekstre en la supra parto: kaligrafajo, duobla persiko kaj hibiskoj; kaj de maldekstre en la malsupra parto: visterio, peonioj, krizantemoj, umefloroj kaj sigelilaj gravuraĵoj.

La serio el ok pecoj estis emisiita la 27-an de aŭgusto 1984.